

IL POPOLO CINIO

中國報通

10 1988




VIVO DE ORDINARAJ ĈINOJ

Lanterna Festivalo en Bejhaj-parko

Fotoj de ŜEN ĈEN

La lanterno de Lotusflor-feino






La festivalo

La Lanterna Festivalo en Bejhaj-parko estis la plej grandskala en la historio de Pekino. La festivalo pompis per dinosaŭraj lanternoj de la urbo Zigong, Siĉŭan-provinco, kaj elegantaj lanternoj de la antaŭaj festivaloj de Pekino. 47 grupoj da lanternoj buntaj, lumaj, moviĝantaj kaj sonantaj kaj pli ol 3 000 lanternoj kun tradicia gusto dissemigis en la parko, kolorigante la pavilonojn, superakvajn kioskojn, monteton kaj lagon.

La Lanterna Festivalo multe plezurigis pekinanojn. Ĉiuespere, la parko estis plena de gajaj vizitantoj senĉese admirantaj kaj aplaŭdantaj. La festivalo daŭris 46 tagojn, kaj pli ol du milionoj da homoj rigardis la festivalon.

Gustoplena kanotado ĉe lanternoj





Dinosaŭra lanterno

Sub la pergolo de fruktaj lanternoj



ENHAVO

SUR LA KOVRILO:

Bakado de patkuko (kamparana pentraĵo)

de **ĈEN ĜJACJI**

VIVO DE ORDINARAJ ĈINOJ:

Lantern Festivalo en Bejhaj-parko

Fotoj de **ŜEN ĈEN**

La internacia konkurso de drak-
boatoj en Pekino

Fotoj de **U ĜJI**

SUR LA DORSKOVRILO:

(ĈINAJ POŜTMARKOJ)

Krizantemo

- 2 Pri la ekonomia disvolviĝo de Ĉinio en dek jaroj
9 Trapaso sub la Flava Rivero
59 VOJAĜO LAŬ JANGZI-RIVERO (22): Ŝtala ŭrbo en la
meza baseno de Jangzi-rivero
11 La urbo Ŝijan
13 Lando de koreaj pinoj
16 Disko por maljunuloj en Pekino
18 La nuna Nordĉinia Farmacia Korporacio
20 POR VIA SANO: Korpo-sanigaj metodoj (III)
21 Neelĉerpebla fonto
25 Destino (Novelo)
38 ĈINA LITERATURO: Kuriozaj rakontoj de Tang-dinastio
31 ĈINAJ ARTOJ: Ĉinaj ksilografajoj
45 Niŭĝje, huj-a kvartalo en Pekino
48 Internacia simpozio pri "Ĉinio kaj la mondo en la 90-aj jaroj"
51 ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: La fekunda kaj bela Nanŝa-
insularo
53 ĈINAJ MOROJ: Laŭda kanto
54 KURANTAJ AFEROJ
56 Lia amo kaj lia aspiro
58 Memore al prof. Paul Neergaard
68 POR KOMENCANTOJ: Tri fabloj
66 ESP-NOVAĴOJ
24 47 KORESPONDI DEZIRAS
10 Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

PRI LA EKONOMIA DISVOLVIĜO DE ĈINIO EN DEK JAROJ

La reformo de la ĉina ekonomia sistemo jam iris preskaŭ dek jarojn de 1978 ĝis nun. Dum la dek jaroj la reformo de ekonomia sistemo jam disvolviĝis kaj iom post iom profundigis en ĉiuj flankoj. La nacia ekonomio ĉiam pli vigliĝis. Diversaj kampoj, kiaj produktado, konstruado, cirkulado kaj konsumado, rimarkinde progresis, kaj la socia ekonomia vivo profunde ŝanĝiĝis.

En la reformo aperis nova aranĝo de la ekonomia disvolviĝo. La efektivigado de la familia laŭkontrakta respondeca laborsistemo kaj diversforma laŭkontrakta administra sistemo de industriaj kaj komercaj entreprenoj de urboj kaj urbetoj vigligis la mikroekonomian sistemon.

La strukturo de la unuopa publika posedanteco estas anstataŭita de la ekonomia strukturo de plurspecaj posedantecoj, kiaj entreprenoj de la tutpopola, kolektiva kaj individua posedantecoj kaj entreprenoj investataj kaj administrataj kune de Ĉinio kaj aliaj landoj kaj starigitaj de aliaj landoj. La procentaĵo de la industrioj de tutpopola posedanteco en la totala industria produktovaloru reduktiĝis de 80% en 1978 al 57.5% en 1987, tiu de la kolektiva ekonomio kreskis de malpli ol 20% al 40.2% kaj tiu de la individua kaj aliaj ekonomiaj elementoj leviĝis preskaŭ de nulo al 2.3% en la sama periodo.

La unuopa altcentralizisma planizita sistemo transformiĝas en novan ekonomian sistemon en kombino de plano kaj merkato. La konsumaja merkato plurkanala, malmultĉenera kaj pordomalferma perfektigis tagon post tago. Iom post iom disvolviĝas la merkato de produktaj rimedoj. Ankaŭ la merkatoj de kapitalo, tekniko, laborforto, bieno, informo k.a. jam komencis sian ekonomian vivon.

La sola kanalo de financa konstruata kapitalo jam estas anstataŭigita per plurspecaj kanaloj de financo, valuto, memkolektado kaj utiligo de fremdaj kapitaloj.

La ferma kaj rigida ekonomia sistemo transformiĝas en tiun malferman kaj vivoplenan,


kiu liberigas la produktajn fortojn, plue disvolvas la saĝon kaj talentojn de la vastaj popolamasoj kaj vigligas la tutan naciekonomion.

Vastasence, la dek jaroj, en kiuj la reformo kaj disvolviĝo akcelis unu la alian, estis plej prospera kaj plej stabila periodo de la ĉina ekonomia disvolviĝo kaj periodo, en kiu la ŝtato plej rapide plifortiĝis kaj la popolo akiris plej multe da avantaĝoj. Ni komparu 1987 kun 1978:

La ekonomiaj fortoj evidente kreskis. La totala nacia produktovaloru kreskis de 348.2 al 1 092 miliardoj da jŭanoj. Kalkulate laŭ la fiksa prezo ĝi 1.23-oble pliiĝis, la meznombra jara kresko estis 9.3%, kiu multe superis tiun de 6% en la 26 jaroj (1953-1978). Sur tiu bazo la kresko en la antaŭa duonjaro de la kuranta jaro jam atingis 11%.

La industria produktado atingis novan nivelon. La totala industria produktovaloru kreskis

La plej granda kupra bazo de Ĉinio



de 423.7 al 1 381.3 miliardoj da jŭanoj, ĝi 1.74-oble pliiĝis kalkulata laŭ la fiksa prezo, la meznombra jara kresko estis 11.8%. En la antaŭa duono ĉi-jare la industria produktado tenis altrapidan kaj stabilan disvolviĝon, la kreska procentaĵo atingis 17.2%, aperis la dua kreska tajdo post la unua en 1985. Kompare kun la 26 jaroj, en tiu ĉi periodo la industria produktado ne nur relative rapide kreskis, sed ankaŭ karakteriziĝis per stabileco, akordiĝo kaj rimarkinda altigo de la nivelo de produktado kaj tekniko. En la lastaj dek jaroj la industriaj departementoj investis al teknika reformo pli ol 230 miliardojn da jŭanoj, enkondukis dekmilon da internacie avangardaj teknikoj kaj instalaĵoj per ĉ. 15 miliardoj da usonaj dolaroj. La funkciigo de 154-tuna aŭtomate maŝarĝa aŭto, sukcesa provfarado de la unua 600 000-kilovatta termoelektra generatoro kaj aplikado de tekniko pri telekomuniko per fotokonduktaj fibroj, ĉio ĉi tio markis, ke iuj altaj industriaj teknikoj de Ĉinio atingis jam internacie avangardajn nivelojn.


La agrikultura produktado metis finon al la longtempe malrapida disvolviĝado. Ĝia totala produktovaloro kreskis de 139.7 al 467.6 miliardoj da jŭanoj, kaj pliiĝis je 75.9% kalkulata laŭ la fiksa prezo, la meznombra jara kresko estis 6.5%, kiu multe superis tiun de 2.6% en la 26 jaroj. La produktokvantoj de ĉefaj agrikulturaj produktaĵoj plejparte suriris novan historian ŝtupon. Samtempe kun tio, industrio, konstruado, transportado, komercado kaj aliaj neagrikulturaj industrioj en la kamparo rapide disvolviĝis, kio ebligis ekonomian

prosperon de la tuta kamparo. En 1987 la procentaĵo de la totala produktovaloro de la neagrikulturaj industrioj konsistigis 51.4% de la totala socia produktovaloro de la kamparo kaj unuafoje superis la totalan agrikulturan produktovaloron.

Ankaŭ transportado, poŝta kaj telekomunika afero relative multe disvolviĝis. La cirkulada kvanto de varoj atingis 2 222.9 miliardojn da tunoj ĉiukilometre, tiu de pasaĝeroj 589.7 miliardojn da personoj ĉiukilometre, t.e. pli multe je 1.26- kaj 2.38-oble respektive. La totala valoro por servado en poŝto kaj telekomuniko estis 3.88 miliardoj da jŭanoj, kaj 2.34-oble pliiĝis. La nombro de la ĉefaj marbordaj ankrejoj atingis 562, kun pliiĝo de 157. Funkcias 327 civilaj aerlinioj kun totala longo de 389 000 kilometroj, 1.6-oble pli multe. En Ĉinio estas 21 provincaj ĉefurboj, kiuj havas ekspresan poŝtadon, kaj la tekniko pri telekomuniko per fotokonduktaj fibroj jam estas uzata.

Ankaŭ edukado rapide disvolviĝis. Antaŭ dek jaroj estis malmultaj, kiuj lernis en altlernejoj. En la lastaj dek jaroj, kun la reformo de la ekzamena sistemo kaj disvolviĝo de la supera edukado, la nombro de ordinaraj altlernejoj de la lando jam atingis 1 063, kiuj elkulturis sume 2 856 000 diplomitojn en normalaj kaj fakaj kursoj. La nombro de diplomitoj el altlernejoj por adoltuloj estis 4 451 000. Estis sume 7 307 000 diplomitoj. La nombro multe superis la totalan sumon de diplomitoj en la 26 jaroj. Ankaŭ prosperis la mezgrada profesia edukado, la laboro popularigi

La kajo de Ĝangĝjagang-haveno



elementan edukadon vaste disvolviĝis en diversaj lokoj. Pli ol 1 000 gubernioj de la lando jam atingis la popularigan celon.

La ekstera komerco rapide ekspansiis. La totala sumo de importaĵoj kaj eksportaĵoj atingis 82.7 miliardojn da usonaj dolaroj kaj 3-oble pliiĝis. La meznombra jara kresko estis 16.8%, sed tiu en la 26 jaroj estis nur 9.5%. La procentaĵo de la totala sumo de importaĵoj kaj eksportaĵoj superis 1/4 de tiu de la nacia produktado. En la lastaj dek jaroj Ĉinio subskribis sume 10 314 interkonsentojn pri utiligo de fremda kapitalo kun valoro de 62.51 miliardoj da usonaj dolaroj. Ankaŭ komenciĝis la laboro pri laŭkontrakta konstruado por liverado de laborfortoj al aliaj landoj.

La popola vivo pliboniĝis. En la lastaj jaroj la registaro ne nur enpostenigis grandan nombron da senlaboruloj postlasitaj de la kultura revolucio en 1966-1976, sed ankaŭ aktive donis laboron al aliaj senlaboruloj nove aperintaj. En la dek jaroj la nombro de laboristoj kaj oficistoj nete kreskis je 37 150 000, tiu de individuaj laboruloj je 5 540 000. La procentaĵo de urbaj senlaboruloj reduktiĝis de 5.3% antaŭ la reformo al 2%, la salajroj de la laboristoj kaj oficistoj multe altiĝis.

La abundaj varoj sur la merkato jam metis finon al la situacio, ke mankis konsumaĵoj en longa tempo. En la lastaj dek jaroj granda ŝanĝiĝo okazis al la popola vivo. En 1987 la totala sumo de aĉetitaj varoj por ĉiu homo estis pli ol 540 jŭanoj, kaj 2.3-oble pliiĝis. La meznombra jara kresko estis pli ol 40 jŭanoj. La neta enspezo por ĉiu kamparano atingis 463 jŭanojn, kaj 1.8-oble kreskis post dekalkulo de prezo-altiĝa faktoro, la meznombra jara kresko estis 12.1%. La meznombra enspezo de la urbanoj kreskis de 316 al 916 jŭanoj, kun pliiĝo de 85.6% post dekalkulo de prezo-altiĝa faktoro, la meznombra jara kresko estis 7.19%. Tia rapideco estis nevidebla en la historio. Kun la pliiĝo de enspezo, la manĝaĵa strukturo transiras al tiu de nutra tipo. En 1987 ĉiu loĝanto konsumis 5.4 kg. da vegetala oleo, 14.5 kg. da porkoviando, 1.7 kg. da kortobirdaĵo kaj 5.6 kg. da freŝaj ovoĵoj, duoble pli multe ol tiuj en 1978. La loĝareo plivastiĝis. En la lastaj dek jaroj konstruiĝis novaj loĝejoj kun 7 miliardoj da kvadrataj metroj, la meznombraj pokapaj loĝareoj en la urboj kaj kamparo atingis 8.5 kaj 16 kvadratajn metrojn respektive. La blujaj, nigraj kaj grizaj vestoj jam estas anstataŭigitaj per buntaj vestoj. Komforteco, laŭmodeco kaj bunteco jam fariĝis la ĉefa melodio de la vestoj de la ĉina popolo. La nombro de lavmaŝinoj, fridujoj, kolortelevidiloj kaj aliaj altklasaj konsumaj pluroble, eĉ dekelk-oble kreskis. Vidoregistriloj, pianoj kaj altklasaj fotiloj ekaperis en la familioj kun alta enspezo. La sumo de deponaĵo de urbanoj kaj kamparanoj grandnombre kreskis kaj jam

atingis 307.33 miliardojn da jŭanoj en 1987, 13.6-oble pli multe. En la antaŭa duono de la kuranta jaro ĝi kreskis je 41.9 miliardoj da jŭanoj kompare kun tiu en la jarkomenco.

En la lastaj dek jaroj la terciara industrio rapide disvolviĝis. La problemo pri manko de gastejoj, manĝejoj, riparejoj, barbirejoj kaj banejoj multe solviĝis. La individua industria kaj komerca armeo kun 20 000 000 membroj plenigas la blankon de la servaj okupoj kaj faras fortan defion al la ŝtataj kaj kolektivaj komercoj. Por solvi la malfacilon en veturado la ŝtato faris multe da laboroj kaj alprenis diversajn rimedojn. Ekz., oni aldonis pliajn vagonojn al trajnoj, funkciigis sezonajn trajnojn, malfermis multajn novajn aerliniojn, turnis multajn armeajn instalaĵojn en civilajn, pliiĝis aŭtomobilojn kaj taksiojn en multaj urboj. Ĉio ĉi tio certgrade mildigis la kontraŭdirojn. La malfacilo en telefonado ankoraŭ restas freŝa en la memoro. Nun ne nur en multaj urboj iom post iom instaligis komunaj telefonoj, sed ankaŭ en Pekino kaj multaj grandaj kaj mezgrandaj urboj oni povas en ĉiu ajn momento paroli per telefono. En iuj marbordaj urboj oni povas rekte telefoni al Hongkong kaj Aŭmen kaj post kelkaj minutoj oni povas kontaktiĝi kun siaj parencoj. En iuj familioj de urboj kaj urbetoj estas instalitaj individuaj telefonoj, eĉ en iuj kamparanaj hejmoj funkcias telefonoj. Tio estas neimagebla antaŭ la reformo.

La dekjara reformo estas nur komenco. Nun Ĉinio estas en tre ŝlosila etapo de disvolviĝo, kaj la reforma vojo estas tre peniga. La malfruiĝo de la politik-sistema reformo retenis pluan profundigon de la reformo de ekonomia sistemo, kaj ankaŭ malfortigis la energion produktitan de la reformo de ekonomia sistemo. La nocio pri laŭleĝa starigo kaj reguligo de la nova ordo de la socialisma var-ekonomio ankoraŭ restas malforta. La produkta aktiveco de la kamparanoj kaŭzita de la laŭkontrakta respondeca laborsistemo malgrandiĝas. Ne tute disvolvis siajn kapablojn la laboristoj kaj oficistoj de industria kaj komercaj entreprenoj kaj laborantoj de la ŝtataj instancoj pro manko de konkurenco kaj neracia distribuo. Pro kunezisto de la malnova kaj nova sistemoj aperis multaj diversaj kontraŭdiroj, mankoj kaj konfliktoj; ekspansias la investo de fikskapitalo; tro rapide kreskas konsumata kapitalo; energio, krudmaterialoj kaj iuj konsumaj varoj ne povas kontentigi la bezonon; la ekonomia vivo ĉiam estas streĉa; kaj precipe multe altiĝas la preznivelo. Ekde 1985 la procentaĵo de jara prezo-altiĝo estis pli ol 6%, en la antaŭa duono de la kuranta jaro ĝi altiĝis je 13% kompare kun tiu en la sama periodo de la lasta jaro. Senĉesa prezo-altiĝo jam ne bone influas la realan enspezon de iuj loĝantoj. Oni bezonas kelkajn jarojn por bone solvi la problemojn.



Nova karbokajo de la havenurbo Ĉinhūangdaŭ



La Nuklea Elektrejo Daja'uan en konstruado





Novaj etaĝdomoj

Rikoltado sur ebenaĵo de la Nordoriento, Ĉinio





Muntejo de la Nankina
Aŭtofabriko



Malgranda hidroelektrajo

Trapaso sub la Flava Rivero

Nek veturante per ŝipo nek trapasante pontegon, mi trapasis la Flavan Riveron — la duan grandan riveron de Ĉinio.

Majon de la kuranta jaro, mi trapasis tra tunelo longa 488 metrojn sub la rivero, unu el la ŝosilaj konstruoj de la orienta linio en konduko de la suda akvo al la nordo.

Ĉinio havas vastan teritorion kun nesimetria kvanto de ĉiujara precipitaĵo. La sudo estas abunda je pluvo, sed la nordo malabunda je pluvo. La rapida kreskiĝo de loĝantaro, industria disvolviĝo kaj ekologia detruo seriozigas la akvomankon en la nordo. Por solvi la problemon, la ŝtato decidis konduki akvon de Jangzi-rivero norden. Laŭ la unuaperioda projekto de la orienta linio, oni pumpas la akvon el Jangzi-rivero ĉe la akvopumpa stacio de Ĝjangdu kaj poste kondukas la akvon norden laŭ la antikva Pekino-Hangĝoŭ-a Kanalo ĝis Dongping-lago sude de la Flava Rivero. Post tio, laŭ la duaperioda projekto oni kondukos la akvon trapasi la Flavan Riveron, por ke la akvo de Jangzi-rivero, laŭ la Granda Pekino-Hangĝoŭ-a Kanalo fluu al Tjanĝin, la plej granda norda marborda urbo.

La inĝenierado de la orienta linio en konduko de la suda akvo al la nordo devas trapasi la Flavan Riveron, pri kio la koncernaj fakuloj havis kelkajn projektojn. La unua estas konduki la akvon de Jangzi-rivero en la Flavan Riveron kaj poste konduki la akvon el la Flava Rivero ĉe ĝia norda bordo. Tamen la Flava

Rivero entenas multan leŭson, ke ĉiujare oni devus trakti ĉ. cent milionojn da tunoj da leŭso en la akvo, kio estos malfacilega. La dua estus konstrui aeran akvodukton trans la Flava Rivero, kio estus tre kompleksa kaj multekosta. Post komparado oni decidis apliki la projekton konduki la akvon subtere: Sub la Flava Rivero sterna tri gigantajn tubojn ĉiu kun diametro de pli ol 9 metroj, kiuj povos trapasigi ĉiusekunde 600 kubmetrojn da akvo de Jangzi-rivero, rezervata en Dongping-lago.

Komence de la unua de junio 1985, post unu jaro kaj naŭ monatoj, oni sukcesis konstrui eksperimentan tunelon subtere trapasantan la Flavan Riveron, inter Ŝjeŝan-vilaĝo sudborde en Dongping-gubernio kaj Ŭejŝan-vilaĝo nordborde en Dong'e-gubernio en Ŝandong-provinco.

Tiutage, akompanate de la konstrua respondeculo, mi venis al la tunela enirejo, for de la digo de la Flava Rivero je pli ol 100 metroj. Kun diametro de pli ol 2 metroj, ĝi estas simila al arka pordego de antikva urbomuro kaj al ŝakta enirejo de karbominejo. En la tunelo troviĝas multaj tuboj en malsamaj grandecoj. Mi eniris la tunelan enirejon kaj malsupren iris laŭ la ŝtupoj ĝis la loko profunda je 70 metroj. Tiam supre de mia kapo torentas orienten la Flava Rivero.

En la malsupra baseno de la leŭso-riĉa Flava Rivero sedimentos pli giganta kvanto da leŭso. Tamen, sub la Flava Rivero kaj sub la leŭsa tavolo dika je 23 metroj super la tunelo estas ŝtona

monteĝo interliganta la montojn Ŭejŝan kaj Ŝjeŝan.

Mi kaj iradis kaj rigardis. La supro de la tunelo estas jen glata, jen kruda, jen nigra, jen griza. Iam videblas pendiĝantaj blankaj stalaktitoj. Sur la muroj videblas de tempo al tempo signoj ruĝaj, flavaj, brunaj por akiri donitaĵojn de diversaj sciencaj eksperimentoj. Por grandigi la prospektoran sferon, oni fosis du branĉajn prospektorajn tunelojn ĉiu kun longeco de 50 metroj, en la orienta kaj okcidenta flankoj de la ĉefa tunelo.

Sur la supro kaj muro de la tunelo aperis de tempo al tempo enigitaj cilindraj ŝtonaj kolonoj ĉiu kun dikeco je ĉ. 10 centimetroj. Ĉar la tunelo troviĝas en karsta regiono, por bari akvoŝprucon kaj disfalon en la tunelo, oni unue devas altpreme enpumpi en rokojn ŝlimon de cemento kaj akva vitro por ŝtopi ĉiujn karstajn kavernojn, kavojn kaj fendojn. La cilindraj kolonoj estas solidigaĵoj de cementa fluidaĵo. La respondeculo diris, ke en la tuta tunelo oni enpumpis 2 400 tunojn da cemento kaj 240 tunojn da akva vitro kaj 75-foje ŝtopis akvoŝprucon, inkluzive ĉiuhore 100-kubmetran kaj 200-kubmetran akvoŝprucon.

Post mia vizitado de la eksperimenta tunelo tra la Flava Rivero, direktoro de la Tjanĝin-a Prospektora Projekta Instituto, kiu respondecas pri la tunela konstruado, prezentis al mi la projektadon kaj disvolviĝon pri konduko de la suda akvo al la nordo.

Frue en la 50-aj jaroj, la koncernaj departementoj de la ŝtato jam komencis esplori la projekton pri konduko de la suda akvo al la nordo. Post ripetada komparado, oni difinis tri akvokondukajn liniojn okcidentan, mezan kaj orientan. La okcidenta linio estas por konduki la akvon de la supra parto de Jangzi-rivero en Ĉinghaj-provinco. Majon de la kuranta jaro, la Akvoutiliga Komitato de la Flava Rivero jam sendis esploran trupon al la Ĉinghaj-Tibeta Altebenaĵo por elekti akvokondukan linion. La meza linio estas por konduki la akvon de la meza parto de Jangzi-rivero kaj de ĝia branĉo Hanŝuj-rivero. La orienta linio longa je 1 200 kilometroj estas por konduki la akvon ĉe la urbo Jangĝoŭ en Ĝjangsu-provinco, laŭ la Pekino-


Hangĝoŭ-a Kanalo, trapasante la lagojn Hongze, Lŭoma, Nansi, Dongping, Hŭajhe-riveron, la Flavan Riveron, Hajhe-riveron ĝis la urbo Tjanĝin. Laŭ unuapaŝa projektado, se oni kondukos la akvon de Jangzi-rivero 1 000 kubmetrojn ĉiusekunde, la jara kondukita akvokvanto atingos 30 miliardojn de kubmetroj kaj oni povos trapasigi 15 miliardojn da kubmetro tra la Flava Rivero, t.e. la jara totala kvanto de la kondukita akvo egalas al pli ol duono de la akvo de la Flava Rivero.

La konstruado de orienta linio havas multajn favorajn kondiĉojn. Krom la utiligebla antikva kanalo, grandaj naturaj lagoj sude de la Flava Rivero povas esti utiligataj kiel naturaj akvorezervejoj.

Krome, de la komenco de la 60-aj jaroj, oni jam konstruis la grandtipajn akvopumpajn staciojn Ĝjangdu kaj Hŭaj'an kaj dekelkajn akvopumpajn staciojn en Ĝjangsu-provinco de la orienta linio. Per tio oni komencis la akvokondukan konstruadon de la orienta linio.

Post la finiĝo de la unuaperioda konstruado de la orienta linio, la irigaciado de 1.33 milionoj da hektaroj da kampoj kaj la akvoprovizo de fabrikoj kaj minejoj ĉe la orienta linio estos garantiataj, sur la kanalo inter la urbo Ĝjining de Ŝandong-provinco kaj Jangzi-rivero povos trapasi modernaj ŝipoj kaj ilia transporta povo kelkdek-oble superos tiun de la antikva kanalo en ĝia prospera periodo. ■

LOKOJ MENCIIATAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Dongping 2. Dong'e 3. Hajkoŭ 4. Ŝjiŝa, Nanŝa, Dongŝa, Ĝongŝa
5. Ŝijan 6. Ĉangĉun 7. Ŝiĝjaĝuang

La urbo Ŝijan

En florfala sezono, veturinte de Pekino pli ol mil liojn (unu li-o = 1/2 km.) suden kaj poste okcidenten, mi atingis la urbon Ŝijan. Tiu verda urbo estas laŭdata kiel brila perlo en la montregiono de Hubej-provincio. Ĝi najbaras al Hanŝuj-rivero norde kaj al Udang-monto sude. Hanŝuj, la plej granda branĉo de Jangzi-rivero, abundas je fiŝoj. Sur la merkato de la urbo estas abundo da fiŝoj. Udang-monto, fama paradizo sub la ĉielo, estas taoisma sanktejo de Ĉinio. Sur la monto vivas multaj blankharaj taoistoj ĉ. 100-jaraj.

Ŝijan estas juna urbo kun historio de 18 jaroj. Ĝiaj stratoj kaj konstruaĵoj estas novaj. Tie estas tipa montregiono, valoj troviĝas unu apud alia, la tuta urbo sidas en zigzagaj montvaloj. Domegoj staras laŭ montodeklivo, la urbo kaj la verda monto kunfandiĝas, tial oni nomas ĝin monturbo. La Ŝjangfan-Ĉongĉing-a Fervojo kaj la branĉaj fervojlinioj de la fabrikregiono trairas la urbon. Super la montvaloj, kiujn trakuras trajnoj, pendas pontoj unu post alia. Rigardate de malproksime, vidiĝas grandioza spektaklo, kio donas al la monturbo apartan belecon. En Ŝijan estas la Dua Aŭtofabriko de Ĉinio, kaj la urbo naskiĝis kun la konstruado de la fabriko. Oni povas diri, ke aŭto estas simbolo kaj fiero de la urbo Ŝijan, kaj ankaŭ ĝiaj ekonomia


arterio kaj vivlinio. Tial kutime oni nomas ĝin urbo de aŭtoj.

Antaŭ ol Ŝijan naskiĝis, ĝi estis sufiĉe izolita, tie ne estis fervojo nek ŝoseo, la montanoj neniam vidis trajnon, aŭton kaj elektran lampon. En la 60-aj jaroj tie loĝis ĉ. cent familioj, etendiĝis nur unu strato, ambaŭflanke de kiu estis kadukaj tegoltegmentaj domoj kaj kabanoj. En la urbeto funkciis tri ferajbutikoj, kiuj faris ferajn laborilojn por kamparanoj, tio ja estis kalkulata kiel la industrio de la urbeto. Tie prosperis toŭfuob-

butiko, tio ja estis rigardata kiel la komerco de la urbeto.

En la urbo Ŝijan mi speciale vizitis la malnovan sidejon de la antaŭa urbeto. Mi ne povus trovi ĝin sen gvido de lokanoj, ĉar la malnova sidejo estas tute alia. La kadukaj domoj kaj kabanoj jam malkonstruiĝis, kaj restas nur kelkaj malnovaj inter la domblokoj, kiuj kiel neforgesenda historia paĝo donas ion malnovan al la nova urbo. Ĉe la urbeto oni konstruis kvartalan promenejon "Jŭanjŭan". Lokanoj diris, ke la promenejo sur la malnova sidejo

Parto de Ŝijan



de la urbeto estas signifoplena. Ĝi montras, ke la urbo adiaŭas malriĉecon kaj postiĝintecon kaj ĝojo anstataŭas ĉagrenon. Nokte, en tiu delikata promenejo mi rigardis saltantajn akverojn antaŭ la fontano. Tiam ĉirkaŭ mi estis ridetantaj maljunuloj, gajaj infanoj kaj promenantaj geamantoj, kiuj ĉiuj aprecis la belajn akverojn. Nemalproksime de la fontano flagris lamplumo kaj aŭdiĝis el balejo bela muziko.

En la unua printempo de la 70-aj jaroj la urbeto Ŝijan malfermis sian novan paĝon. La ŝtato decidis konstrui tie la Duan Aŭtofabrikon de Ĉinio. Miloj kaj dekmiloj da konstruantoj kolektiĝis en la montregiono de Ŝijan kaj vekis la dezertan monton. La konstruantoj hakis monton, konstruis ŝoseon kaj baris riveron por elkonduki akvon. Ili konstruis fabrikojn en montvaloj. En kelkaj jaroj la montvaloj grandaj kaj malgrandaj fariĝis produktaj regionoj de fabrikoj. Kun la disvolviĝo de produktado plimultiĝis kompletigaj fabrikoj por aŭtoproduktado. Samtempe kun tio, ankaŭ aliaj industrioj komen-

cis disvolviĝi. Pro industria disvolviĝo kaj loĝantara kreskado la distrikto en la montvalo, kie sidis fabrikoj, disvolviĝis en urbon. Tie aperis stratoj, magazenoj, hoteloj, bibliotekoj, stadionoj, kluboj kaj loĝkvartaloj. Post la 18-jara peniga laboro la malgranda monturbeto disvolviĝis en aŭtourbon kun 250 000 loĝantoj.

La Dua Aŭtofabriko de Ĉinio kun 3 000 000 instalaĵoj kaj 600 diversaj aŭtomataj produktlinioj povas produkti plurspecajn aŭtojn kaj ĝi produktas 120 000 kamionojn ĉiujare.

Estas ĉ. cent kompletigaj fabrikoj por aŭtoproduktado, el kiuj la plej granda estas Dongfeng-pneŭfabriko. Ĉiujare ĝi produktas 1 090 000 kompletojn da pneŭoj malsamspecaj kaj malsamnormaj, kaj kreas unu novan specon po duonmonato. La filio de la nomita fabriko estas en konstruado en Hajnan-provinco. Ĝi produktos ekskluzive pneŭojn eksportotajn eksterlanden.

En la lastaj 8 jaroj duobliĝis la totala produktovaloro de in-

dustrio de la urbo Ŝijan, la interezo donita al la ŝtato atingis 2.5 miliardojn da jŭanoj, kies sumo superis la totalan investon de la ŝtato por konstrui la aŭtofabrikon.

La tuta popolo de la urbo partoprenas mediprotektan kaj urbobeligan laboron. Ĉirkaŭe de Ŝijan estis dezertaj montoj, kies arboj estis forhakitaj. Nun malaperis dezertaj montoj, kaj anstataŭe prezentiĝas antaŭ la okuloj verdaj montoj, fruktĝardenoj kaj arbĝardenoj. Ĉiujare la urbanoj plantas milionon da arboj, ĉiu po 5. La magistrato dividis la urbon en centojn da regionoj por verdigi, kaj ĉiu fabriko, lernejo, institucio aŭ laborunuo devas respondeci pri arbo kaj flor-plantado en sia regiono por verdigi. Tiamaniere mobiliziĝis la aktiveco de ĉiuj unuoj, kiuj faras verdigadon kaj beligadon laŭ la apartaj trajtoj de sia regiono. Oni konstruas arbĝardenojn ĉe monto, laĝetojn ĉe rivero kaj promenejojn ĉe stratoj. Dank' al la penado de ĉiuj urbanoj, konstruiĝis pli ol 20 promenejoj grandaj kaj malgrandaj kaj pli ol 20 naĝejoj en la urbo, kiuj servas al la urbanoj kiel bonaj ripozejoj.

Kun medibeligado de la urbo, la magistrato reordigas Baj'er-riveron, kiu trafluas la urbon. En la lastaj jaroj kreskis la loĝantaro, multe da malpura akvo fluis en la riveron kaj poluciis ĝin. Nun, ambaŭborde de la rivero instaliĝis dreniloj longaj je miloj da metroj, sekve malpura akvo ne plu fluas en la riveron. Super la rivero pendas ŝosea ponto kaj ponto por pasantoj, kiuj interligas la orientan kaj okcidentan partojn de la urbo. Ĉe la malsupra parto de la rivero estas konstruita akvobaraĵo por levi la akvonivelon kaj turni la riveron kun malgranda flukvanto en tiun kun ondanta fluo. Turistoj povas remi sur la rivero kaj satrigardi la pejzaĝon de la urbo. ■

En la parko Bajjŭan





Arbohakisto

Lando de koreaj pinoj

de ĜENG ĜENĜJE

Mi ekveturis de la urbo Ĉangĉun, Ĝjilin-provinco, en la Nordoriento de Ĉinio, kaj post 2 tagoj atingis la forstadministracion Bajhe ĉe la piedo de Ĉangbaj-montaro. En la dua tago post mia atingo mi kun ĝojo iris al la montaro akompanate de Ŝjaŭ Li, laboranto de la forstadministracio.

La regiono, kie sidas la forstadministracio Bajhe kaj la proksimaj forstadministracioj, estas unu el la ĉefaj arbarbazoj de Ĉinio. Ĝi estas rara animala kaj vegetala trezorejo sur Eŭrazio. La montaro Ĉangbaj 2 000 m. alta super la marnivelo havas mirigan ŝanĝiĝon de la vertikalaj naturaj pejzaĝoj. Tiutage ni veturis en la arbaro pli ol 100 km, kio tamen ebligis al ni ĝui la ŝanĝiĝon vidatan en la plurmil-kilometra zono de la norda varmota zono ĝis la polusa regiono de la terglobo. De la loko 600 m. ĝis la loko 1 200 m. super la marnivelo estas zono, kie mikse kreskas pingloarboj kaj foliarboj;

en la zono de 1 200 m. ĝis 1 800 m. kreskas pingloarboj, kiaj koreaj pinoj, piceoj, abioj kaj larikoj; en la zono de 1 800 m. kaj 2 000 m. kreskas betuloj. Ju pli alta estas la loko super la marnivelo, des pli malaltaj kaj kurbaj estas la arboj. Sur la loko pli ol 2 000 m. alta super la marnivelo kreskas rampaj arbedoj. Tie la likeno kaj musko kovras la montsupron kiel verda tapiŝo.

En iu miksarbaro min forte interesis la ombriĉaj antikvaj ĉielskrapantaj arboj. Tie kreskas dekoj da specoj da arboj: tilioj, poploj, fraksenoj kaj multaj aliaj arboj, kies nomoj estas nekonataj por mi. Kompreneble, la koreaj pinoj estas la plej grandnombraj.

En la korea pinaro mi sentis kvazaŭ en kolosa verda palaco. Tie dense kreskas dikaj kaj altaj koreaj pinoj, kies frondoj interligiĝas kaj formas verdan "tegmenton". Rigardate tra fendoj de

la "tegmento", ili brilas kvazaŭ sennombraj steloj sur la lazura ĉielo. Tie kreskas iuj pinoj 400-500-jaraj, 30-40 m. altaj kaj tiel dikaj, ke mi kaj Ŝjaŭ Li ne povis brakumi ilin. Oni diris, ke ĉiu arbo povas doni 3-4 kubmetrojn da ligno. La tero de la pinaro estas kovrita de tavolo da sovaĝaj herboj kaj floroj. Iri sur ili estas pli komforte ol sur tapiŝo. Tie prosperas rododendroj, karmezinaj kiel flamo.

La koreaj pinoj estas valora arbospeco en la mondo. Ili estas valoraj tutkorpe. La lignaj vejnoj estas delikataj. Ilia naturo estas stabila kaj humidimuna. Ili ne putriĝas, enakviĝinte eĉ por dekoj da jaroj. Ili, facile prilaborataj, estas bona materialo por dom- kaj ŝip-konstruado. Post sinteza prilaboro el iliaj branĉoj fareblas industriaĵoj kaj ĉiutagaj bezonaĵoj. La segaĵo estas uzata por fari fibrojn kaj aktivan karbonon. El ili oni povas ekstrakti terebintoleon kaj re-

zinon, kiuj estas grava materialo por kemiindustria produktado.

Tie estas kvietta mondo. Ni iris facilpaŝe por ne rompi la kvieton. Atenteme rigardate, la pingloj de korea pino diferencas de tiuj de alispeca pino. Ĉiuj kvin pingloj formas unu faskon kaj ĉiuj faskoj kreskas arope sur la branĉoj. Iliaj fruktoj estas grandaj kaj aŭtune donas grandajn brunajn semojn, kiuj povas esti uzataj kiel tonika medicinaĵo. Oni diris, ke iuj antikvuloj ermite vivis en la arbaro sur la monto, sin kulturis per taoismo. Ili vivtenis sin per pinsemoj. En la mitaj rakontoj de Ĉinio "Dioj" kaj "Serĉo de Dioj" legiĝas epizodo, ke, se oni konstante manĝas pinsemojn, oni povas longe vivi kaj flugrapide iri. Sendube, la enhavo estas iagrade troiga. Moderna scienco konigas, ke la pinsemoj nutroriĉaj kaj bongustaj entenas pli ol 70% da

graso kaj 15% da proteino. Oni povas manĝi ilin bakitajn aŭ kuiritajn. La korea pino estas ruĝsela kaj ĝia ligno estas ruĝbruna.

Ŝjaŭ Li diris al mi, ke en la pasinteco en la regiono de Ĉangbaj-montaro estis multaj koreaj pinoj, kiuj tamen multe detruigis pro granda konsumado far la regantaro de la pasintaj dinastioj, milita haoso, prirabado far fremdlandaj agresantoj, arbitra hakado kaj arbara incendio. Nia ŝtato alte taksas protektadon de la koreaj pinoj. Tiaj pinoj estas kultureblaj, kaj plie, la kulturataj arboj kreskas 4-5-oble pli rapide ol la naturaj.

Ni babilante surpaŝis monteton. Tie la arboj jam dehakiĝis, tamen oni jam plantis diversajn arbojn, kiaj koreaj pinoj, falfoliaj pinoj kaj fraksenoj. En alia densa arbaro kreskas sennombraj valo-

raj drogherboj, el kiuj la sovaĝa ginsengo estas la plej valora.

La sovaĝa ginsengo estas multe pli valora ol la kulturata, ĉar ĝia kreskado daŭras longe, ekz., sovaĝa ginsengo ĝenerale devas kreski pli ol 10 jarojn por atingi la pezon de 20 gramoj. Ginsengo, utila al vivolongigo kaj antiseni- liĝo, povas akceli generadon de homaj ĉeloj. Nun oni dediĉas grandan energion al la studo pri ĝia mistera funkcio. Ankaŭ mi deziris sovaĝan ginsengon, sed ne havis bonan ŝancon.

La senlima arbaro de Ĉangbaj-montaro estas paradizo de sovaĝaj bestoj. Tie aktivadas multspecaj kaj grandnombraj sovaĝaj bestoj. Krom la mondfamaj tigroj de la Nordoriento de Ĉinio kaj makulaj cervoj, tie vivas ankaŭ leopardoj, ruĝaj cervoj (*Cervus elaphus*), ursoj, zibeloj, flavaj putoroj, linkoj, moskuloj, lutroj, aproj k.a.

Ligno transportota aliloken



Tie loĝas multspecaj birdoj, inter kiuj estas fazano simila al kolombo kaj 400 gramojn peza. Ĝia karnoriĉa brusto konsistigas preskaŭ duonon de la korpopezo. Ĝi ekleviĝas kun bruo kaj ĉiufoje povas flugi 500 metrojn. Ĝi ofte nestas sur montodeklivo aŭ en arbaroj de montvaloj. Ĝia karno estas delikata kaj bongusta. Antaŭ la 14-a jc. ĝi estis prenata kiel tributo al imperiestroj.

En la forstejo Ŝinglong mi vizitis kelkajn laboristajn familiojn.

Suj Ŝouĉen diris al mi, ke li forstistiĝis en 1952. Tiam la vivkondiĉoj en la forstejo estis malbonaj. La loĝejo estis budo el branĉoj kaj la laboristoj dormis sur folioj sur planko. Kuŝante surtere, oni povis klare vidi stelojn sur la ĉielo tra fendoj de la tiel nomata tegmento. Inter la arbohakistoj cirkulis jena diro: "Por segfaliĝi arbon unu homo mallerta

ne sufiĉas, sed du ne longe persistas." Tiam segfaliĝi dikan arbon dependis sole de homaj fortoj, kio kompreneble estis peniga. Kiam la arbego fulm-rapide falis, ajna malatento povis kaŭzi akcidenton. Nun maŝinoj anstataŭis la homojn en arbofaliĝo, lignokolektado kaj transportado, kio ŝparis kaj tempon kaj homfortojn kaj sekve multe reduktiĝis akcidentoj.

Suj kun siaj 6 familianoj loĝas en brikdomo kun areo de pli ol 50 kvadrataj metroj. La domo estas provizita per mebloj el superklasa ligno. En la domo kaj korto estas televidilo, lavmaŝino, motorciklo kaj aliaj bezonaĵoj. Suj diris al mi, ke du homoj el lia familio laboras en la forstejo. Ili enspezas ĉiumonate 250 jŭanojn entute. Kompare kun aliaj forstistoj, ili enspezas nemulte. Tamen pro la malalta vivkosto ili vivas bone. Laŭ regulo de la forstejo la

laboristoj kaj oficistoj povas senpage esti kuracataj, uzi akvon kaj envartejigi siajn infanojn. Ĉiumonate ili pagas nur pli ol 3 jŭanojn por domluado.

Adiaŭante la forstadministracion Bajhe, starante antaŭ la gastejo de la administracio, mi rigardis la viglan urbeton kun domego de la forstadministracio, vendejo, hospitalo, biblioteko, kultura domo, kinejo, poŝtoficejo, radiostacio, relajsostacio de televido kaj centra lernejo, sed en la 70-aj jaroj tie dense kreskis arboj kaj vivis sovaĝaj bestoj.

La estro de la forstadministracio sinjoro Liŭ diris al mi, ke la administracio havas sub si 191 000 hektarojn da tero. En la pli ol 10 jaroj post la establiĝo de la administracio oni faligis arbojn sur 2 100 hektaroj, sed arbarizis 18 000 hektarojn. Tio kreis novan fizionomion en arboplantado. ■

Korea pinaro



Disko por maljunuloj en Pekino

Disko, amuza maniero de Eŭropo, ekde la lasta jaro cirkulas inter maljunuloj de Pekino.

Disko enkondukigis en Ĉinion kun ĝia politiko de reformo kaj pordomalfermo. Komence, ĉar la disko enhavas grandan nombron da movoj, kiuj ŝajnas al ĉinoj ne decaj, tial ĝi estis kritikata de nemalmultaj personoj kaj populariĝis nur en parto da junuloj.

Kun la forpaso de tempo, multiĝas tiuj, kiuj toleras diskon kaj eĉ ĝin lernas. Samtempe, en sinsekvo da jaroj de sia ekzistado kaj disvolviĝado en Ĉinio en la nova medio, la disko iompostiome estis influata de la ĉina kulturo kaj enprenis en sin movojn de ĉinaj naciaj dancoj, kiuj pli konvenas al la estetika sento de ĉinoj. Kaj ĝuste sub tia stato la disko eniris en la rondon de maljunuloj.

Ĝingŝan-parko situas en la centro de Pekino kaj estis ĝardeno de ĉinaj imperiestroj. Nun ĝi fariĝis unu el la centroj de la aktivado de disko por maljunuloj.

Ĉiutage, je duono post la sesa, 200-300 maljunuloj unu post alia venas en la parkon tra ĝia suda pordo kaj dancas en akompano de agrabla muziko. Tiuj grizharaj maljunuloj dancas kun rideto, movante la talion kaj kokostojn aŭ levante la ŝultrojn. En la momento ili kvazaŭ tute forgesas siajn aĝon kaj malĝojon en la vivo kaj dronas en plezuro.

La disko por maljunuloj en Pekino disvolviĝas sub la influo de la urboj Harbin, Ŝenjang, Ŝanhajo, Nankino k.a. Tiuj urboj disvolvis la aktivadon por maljunuloj multe pli frue ol Pekino. Sed pekinaj maljunuloj kutime distingiĝaj per seriozeco havas la deziron superi la antaŭirantojn tiuflanke.

Nun, ĉiumatene, ne nur en la parkoj de la urbo troviĝas maljunuloj dancantaj diskon, sed ankaŭ kvartaloj kaj stratoj malproksime de la parkoj fariĝis terenoj disvolvi la aktivadon. Laŭ taksado de tiuj, kiuj kompare multe konas la staton, en Pekino la nombro de maljunuloj ofte partoprenantaj en la aktivado de disko superis 10 000.

Oni devas danki la leviĝon de la disko por maljunuloj en Pekino al la praktikaj iniciatintoj. La plejparto de tiuj iniciatintoj jam staras en la vico de maljunuloj aŭ post nelonge enviciĝos inter la maljunuloj. Tamen kompare kun ordinaraj maljunuloj, ili ankoraŭ tenas varmecon kaj strebadon al belajtoj en la vivo.

Instruistino pri muziko Ĝang Ŝjun de la Pekina Ĝingŝan-lernejo ja estas unu el ili. Ĉi-jare ŝi aĝas 58 jarojn kaj estas la ĉefa iniciatinto de la disko por maljunuloj en Ĝingŝan-parko.

Somere de la lasta jaro, ŝi estis en la urbo Ŝenjang kaj trovis, ke

tieaj maljunuloj dancas reformitan diskon. La ritmo de la reformita disko estas iom malrapida kompare kun tiu inter junuloj. Ĝiaj movoj estas sufiĉe mildaj, tamen ankoraŭ portas la karakteron sin movi tutkorpe. Ŝi opiniis, ke ankaŭ la maljunuloj de Pekino devas ellerni la aktivadon de kombino de amuzo kaj sanigo.

Reveninte Pekinon, ŝi disvolvis la aktivadon en Ĝingŝan-parko. Komence, la partoprenantoj estis tro malmultaj. Poste, pli ol 20 personoj aniĝis al ĝi. En la komenco de la kuranta jaro la nombro de partoprenantoj de la aktivado en Ĝingŝan-parko jam atingis 200-300, kaj eĉ iom pli ol 400.

Ekde tiam la aktivado de disko en Ĝingŝan-parko neniam ĉesis. Eĉ en ferioj kaj festotagoj, kiel kutime la maljunuloj venas ĉi tien por danci duonhoron, antaŭ ol okupi sin pri aliaj aferoj.

Iu maljunulino diris: "Kvankam ne estas malbone, ke unu persono ekzercas sin per *tajĝji-ĉjŭan*-gimnastiko, tamen pli interese al ĉiuj estas danci diskon kune. Iu maljunulo kun griza hararo opinias, ke la dancado de disko ne nur vigligas lian korpon, sed ankaŭ malpezigas al li la solecon kaj melankolion.

La disko por maljunuloj estas bonvena precipe al maljunuloj

kun granda klereco.


La 60-jara Ĝong Li laboras en kultura organizo. Iam ŝi opiniis, ke disko apartenas al la malaltnivelaĵoj kaj ĝin lerni ne taŭgas por altkleruloj. Tamen, ŝi korektis sian opinion, post kiam ŝi hazarde konis la "diskon".

Ŝi diris: "Strange! Mi tuj ĝin ekŝatis, kiam mi persone spertis la aktivadon kun forta ritmo, kiu kunfandas dancon kaj gimnastikon. Akompanate de bela muziko, via maljuniĝanta korpo fariĝas malstreĉa kaj laŭ bontrovo movebla. Nun mi vere senlace min amuzas per ĝi."

Ŝi diris ankaŭ: "Antaŭe mi ne atentis pri la beligo de maljunulinoj. Kaj mi mem ne konsumis mian tempon por tio. Dancinte la diskon, mi opinias ne okulplaĉaj miajn grizajn kaj blujajn vestojn. Sekve mi iompostiole ilin anstataŭigis per helkoloraj kaj enmodaj vestoj kaj ankaŭ portas simplan ornamadon. Rimarkinte la ŝanĝon, la familianoj ĉiuj diris, ke mi pli kaj pli rejuniĝas."

Ankaŭ Taŭ Suĉing, oficistino, kiu festis jam la 60-an datrevenon de sia naskiĝo, opiniis, ke ŝi havas du komprenaĵojn pri la aktivado de disko. En la lastaj du jaroj antaŭ ol ŝi komencis danci la diskon, ŝi ne estis sana kaj ofte ripozis hejme pro malsano. De post la lasta oktobro, kiam ŝi enviciĝis inter la disko-dancantoj, ŝia sanstato estas multe pli bona ol iam antaŭe. Kaj ĝojinde al ŝi estas, ke la rilato inter ŝi kaj ŝiaj infanoj estas pli intima ol antaŭe.

Ŝi diris: "Antaŭe, miaj infanoj dancis diskon hejme, kion mi malŝatis, kaj mi opiniis, ke ili ignoras sian propran profesion laboron. Nur post kiam mi ĝin ellernis, mi komprenas, ke ĝi utilas al menso kaj korpo. Nun mi ne nur ne kritikis ilin, sed iam ankaŭ petas, ke ili estu miaj partneroj en dancado. Pasintece miaj infanoj malmulte interparolis kun mi, sed nun multiĝas io komuna inter mi



Gaja disko por maljunuloj



En lernado de la danco

kaj ili."

Antaŭ nelonge, la Pekina Televid-stacio speciale surbendigis la programeron pri la "disko" por maljunuloj en Pekino kaj prezentis ĝin al la publiko, tiel ke la disko por maljunuloj estas atentata de pli multaj personoj.

Ankaŭ s-ino Ding Jilan, eksestro de Radio Pekino, estas entuziasma maljunulino pri disko. Ŝi diris: "Antaŭe ni taksis diskon

unuflankece kaj neglektis ĝian sanan kaj vigan enhavon." Ŝi aldonis: "La kresko de la disko por maljunuloj montris novan strebadon de la nunaj maljunuloj al la vivo en la realaj kondiĉoj. Ili bezonas ekzerci sian korpon, sin amuzi, partopreni en kolektiva aktivado kaj reciproke siajn sentojn. Sekve la disko por maljunuloj kreskas en favora kondiĉo kaj estas pli kaj pli bonvena." ■

La nuna Nordĉinia Farmacia Korporacio

Antaŭ 30 jaroj al la ĉinaj urboj kaj kamparo mankis medikamentoj. Sub tiu kondiĉo finkonstruiĝis kaj komencis funkcii la Nordĉinia Farmacia Korporacio — ampleksa farmacia entrepreno produktanta ĉefe antibiotikon, en la urbo Ŝigĵaĝuang sur Hebej-ebenaĵo. La signifo estis granda kaj profunda. Kiajn ŝanĝiĝojn la korporacio spertis en la 30 jaroj?

Ĉi-somere mi vizitis la farmacian korporacion, la plej grandan produktan kaj eksportan bazon de antibiotikaj medikamentoj en Ĉinio. Trairinte la flaveblankan pintsupran oficdomogon, mi vidis araneaje interkruciĝantajn tubojn, arbore starantajn ŝtalvazegojn kaj dekelkajn laborejojn kunligitajn per tiuj tuboj. La ŝtalvazegoj bruege turniĝadis kaj la gasellasaj tuboj senĉese laboris.

Estro de la korporacio Ŭang Ĵulin koniĝis al mi, ke en la komenca periodo post sia fondiĝo, la Nordĉinia Farmacia Korporacio havis nur amelan kaj vitran filiojn, kun malalta produktiveco. Ĝi povis produkti nur penicilinon, streptomycinon kaj aliajn tri specojn da medikamentoj. La ĵara projekta povo de la totala produktokvanto de antibiotiko atingis 82.5 tunojn.

Nun la korporacio jam havas 5 filiojn kaj unu instituton, kun areo de pli ol 80 hektaroj kaj proksimume 10 000 oficistoj kaj laboristoj. La nombro de ĝiaj produktaĵoj atingis sume pli ol 90, kaj la ĵara produktokvanto de


antibiotiko en 1987 estis 2 170 tunoj, t.e. 1/6 de la totala produktokvanto de la tuta lando. I. a. la totala produktokvanto de kalia penicilina G, streptomicina sulfato kaj linkomicina kloridacido konsistigas pli ol duonon de tiu de la tuta lando respektive. La fermentnivele de penicilino kaj streptomicino dekelk-oble pli altiĝis kompare kun tiu en la komenca periodo. En la 30 jaroj la profito kaj imposto donitaj de la korporacio al la ŝtato 55-oble pli multiĝis ol la investo de la ŝtato por ĝia konstruado. En 1987 la totala sumo de ĝiaj profito kaj imposto okupis la unuan lokon inter la pli ol 600 samspecaj farmaciaj entreprenoj de la tuta lando.

Bona ekonomia efiko, antaŭ ĉio, devenas el altkvalitaj produktaĵoj. 5 specoj el la dekoj da

altkvalitaj produktaĵoj de la korporacio gajnis orajn aŭ arĝentajn medalojn de la ŝtato. Tiuj medaloj estas montritaj en la vitroŝrankoj ambaŭflanke de la pordo de la korporacio. La laboristoj kaj oficistoj fieras pri ili.

Natria penicilina G kaj streptomicina sulfato, tradiciaj produktaĵoj, kiuj gajnis orajn medalojn, estas fruktoj de du-generacia penado de la korporacio. Enirinte la fermentejon pri penicilino, mi vidis, ke 16 vazegoj el rustimuna ŝtalo kun alteco de trietaĝa domego bruege turniĝadas. Kelkaj laboristinoj prenis sur sin la ĉefan taskon regi per mikrokomputilo en manipulejo kaj kontroli aparatojn sur la vazegoj en difinita tempo. Tie mi informiĝis, ke en 1958 la korporacio sukcese elkulturis la unuan ĉinan penicilinan rason. Poste ĝi venkis

Laborlinio por ekzameni la kvaliton de medikamentoj



multajn malfacilojn, senĉese plibonigis la tradician rafinan teknologiojn, kulturis teknikistojn kaj fine kreis novajn originalajn fermentan kaj rafinan teknologiojn de penicilino, streptomicino k.a., sekve la fermentaj unuoj kaj jara produktokvanto de penicilino kaj streptomicino ĉiam estas en grandampleksa kreskado.

Tamen, nun ankoraŭ mankas antibiotiko sur la merkato. Kial? Iu respondeculo de la korporacio klarigis al mi, ke en la lastaj jaroj la socia postulo pri penicilino rapide kreskis. La ĉefa kaŭzo kuŝas en jeno: Unue, kun la ekonomia disvolviĝo la medikamenta merkato rapide disvolviĝis en la vasta kamparo kaj izolitaj regionoj, kie mankis medikamentoj. En la pasinteco la malsanuloj plejparte ne prenis medikamentojn. En iuj lokoj malsanuloj eĉ ne havis monon por aĉeti simplajn medikamentojn kaj devis interŝanĝi ovojn kontraŭ medikamentoj. Nun ili jam havas monon por aĉeti medikamentojn. Due, la urbanoj pli bone konas la drogrezistecon de penicilino. En la 50-aj jaroj unu 200 000-unua flakono da penicilino estis injektita en kvar fojoj, sed nun unu 800 000-unua flakono da penicilino estas uzita nur unufoje. Trie, pro prezaltiĝo de krudaj materialoj, iuj fabrikoj antaŭe produktantaj antibiotikon nun ĉesigis la produktadon.

“Kiujn rimedojn vi alprenis por altigi la produktokvanton?” demandis mi al la respondeculo.

“En 1986 estro de la korporacio Ŝang proponis unue venki la ŝanceliĝon de teknikaj normoj. Samjare la korporacio komencis provi teknologian reformon kaj formiĝis sistema reforma projekto en duonjaro. En 1987 la projekto efektiviĝis en ĉiuj flankoj. Sub la premiso ne ĉesigi laboron, en unu trimestro oni renovigis ĉiujn tuboliniojn de du fabrikdomoj, en la 16 fermentvazegoj estas enmetitaj novaj rasoj. Oni regas aldonon de materialoj per mikrokomput-



Analizistinoj en eksperimentado

iloj. Rezulte de tio, la produktokvanto de la penicilina sistemo nete kreskis je 183 tunoj en la jaro, dum la konsumo reduktiĝis al 27%. Laŭtakse la produktokvanto de penicilino povos atingi 1 000 tunojn en la fino ĉi-jare.”

Kiam mi eliris el la laborejo, fronte al mi larĝa slogano vekis mian intereson. Sur ĝi skribiĝas: “Bonkvalitaj medikamentoj kuracas, kaj malbonkvalitaj mortigas.” Ĝi estas labora devizo observata de la laboristoj kaj oficistoj de multaj jaroj. Ili opinias, ke la medikamento estas speciala varo. Oni devas unue garantii ĝian kvaliton, ne sole konsiderante la ekonomian profiton. Se malbonkvalitaj medikamentoj elfabrikiĝas, ili ne nur povas prokrasti la kuracadon, sed ankaŭ endanĝerigi la vivon. Tial, de multaj jaroj ili laboras kun la spirito respondi pri la sano de la popolo. Estro Ŝang Ĵulin, ekde la komenco de la 80-aj jaroj, jam turnis grandan atenton al la ĉiufanka administrado de kvalito kaj sistema altigo de la kvalito de la entrepreno. Tial sublimiĝis la antaŭa simpla koncepto pri kvalito de la laboristoj kaj oficistoj. Ili prezentis la sloganon “produkti ormedalajn produktaĵojn per ormedala laborkvalito”.

En 1986 la korporacio gajnis la kvalit-administran premion de la ŝtato, unuan inter la samspecaj entreprenoj de la lando.

En iu oficejo mi renkontis vicestron Liŭ, kiu respondecas pri produktado. Kiam mi demandis pri la eksportado de la produktaĵoj, li diris al mi, ke la produktaĵoj de la korporacio unue devas kontentigi la bezonon de la enlanda merkato, kaj poste eksportiĝi. Nun streptomicina sulfato, linkomicina kloridacido, teramicino, tetraciklino kaj aliaj produktaĵoj vendiĝas en pli ol 30 landoj kaj regionoj. La eksportokvanto de tiuj medikamentoj konsistigas respektive 50-100% de la totala eksportokvanto de la samspecaj medikamentoj de la lando.

Precipe, streptomicino produktita de ĝi ĝuas apartan reputacion sur la internacia merkato. Ĝi jam estas difinita kiel la internacie norma produktaĵo de la samspecaj produktaĵoj pro tio, ke ĝia kvalito kaj teoria valoro estas preskaŭ egalaj. Farmaciaj komercistoj de Nederlando, Belgio kaj Danlando konfidis al la streptomicino produktita de la fabriko.

Korpo-sanigaj metodoj (III)

DENTOJ

1. Kunfrapu la dentojn 36-foje ofte ĉe tagiĝo. Tio povas fortigi ilin kaj gardi ilin kontraŭ kario.

2. Gargaradu la buŝon post manĝo. Tio povas gardi la dentojn kontraŭ kario.

3. Sidu kun vizaĝo orienten. Enspiru, tenu la spirhalton kaj kunfrapu la dentojn 14-foje. Faru kvar tiajn ekzercojn (unu ekzerco konsistas el 14 fojoj). Larĝe malfermu la buŝon por iu ajn el la ekzercoj. Tio povas forigi dento-doloron. Kontraŭ forta aŭ malforta doloro faru pli aŭ malpli da ekzercoj ĝis kompleta resaniĝo.

BUŜO KAJ GORĜO

1. Liberigu vin de ĉiaj koleroj kaj ĉagrenoj, ĉar ili tre malutilas al la menso, kiu havas intiman rilaton kun la lango. Alie povas estiĝi balbuto.

2. Subtenu la vangojn per la manoj kaj forte kunpremu la kubutojn sen movi la manojn (vd. la bildon 1), samtempe kun


fortostreĉo de la lumboj por kelka tempo. Poste laŭeble movu la kubutojn ambaŭflanken kaj plene malstreĉu la ŝultrojn, kubutojn kaj lumbojn. Haltu por momento, se vi sentas malkomforton. Faru la ekzercon sep-foje. Tio povas forigi ŝvelon kaj doloron ĉe la gorĝo.

3. Alkroĉu al la mentono la interkrucitajn fingrojn kun manplatoj supren (vd. la bildon 2) kaj laŭeble suprenlevu la manojn. Tio povas kuraci hipofunkcion kaj tuson. Interkrucu la fingrojn sur la mentono, movu malsupren la dikfingrojn, ke ĉi tiuj premu po unu arterion en la kolo ĉe ambaŭ ĝiaj flankoj. Tuj direktu la dikfingrojn al la mezo por premi

tiun lokon kaj laŭeble proksimigu ilin al la gorĝa osto. Faru la ekzercon tri-foje. Tio povas kuraci afonion, pliiĝi energion, reguligi spiradon kaj levi voĉon.

4. Sidu kun vizaĝo orienten kaj kapo levita. Enspiru, tenu la spirhalton kiel eble plej longe kaj elspiru. Faru la ekzercon 5-foje. Leku en la buŝa kavato. Kiam multiĝas salivo, gargaru per ĝi la buŝon 14-foje. Glutu la salivon je kelkaj fojoj. Tio povas kvietigi soifon. La konstanta ekzercado povas forigi la maldolĉecon de la buŝo, purigi la buŝan kavon, kreskiĝi la gustosenton kaj sentigi nek malsaton nek soifon.

(Daŭrigota)



Ankaŭ la injektablebla glukozo produktita de la amela filio gajnis oran medalon de la ŝtato. Vicestro Liŭ rakontis, ke la Otsuka-korporacio de Japanio famiĝis pro sia altkvalita injektablebla glukozo. En 1983 la korporacio fondis filion en Tjanĝin kune kun ĉinoj, esperante trovi kvalifikitan

materialan glukozon en Ĉinio. Post ekspertizo la glukozo de la Nordĉinia Farmacia Korporacio estas ununura norma kaj povas funkcii kiel surrogato de la importita.

Por disvolviĝi la entrepreno devas senĉese ekspluati novan kampon kaj krei novajn fruktojn.

Ankaŭ la farmacia entrepreno ne estas escepto. En la lastaj jaroj la korporacio turnis sian atenton al renovigo de siaj produktaĵoj. Nun ili provproduktas semisintezan penicilinon. Dekkelkaj specoj da novaj antikancera kaj antiinfekta antibiotikoj jam produktiĝas kaj vendiĝas sur la merkato. ■

NEELĈERPEBLA FONTO

—*Intervjuo al la fama ĉina verkistino Bingŝin*



S-ino Bingŝin

En bela printempa tago mi frapetis je la pordo de maljunulino Bingŝin. Ŝia prizorgantino kondukis min en ĉambron, kiu servas kaj por dormo kaj por laboro. “Mi aŭdis la frapadon,” venis milda voĉo, en kies direkto mi vidis, ke ridetante min rigardas vigla maljunulino sidanta ĉe skribotablo.

Mi miregis, ke tiu samaĝulo de nia jarento havas tiel bonan aŭdadon.

Mi sidiĝis sur seĝo apud ŝi, veterana verkistino fama en kaj eksterlande, rigardis ŝian afablan vizaĝon kaj aŭskultis ŝian parolon en dialekto de suda Ĉinio, kaj al miaj okuloj kvazaŭ prezentiĝis la longa literatura historio de nia jarento.

DEBUTO EN LITERATURO

Bingŝin antaŭe portis la nomon Ŝje Ŭanjing. Ŝi naskiĝis la 5-an de oktobro 1900 en familio de mararmea oficiro en la urbo Fuĝoŭ, Fuĝjan-provinco. En ŝia 3-jara aĝo ŝia familio transloĝiĝis en mararmean rezidejon en Jantaj de Ŝandong-provinco. Pro ŝato al viraj vestoj ŝi ofte portis soldatan uniformon, kun malgranda sabro. Ŝi estis nomata “brava militisteto”. Ŝi revenis 10-jara al la hejmurbo kaj nur tiam sin vestis denove per knabinaj vestoj. En 1912 ŝi veturis al Pekino kune kun la patro kaj sin ligis intime kun tiu urbo. En 1923 ŝi finis sian lernadon en Janĝing-universitato kaj tuj poste studis en usona universitato por magistreci. Ŝiaj

famaj korespondaĵoj “Leteroj al Geknabaj Legantoj” estis skribita plejparte en Usono. Post kiam ŝi revenis en la patrolandon en 1926, ŝi instruis sinsekve en Janĝing-universitato kaj la Virina Literatura Kolegio de Ĉinghŭa-universitato. Dum la Kontraŭjapana Rezistmilito ŝi loĝis en la provizora ĉefurbo Ĉongĉing kaj post la venko de la milito vojaĝis al Japanio kune kun la edzo. De 1949 ĝis la printempo de 1951 ŝi instruis en la fakultato de nov-ĉinia literaturo en la Tokia Universitato.

Bingŝin volis fariĝi kuracisto. Se ne okazus en Ĉinio la kontraŭimperiisma kaj kontraŭfeŭdisma Movado de la 4-a de Majo 1919, ŝi fariĝus eminenta kuracistino kun la nomo Ŝje Ŭanjing anstataŭ verkistino kun la pseŭdonimo Bingŝin.

Ŝi skribis en iu artikolo: “La potenca epokfara patriotisma movado kaj nov-kultura movado de ĉinaj junuloj kaj la forta pensfluo de la epoko eltiris min el la malgranda familio kaj misiista lernejo, kaj mi iom post iom rimarkis diversajn problemojn en nia duonfeŭda kaj duonkolonia ĉina socio. Tie estas sango, larmoj, ofendoj, ĝemoj, subpremoj, krioj... Mi intencas prezenti en formo de literatura verko nur tion, kion mi vidis kaj aŭdis.”

Ŝia unua novelo “Du Familioj” aperis popece en la Matena Ĵurnalo de Pekino de la 18-a ĝis la 22-a de septembro 1919. Ĝi kritikis sinjorinojn de la feŭdaj



Bingŝin, ŝiaj edzo kaj infanoj en 1938

burokrataj familioj, kiuj estis mallaboremaj, ne zorgis pri la dommastrumado, influis la laboron de la edzoj kaj vundis ilian spiriton. Se ŝia "Du Familioj" ne vekis grandan eĥon, ŝiaj aliaj problem-noveloj "La Malĝoja Solulo", "Ĉagreno en Aŭtuna Pluvo kaj Vento" kaj "Forlaso de la Patrujo" verkita en 1919 vaste diskonigis ŝin.

"La Malĝoja Solulo", publikigita en oktobro tiujare, priskribas konflikton inter patro kaj filo kun certaj epokaj trajtoj kaj la

ĉagrenon de la junulo, kiu ne povis partopreni en patriota studenta movado pro la malpermeso de la patro. Apenaŭ tri monatojn post sia apero, la novelo estis surscenigita de studenta teatra trupo. Tiutempe nemalmultaj junuloj estis afliktataj de la simila kontraŭdiro inter konservativeco kaj reformado. La novelo prezentis tipan problemon de la socio kaj vekis indan eĥon.

Tiuj problem-noveloj plene montris la distingigan talenton kaj originalan stilon de la aŭtoro, tiel

ke ŝi baldaŭ fariĝis elstara verkistino de tiu epoko kaj la plej frua aŭtoro de problem-noveloj en la historio de la ĉina moderna literaturo.

POEZIO EN STILO DE "PRINTEMPA AKVO"

Bingŝin, "genia en poezio", post sukcesoj en verkado de noveloj, marŝis al la poezia kampo.

En 1922 ŝi publikigis "Steloj" kaj "Printempa Akvo". Tiuj 346 poemetoj registris ŝian esploron pri la homa vivo. En "Printempa Akvo n-ro 105" ŝi diris sian peton kiel jene:

*Kreanto de la universo,
se en la eterna vivo
donas nur unu promeson
de ĝojego,
mi petas en sincero:
"Mi estu en la patrina sino,
la patrino en boato,
la boato en maro en luna
nokto."*

Videble, la poemo plej lakone kaj plej figure montris ŝian senton por la homa vivo. En la poemo harmonie interplektiĝas la patrina amo, la naturo kaj la infana koro, kiuj konsistigas la ĉefan enhavon de "Steloj" kaj "Printempa Akvo". Ŝiaj poemoj estas famaj pro implico, mildeco, eleganteco kaj ĉarmo kaj krome kun iom da tristo. Ili havas ne nur guston de ĉinaj klasikaj poemoj, sed ankaŭ kvintesencon de alilandaj literaturajoj, ekz. "Printempa Akvo n-ro 147":

*En ombro de arbo
vi sidas meditante —
ho, kia subtila liriko!
Gaza printempa lumo
Jus elkreskigis vin,
ĝardenisto per tondilo
tuj detranĉis vin.*

Tiuj signifoplenaj versoj en klasika poezia gusto montras ŝian vervon.

Ŝiaj "Steloj" kaj "Printempa Akvo", similaj al trembrilantaj steloj sur la nokta ĉielo kaj buntaj

ondoĵ levitaj de printempa akvo, vekis fortan eĥon en la poetaj rondoj kaj akcelis la aperon de "furora epoko de poemoj" en la historio de ĉinaj novaj poemoj. Kaj tiel naskiĝis poemoj en stilo de "Printempa Akvo".

"LETEROJ AL GEKNABAJ
LEGANTOJ" VASTE KONATA
EN LA LANDO

Bingŝin diris al mi, ke el la diversaj literaturaj formoj ŝi plej amas prozon. Jes, ŝi prenis prozon kiel ĉefan formon en sia literatura verkado. Precipe "Leteroj al Geknabaj Legantoj" povas esti rigardata kiel ekzemplo de prozo.

Laŭ ŝia propono, oni starigis ekde la 24-a de julio 1922 rubrikon "Infana Mondo" en la felietono de la Matena Ĵurnalo. La sekvantan tagon ŝi skribis tre intiman verkon "Letero al Geknabaj Legantoj". Post tio sekvis ŝiaj 29 korespondaĵoj, kiuj aperis poste en formo de libro sub la titolo "Leteroj al Geknabaj Legantoj". La libro estas unu el la porinfanaj legaĵoj plej influaj en la historio de la ĉina moderna literaturo.

El la 29 korespondaĵoj 21 ŝi verkis en la ŝipveturo al Usono, aŭ dum sia restado en tiu lando. Tial la libro fakte estas ŝiaj vojaĝnotoj por esprimi ŝian senton por la patrolando kaj prikanti la patrinan amon, la infanan naivecon kaj naturon.

En "Leteroj al Geknabaj Legantoj (20-a korespondaĵo)" ŝi diris al siaj malgrandaj legantoj: "Amiketoj, mi ne estas tiu, kiu forgesas sian hejmlandon. Ĉi tie ne mankas plezuroj, mi tamen restas kiel gasto." Ŝi aldonis: "La patrolando havas nenion, tamen posedas mian amon. Havi mian amon signifas havi ĉion!" Ŝia profunda amo por la patrolando estas la plej nobla spirito en la "Leteroj al Geknabaj Legantoj".

Kiel eminenta pentristino,



Bingŝin kaj infanoj

Bingŝin prezentas al la legantoj ravajn pejzaĝojn.

"3-a kaj 4-a korespondaĵoj" priskribas, kiel ŝi, en trajno veturanta de Pekino al Ŝanhajo, bone kaptis malsamajn trajtojn de pejzaĝoj de norda kaj suda Ĉinio kaj interplektis la sentojn, pejzaĝojn kaj poemojn, ke la malgrandaj legantoj povas kune kun ŝi ĝui la belecon de la patrolando. En "16-a korespondaĵo" ŝi bildigis por la malgrandaj legantoj pentraĵon de majstra nivelo: "En la pasinta somero mi vojaĝis al suda Ĉinio. Matene la trajno venis al Suĝoŭ. Ĝi veturis kelkajn kilometrojn paralele al ĝiaj muroj. En la urbo leviĝis fumo en humida aero, en la ĉirkaŭurba rivero floris boatoj kaj en malproksimo superrigardis alta pagodo post urbomuro. Kiel ĉarma bildo! Tiam mi ekpensis, ke mi ne plu vidos la bildon, se mi forlasos la patrolandon." Tio vekis ĉe la malgrandaj legantoj profundan amon al la patrolando, al la hejmloko.

PLI DA AMO, PLI DA SIMPATIO

Post kiam Bingŝin revenis de Japanio en 1951, ŝi sin dediĉis denove al verkado. En 1956 ŝi

publikigis sian "Taglibron por Someraj Ferioj de Tao Qi". En 1958 en *Renmin Ribao* (Popola Ĵurnalo) aperis ŝiaj "Aliaj Leteroj al Geknabaj Legantoj". En tiu periodo estis eldonitaj "Post Reveno al la Patrolando", "Prikanto de Sakuro", "Ni Vekis Printempon" kaj ŝiaj aliaj prozaĵoj kaj "Oranĝa Lanterneto", "Spikumaj Eseoj" kaj aliaj porinfanaj legaĵoj. Inter ŝiaj tradukaĵoj troviĝas "Hindaj Fabeloj", "Hindaj Popolrakontoj", "Gitanjali" kaj "Dramoj de Tagore". Estas menciinde, ke ŝi, en la aĝo de 80 jaroj, verkis "Malplenan Neston", kiu gajnis premion de bona novelo de Ĉinio.

Krome Bingŝin ankaŭ partoprenis en sociaj aktivadoj. Ŝi 12-foje vizitis aliajn landojn, kiel Japanio, Britio, Francio, Italio, Svisio kaj Egiptio, kontribuante por la amikeco kaj kultura interŝanĝo inter Ĉinio kaj tiuj landoj. Ŝi funkciis kiel sekretario de la Sekretariato de la Ĉina Verkista Asocio kaj estis reprezentanto de la Unua ĝis la Kvina Tutlanda Popola Kongreso kaj membro de la Konstanta Komitato de la Kvina Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco.



Bingŝin (sidanta) ĉe la inaŭguro de la "Ekspozicio pri la 70-jara Literatura Verkado de Bingŝin"

Ŝi diris al mi, ke ŝi, krom akcepti ĉinajn kaj alilandajn amikojn, ankaŭ verkas novelojn kaj eseojn. Vere ŝi senlace laboras en la

literatura ĝardeno.

Bingŝin ĉiam amas infanojn kaj ŝatas ĝui florojn. Rozo estas unu el la florplantoj plej plaĉaj al ŝi. Ŝi

laŭdas ĝin pro ĝiaj beleco, bonodoro kaj malmolaj dornoj. Ŝi diris: "Mi pensas, ke ankaŭ floroj devas havi sian spiriton kiel homoj!" Ŝi ofte vizitis la Rozo-kompanion Bejfang en la antaŭurbo de Pekino. Dum la lastaj du jaroj ŝi ne povis iri tien pro pieda malsano, kaj la kompanio periode sendas al ŝi florojn.

Informiĝinte, ke "El Popola Ĉinio" estas Esperanta revuo, ŝi ĝojĝis: "Kvazaŭ muro starus inter homoj, inter socioj, inter ŝtatoj kaj inter rasoj. Tio, kio povas ĝin transpasi kaj trapenetri, estas amo kaj simpatio. Esperanto, kiun parolas multaj homoj en la mondo, povas pli facile interkomuniki amon kaj simpatian."

Mi rigardis la maljunulinon kun profundaj faltoj sur la frunto kaj aŭskultis ŝiajn signifoplenajn vortojn, kaj en mian koron kvazaŭ enfluis refreŝiga fontakvo, neelĉerpebla fonto de amo, de saĝo. ■

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: unu internacia respondkupono por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: unu intern. resp. kup. por spaco de unu linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp-organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

- * Shangcheng E-Studio havas ĉinajn E-aĵojn, pm., gm., insignojn, k.t.p. kaj dez. interŝanĝi kun tm. Adr.: Zhang Xuesong, Changzhuyuan Lianguansuo, Shangcheng, Henan, Ĉinio.
- * 22-j. fraŭlo volas kor. kun gesamideanoj. Adr.: Wang Kun, Tuchan You'ai Cangku, Nanning, Guangxi, Ĉinio.
- * S-ro Zhu Baolong dez. kor. tm., kolektas kaj interŝanĝas filatelajojn pri Esperanto. ResponDOS certe. Adr.: 41 Huan Cheng Xi Lu, 310006 Hang-

zhou, Zhejiang, Ĉinio.

- * F-ino Lu Yongwen, 21-j., dez. kor. tm. pri ĉt., kolekti pm., pk., kaj bk. kaj interŝanĝi librojn kaj gazetojn. Adr.: Shui Lun Ji Chang, Shaoguan, Guangdong, Ĉinio.
- * Dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Adr.: Zheng Hui, Tai Bao Gong Xiao She, Lianshan, Guangdong, Ĉinio.
- * Internacia Koresponda Servo helpas al vi trovi korespondanton, amikino aŭ partnerino. Por pluaj informoj sendu unu internacian respondkupono al: Box 163 Stn. "A" Downsview, Ont. M3M 3A3 Canada.
- * Franco mezaĝa dez. ĉinan korespondanton pri ĉiuj temoj, ĉefe literaturaj. Bonvolu skribi al s-ro Antoine Scicluna, 21 rue Romain Rolland, 66190 Collioure, Francio.
- * Lernanto 16-j. dez. kor. pri sportaj temoj, interŝanĝi pk., bk. k.t.p. Adr.: Tar Robert, str.

Hutira Dezideriu, n-ro 19 Baia Mare, cod 4800, Rumanio.

- * W. Braspenningx, 48-j., dez. kor. kun ĉinaj esp-istoj. Adr.: 14, Nikkelstraat, 2008 Antwerpen, Belgio.
- * 32-j. fraŭlino, sekretariino serĉas leterkontaktojn tm. pri ĉiuj temoj. Gastigado eblas. ResponDO certa. Preferataj hobiaj: Vojaĝoj, aŭtomobilismo, bildkarto kaj vivo de fremdlandanoj. Adr.: Ewa Rybka, ul. Orbitalna 23/40, PL67-200, Glogow, Pollando.
- * 13-j. pioniro dez. kor. tm. kaj kolektas pk. kaj pm. Adr.: Ferenc Joth, Nagykallo, Szechenyi ut. 85, 4320, Hungario.
- * 32-j. kemiisto-sciencesploristo volas kor. tm. kun 15-90-j. samideanoj pri sciencoj, komputiloj, E-lingvo kaj movado, literaturo, ĉiutaga vivo kaj interŝanĝi librojn, revuojn kaj pm. Orlando Raola Gonzalez. Longa 220, apt. 5, Mantilla, 10900 La Habana, Cuba.

Destino

(Novelo)

Mano de giganto liberigis min el densa reto de sufoko kaj doloro, kaj mi faris la unuan tristan ploron.

Mi malfermis la okulojn kaj vidis, ke la mano de la giganto tenis min je la piedo, kun la kapo malsupren. Mi vidis ankaŭ, ke miaj rozetaj manetoj svingiĝis sub mia kapo.

La alia mano de la giganto subtenis min je la talio. Li ridete sin turnis al virino kuŝanta en blanka lito: "Gratulon. Kiel granda bebo!" Je la diro li atente metis min en malgrandan korbon tegitan per blanka tolo.

Mi pene rigardis eksteren kaj vidis, ke multaj flegistinoj en blankaj kitelo kaj kufo svarmis ĉirkaŭ la virino. Ŝia pala vizaĝo estis kovrita de ŝvitgutoj. Ŝi ĝemetis, kvazaŭ ŝi ĵus vekigis el koŝmaro. Ruĝaj ŝvelaj okuloj malvigle duonfermiĝis. Post la aŭdo de la informo de la doktoro movetiĝis la okuloj kaj elŝprucis larmoj. Ŝi tute trankviliĝis, fermis la okulojn ridete, lacaspekte, kaj diris: "Vi multe penis!"

Mi ploris laŭte: "Ho panjo, ne ili, sed ni penis. Ni ĵus barakte elturniĝis el morto!"

Senordaj flegistinoj en blanka kitelo silente elpuŝis la patrinon en rulbrankardo. Mi, alte levita, venis eksteren. La doktoro mangestis kaj viro venis de la alia ekstremo de la koridoro. Kun pala vizaĝo pro koŝmaro kaj, ankaŭ pro ĝojo, li time etendis la manojn, ŝajne li volis sed ne kuraĝis ĉirkaŭpreni min. Li fiksas sur mi karesan kaj surprizitan rigardon,

kaj la doktoro ekridetis: "Ĉu la bebo estas bona?" Li ĝeniĝe murmuris: "Kiel longa la kapo." Tiam mi subite eksentis akran doloron ĉe la kapo, kaj mi denove ploregis: "Ho paĉjo, ĉu vi ne scias, kiel dolore premita estis mia kapo?"

La doktoro ridis: "Ha terure, kiel laŭta voĉo!" Flegistino apude staranta ridete transprenis min.

Mi venis en grandan sunan ĉambbron. Laŭ la muroj viciĝis multaj blankaj korbolitoj, en kiuj kuŝis kamaradetoj. Iuj kviete dormis kun la manetoj ĉe la kapo, aliaj ploris, kriante: "Mi soifas!" "Mi malsatas!" "Tro varme!" "Mi pisis!" Sed la flegistino, kiu tenis min en la brakoj, kvazaŭ ne aŭdus, facilmove kaj kviete preterpasis ilin kaj iris en banĉambbron. Ŝi



metis min sur la ŝtonan tablon apud bankuvo, kun la kapo al la krano.

Varmeta akvo ŝprucis el duŝilo sur mian kapon, forlavis la sangon mukajon. Mi ektremetis de frosto kaj sentis refreŝigon. Mi turnis la rigardon flanken kaj vidis, ke sur ŝtona tablo trans la bankuvo kuŝas kamaradeto, kaj alia flegistino estas bananta lin. Lia kapo ronda, la okuloj grandaj, la haŭto bruna, kaj la forta brusto elstaranta. Li senbrue rigardis tra fenestro al la ĉielo. La flegistino levis min, apogis min je la ŝultro kaj dorso, kaj vestis min per longa blanka robo. Ankaŭ la kamaradeto estis vestita, kaj ni rigardis unu la alian trans la kuvo. Mia flegistino gaje diris al sia kolegino: "Kiel forta kaj granda estas via bebo, sed li estas malpli blanka, eleganta ol la mia!" Je tio la kamaradeto rigardis min, levante la kapon, ridetis ŝajne malestime kaj komplete.

Mi timide kaj softe salutis lin kaj li resalutis min en humileco. Tiam ni estis metitaj en du korbolitojn unu tuj apud la alia, dum la flegistinoj forestis.

Mi plendis: "Mia tuta korpo doloras al mi. Kiel dolora estis la barakto por mi en la lastaj 4 horoj. Kiel vi spertis?"

Li ridetis kaj diris al mi kun pugniĝintaj manetoj: "Mi sentis sufokiĝon nur en duonhoro. Mi ne suferis, ankaŭ mia panjo ne suferis."

Mi silentis, senfare vespiris kaj rigardis ĉirkaŭen. Li konsolis min, dirante: "Vi laciĝis kaj devas dormi, ankaŭ mi devas iom ripozi por refreŝigi min."

Malgraŭ mia dolĉa dormo oni portis min ĝis la vitrita pordo. En la koridoro ekster la pordo staris pluraj geknaboj kun nazo kaj manoj alpremitaj al la vitro, samkiel infanoj avide kaj envie rigardantaj kristnaskajn donacojn en montrofenestro. Ili gaje interparolis pri mi. Ili diris, ke miaj

brovoj similas al tiuj de onklino A, la okuloj al tiuj de onklo B, la nazo al tiu de onklo C kaj la buŝo al tiu de onklino D. Kvazaŭ ili volus dispecigi kaj engluti min.

Mi fermis la okulojn, tre volis skui la kapon, sed mi sentis doloron de la kolo, kaj mi ploregis: "Mi estas mi mem, al neniuj mi similas. Lasu min ripozi!"

La flegistino ekridis kaj portis min returnen. Mi vidis, ke ili senĉese returnis la kapon por rigardi min kaj foriris gaje interpuŝante.

Vekiĝis mia kamaradeto. Li alparolis min: "Vi vekigiĝis? Kiu venis rigardi vin?" Dum mi estis metata en mian korboliton, mi diris al li: "Mi ne scias, eble miaj junaj geonkloj. Ŝajne ili tre amas min."

La kamaradeto silentis momenton, kaj diris en rideto: "Kiel feliĉa vi estas. Ni estas ĉi tie jam du tagojn, sed mi ankoraŭ ne vidis mian patron."

Mi ne sciis, kiom longe mi pasigis en duondormo. Mi sentis, ke multe moderiĝis la doloro tra la tuta korpo. Sed malsekiĝis la litaĵo sub mi kaj mi imite ploris: "Mi pisis, mi jam pisis!" Tuj flegistino venis kaj prenis min el la lito. Mi ĝojiĝis, sed ŝi unue trinkigis min.

Ĉirkaŭ vespero svarme envenis 3-4 flegistinoj. Susuris iliaj malmolaj blankaj jupoj. Ili levis nin el la litoj kaj ŝanĝis por ni urintukon. La kamaradetoj tre ĝojis: "Baldaŭ ni vidos la patrinnon. Ĝis revido."

Mia kamaradeto estis elportita kune kun aliaj beboj en granda rullito. Tamen mi estis elportita en brakoj. Trairinte la vitritan pordon, mi venis en la unuan ĉambron dekstre de la koridoro. La patrino, kuŝanta en alta blanka lito, bonvenigis min per atenda kaj ĝoja rigardo. Flegistino metis min en ŝiajn brakojn, kaj ŝi honteme mallaĉis la veston. Ŝi aspektis tre

juna, la karbenigraj haroj estis kombitaj posten, kaj la kurbaj brovoj similis al lunarko. La pala vizaĝo kontrastigis la grandajn nigrajn okulojn, kaj en la milda lamplumo ŝi aspektis kiel ŝtona skulptaĵo.

Mi eksuĉis la mamon. La patrino alpremis sian vangon al miaj haroj, karesis miajn fingrojn, priirigardis min en ekstrema ekstazo kaj miro.

Mi suĉadis 20 minutojn, sed nenion mi elsuĉis. Mi, malsata, sentis doloron de la lango kaj lasis la cicon elbuŝiĝi, kaj mi ekploris de malkontento. La patrino konsterniĝis kaj senĉese skugetis min kun kareso: "Ho mia koro, ne ploru plu, ne ploru." Ŝi sonorigis kaj envenis flegistino. La patrino ridetis pardonpete kaj diris al ŝi: "Mi ne havas lakton kaj la infano ploras senĉese. Kion fari?" La flegistino ridetis kaj konsolis ŝin: "Nenio grava. Vi baldaŭ havos. Ĝi estas tro juna, kaj tio ne estas serioza por ĝi." Ŝi prenis min el la brakoj de la patrino kaj tiu bedaŭre forlasis min.

Kiam mi revenis en mian liton, mia kamaradeto jam enkuŝiĝis en sian liton. En dolĉa sonĝo, li ofte ridetis, kvazaŭ proklamante, ke li estas kontenta, ĝoja. Mi rigardis ĉirkaŭen kaj trovis, ke multaj kamaradetoj endormiĝis. Kelkaj, duonvekiĝintaj, zume ploris kelkfoje. Mi sentis akran malsaton, sed mi ne sciis, kiam la patrino povos doni lakton. Tio estis tre grava por mi, sed neniuj sciis pri tio. Vidante, ke ĉiuj aliaj dormis post sata suĉado, mi sentis ĵaluzon kaj humiligiĝon. Mi ekploris laŭte kun la espero vekati atenton. Sed flegistino venis post pli ol duonhoro. Karese frapetante sur min, ŝi diris paŭte: "Ve, via patrino ne sate nutris vin, nu, iom trinku." Ŝi ŝovis cicumon en mian buŝon, mi zume kaj singulte suĉadis kaj iom poste endormiĝis.

Dum bano en la sekvanta tago, mi kaj mia kamaradeto refoje

havis okazon konversacii, kuŝante ambaŭflanke de la kuvo. Li estis viglecplena. Klinate al bano, li skuis la kapon kaj duonfermis la okulojn. Li diris al mi en kontento: "Hieraŭ mi sate mamsuĉis. Mia patrino havas brunan rondan vizaĝon, tre belan. Mi estas ŝia kvina infano. Ŝi diris al flegistino, ke ŝi unuafoje akuŝis en hospitalo. Per tio ŝin favoris filantropia institucio. Mia patro, tre malriĉa, estas buĉisto, buĉas porkojn." Tiam guto da boracida solvaĵo falis en lian okulon. Li kolere kriis kelkfoje, pene malfermis la okulojn kaj diris daŭre: "Ho buĉisto! Kiel agrable, ke blankan ponardon oni enpikos kaj la sangtegitan eltiros! Kiam mi elkoreskos, mi estos buĉisto kiel la patro; mi buĉos ne nur porkojn, sed ankaŭ porkosimilajn homojn, kiuj nenion faras krom manĝi!"

Mi nur aŭskultis, kaj ĉe tiuj vortoj mi tuj fermis la okulojn kaj tenis min pli silente.

La kamaradeto demandis min: "Ĉu vi estas sata? Kiel fartas via patrino?"

Mi revigliĝis: "Mi nenion manĝis. Mia panjo ankoraŭ ne havas lakton. Flegistinoj diris, ke ŝi havos post unu aŭ du tagoj. Mia patrino estas tre bona. Ŝi scipovas legi. Stako da libroj staras sur la tableto apud ŝia lito, kaj sub la muroj estas multe da floroj."

"Kaj via patro?"

"Li ne venis, nur ŝi estas en la ĉambro. Ŝi ne parolis kun aliaj pri la patro, kaj mi ne povas scii pri li."

"Tiu estas unuaklasa ĉambro," mia kamaradeto diris en certeco, "ĉar ŝi sola okupas la tutan ĉambron. Sed en la ĉambro de mia patrino estas dekkelkaj litoj. Tie estas patrinoj de multaj kamaradetoj, kaj ĉiuj kamaradetoj sate manĝas."

En la sekvanta tago mi vidis mian patron. Kiam mi estis mamsuĉanta, li duonkuŝis apud la

patrino. Iliaj vizaĝoj estis tre proksimaj unu al la alia. Ili ambaŭ fiksas la rigardon sur mi. La patro estas malgraseta, la haŭto flaveta, sed la okulharoj tre longaj. Li aspektis pensema, kio faltetis lian frunton.

La patro diris: "Ĉi-foje mi rigardis pli detale. Ĝi estas tre bela, similas al vi!"

Ridete respondis la patrino, tenere karesante mian vangon: "Ĝi similas ankaŭ al vi, precipe la grandaj okuloj!"

La patro leviĝis, sidiĝis sur la seĝo apud la lito, tenis manon de la

patrino kaj delikate frapetadis ĝin: "Ni ne enuiĝos plu. Post leciondonado mi helpos vin en la flegado kaj amuzos lin; en ferioj mi portos lin al ekskurso. Li nepre devos esti fortika, sed ne malforta kiel mi. Mi estas sana, sed malforta..."

La patrino kapjesis: "Jes, li devos frue komenci lerni muzikon kaj pentrarton. Mi ne scipovas tiujn kaj ofte bedaŭras, ke la vivo ne estas perfekta! Kaj krome..."

La patro ekridis: "Kio li fariĝu? Ĉu literaturisto aŭ muzikisto?"

La patrino diris: "Ĉio estos



bona — ĝi estas knabo. Ĉinio bezonas sciencojn, do li prefere fariĝu sciencisto.”

Tiam mi estis malagrabilgita, ke mi ne povis elsuĉi lakton. Sed mi rimarkis, ke ili estis en plezura konversacio, kaj mi ne ploris por ne ĝeni ilin.

La patro diris: “Ni devas komenci plasi monon por lia edukado. Ju pli frue, des pli bone.”

La patrino diris: “Mi forgesis diri al vi, ke hieraŭ la frato promesis donaci al ĝi bicikleton en ĝia sesjara aĝo!”

La patro denove ekridis: “Ĝi ja ricevis ĉion. La fratino donacis la lulilon.”

La patrino forte ĉirkaŭpremis min karesante miajn harojn: “Mia koro, kiel feliĉa vi estas, ke tiel multaj homoj amas vin. Estu esperdona poste...”

En plena ĝojo mi revenis en mian liton. Malgraŭ la malsato, mi serĉis kaj trovis mian kamaradeton meditantan.

Mi alparolis lin ridetante: “Amiko, mi jam vidis la patron. Ankaŭ li estas tre bona. Li estas instruisto. Li ĵus interkonsiliĝis kun la patrino pri mia edukado. Mia patro promesas fari ĉion, kio utilos al mi. La patrino diris, ke ŝi ne havas lakton. Mi estos nutrata per laktopulvoro kaj poste per oranĝa suko kaj ankaŭ...” Mi menciis multajn nomojn de nutraĵoj per unu spiro.

La kamaradeto ridetis: “Kiel feliĉa vi estas. Baldaŭ mi estos demamigita post hejmenreveno. Hodiaŭ la patro venis kaj diris al la patrino, ke oni volas dungi ŝin kiel nutristinon. Mi foriros morgaŭ aŭ postmorgaŭ. Min vartos mia avino 60-jara. Mi manĝos rizan supon, rizfarunan kaĉon... Sed ĉiuj manĝaĵoj estas tutegalaj por mi.”

Mi silentiĝis, komplete malaperis mia ĝojo kaj mi sentis nur honton.



La okuloj de la kamaradeto radiis per fiereco kaj braveco: “Vi estos por ĉiam malgranda floro en potoj en forcejoj kaj delikate kreskos en konstanta temperaturo, protektate kontraŭ pluvo kaj vento. Dum mi estos herbeto apud vojo. Mi devos elteni ŝtormon kaj tretadon de homoj. Eble vi kompatos min, kiam vi vidos min, rigardante eksteren tra vitro. Tamen super mia kapo estos senlima ĉielo, kaj ĉirkaŭ mi neelĉerpebla freŝa aero. Liberaj papilioj kaj griloj kantas kaj dancos apud mi. Tiuj miaj kamaradoj apud vojo, bravaj kaj malrespektataj, estos neforbruligeblaj kaj forfalĉeblaj. Ili faros la tutan mondon verda malgraŭ la homa tretado!”

Mi volis plori pro afliktiĝo: “Sed mi tute ne volas esti tiel delikata!...”

La kamaradeto kun mieno de rekonsciiĝo mildigis la voĉon kaj konsolis min: “Jes, ni ne volas esti malsamaj unu al la alia, sed ĉio en la mondo apartiĝis nin. Ni atendu!”

Senĉese faladis grandaj neĝ-flokoj, sur la verdaj tegoloj aperis kelkaj neĝsulkoj. Mia patrino devis reveni hejmen antaŭtage de la nova jaro. Ankaŭ la kamaradeto devis forlasi samtempe kiel mi, ĉar lia patrino devis iri al la dunginto. Do restis nur duontago por nia kunesto. Ve, ni estis baldaŭ disiĝontaj, kaj kiam ni

povos renkontiĝi kaj kunesti post la disiĝo kaj droniĝo en la senlima, ĥaosa homa maro faranta konstantan rumoron?

Ni rigardiĝ unu la alian en bedaŭro pro la disiĝo. En nehela vesperkrepusko mi rimarkis, ke pli kaj pli grandiĝis la vizaĝo de la kamaradeto. La kunpremitaj lipoj, la kuntiritaj brovoj, la okuloj malproksimen rigardantaj, la iom elstara mentono... Ĉio konturis lian rezolutan kaj sentiman karakteron. "Li buĉos porkojn kaj ankaŭ homojn?" Ĉe tiu penso miaj manetoj moviĝadis sub la litkovrilo. Mi sentis, ke mi estas malgranda!

Reveninte de la patrinoj, ni interŝanĝis la informojn, ke ni forlasos morgaŭ, la unuan de januaro. Mia patro timis, ke la patrino ne povos bone ripozi hejme pro multaj aferoj antaŭ la novjara festo, dum la patro de la kamaradeto retenis ŝin plian tagon en la hospitalo pro la timo, ke la edzino estos sieĝata de kreditoroj devigantaj pagon, ĉar li mem devos sin kaŝi por eviti tiujn kreditorojn. Ha, ni povos kunesti plian tagon!

En noktomezo komenciĝis petardaj eksplodoj proksimaj kaj malproksimaj. Bojado en kontinua neĝado kvazaŭ diris al ni, ke la komplika vivo de la homoj venas al portempa paciĝo. Sufiĉe englutu, insultu kaj ploru antaŭvespere de la novjara tago, en kiu oni devos denove sin maski per humileco kaj kontenteco. En la bruo de eksplodado de sennombraj petardoj, en la obskuraj stratoj kaj stratetoj kaŝiĝis miloj da teruraj sentoj agitiĝantaj...

En timtremo mi rigardis al la kamaradeto. Li senparole mordis al si la malsupran lipon.—La nokto pasis kiel lirlanta roĵo. En la sekvanta mateno mi aŭdis en duondormo, ke la amiketo suspiris en la lito.

Estis plena tagiĝo. Du flegisti-

noj, en ĝojo pro la festo, venis kaj banis nin. Unu el ili malfermis mian kofron, vestis min per blanka ĉemizo el kardita tolo, longa veŝto kaj kimono. Poste ŝi aldonis verdetan lanan jakon, ĉapelon kaj ŝtrumpojn. Fininte la vestadon ŝi levis min kaj diris: "Kiel ĉarma vi estas. Kiel taŭge via patrino preparis por vi la vestojn!" Mi sentis suplecon kaj komfortecon, sed de varmo pro troaj vestoj mi volis plori.

Ankaŭ mia kamaradeto estis levita. Mi forte miris, ke mi preskaŭ ne povis rekoni lin! Li surportis malstrikatan dikan vatan jakon el blua nankeno, la manikoj tro longaj surhavis flikaĵojn kaj malnovajn stebojn. Malsupre li havis antaŭtukon el blua nankeno dekoloriĝinta. La brakoj estis rekte etenditaj, la kapo estis kaŝita en vata kapuĉo. Li aspektis kiel kajto. Mi rigardis teren kaj vidis, ke sur la planko estis du masoj da samaj blankaj vestoj, kiujn ni demetis. Subite mi estis trafita de frostotremo. Ni disiĝos por ĉiam, de tiam tute malsamaj estos niaj spirito kaj materio.

La kamaradeto rimarkis min kaj ekridetis ŝajne fiere kaj ankaŭ honte: "Kiel bele vi aspektas, kiel elegantaj kaj supraj viaj vestoj! Dum mi surhavas kirason, mi devos multe peni por mia ekzisto en la socia batalejo!"

La flegistinoj haste levis la blankajn vestojn kaj ĵetis ilin en korbon. Poste ili rapide portis nin eksteren. Ĉe la vitrita pordo mi ekploregis. Ankaŭ la amiko ne povis deteni sin de ploro. Ni senorde svingis manon kaj intersalutis: "Amiko, ĝis revido, ĝis!" Nia ploro fine neaŭdebligis reciproke ĉe ambaŭ ekstremoj de la koridoro.

La patrino jam finis tualetadon kaj staris ĉe la pordo. Apud ŝi staris la patro kun la kofro en mano. Vidinte min, la patrino etendis la manojn kaj transprenis min, pririgardis mian vizaĝon kaj forviŝis miajn larmojn. Ŝi premis

min al si kaj diris: "Ho mia koro, ne ploru, ni iros al hejmo, feliĉa hejmo. Panjo amas vin, paĉjo amas vin!"

Oni alpuŝis rulseĝon. La patrino volvis min en verdetan karditan kovrilon kaj sidiĝis en la seĝon kune kun mi. La patro sekvis la seĝon. Dirinte adiaŭon kaj dankon al la doktoro kaj flegistino, ni malsupreniĝis per lifto.

Tra la vitraj suproj de pordklapoj mi vidis aŭton ekstere. La patro malfermis la pordon, kaj vento enblovis neĝajn flokojn. La patrino tuj kovris mian vizaĝon. Ŝajne ni descendis de la rulseĝo, trairis la pordon kaj sidiĝis en la aŭto. La pordo de la aŭto fermiĝis kun bruo. La patrino forŝovis la kovrilon de mia vizaĝo kaj mi vidis sennombrajn florojn en la aŭto. Mi kuŝis en la sino de la patrino, dum la gepatroj ambaŭflanke de mi alpremis sian vangon sur la miajn.

La aŭto malrapide trairis la pordon de la hospitalo. Surstrate interpuŝiĝis rikiŝoj. Kiam ili penis cedi vojon al la aŭto, mi subite rimarkis la kamaradeton, kiu kunestis kun mi en dek tagnoktoj. Li estis en la brakoj de la patro, kaj lia patrino portis pakaĵon de blua ŝtofo. Ili staris ĉe la pordo kun la dorso direkte al ni. Lia patro surhavis nigran feltan ĉapon kun larĝa viziero kaj vatan robon el nigra ŝtofo. Sub tiu viziero, mia amiketo apogis sin sur lia ŝultro kun la vizaĝo direkte al mi. Neĝo falis sur liajn frunton kaj vangojn. Li forte fermis la okulojn kaj montris amaran kaj tamen fieran rideton... Li jam komencis sian batalon...

La aŭto fluge veturis. Flirtadis neĝeroj. Mi apenaŭ aŭdis neklaritan novjaran tamburadon. La patrino flustris ĉe mia orelo: "Mia koro, rigardu, kiel paca kaj pura mondo!"

■ Mi ekploris.

Esperantigis Ŭang Sen

Ĉu vi volas koni Tibeton?

BV. LEGI LA NOVE APERINTAN ALBUMON EN ESPERANTO

TIBETO SUR LA MONDA TEGMENTO




Tibeto, konata kiel mistera loko, allogas multajn personojn en la mondo. Antaŭ nelonge la Ĉina Esperanto-Eldonejo eldonis la albumon dediĉitan al tiuj, kiuj interesiĝas pri Tibeto.

La albumo fidele kaj detale konigas Tibeton. La aŭtoroj vivis longe en Tibeto kaj havas profundan konon pri ĝiaj pasinteco

kaj nuntempo. Ili fosis en historiaj materialoj, multon spertis kaj faris esplorojn kaj vizitojn tie, kaj tial ili povas bone prezenti en la albumo la pasintan vivon de tibetanoj sur la antikva teritorio kaj ilian rapidan progreson en la nuntempo. La albumo helpas koni la historion, geografion, ekonomion, kulturon, morojn, religian kredon kaj popolan vivon de Tibeto.

Bindita, 187 × 260 cm., 132 pĝ. kun 72000 ideogramoj kaj 140 koloraj bildoj (85-Es-316D)

Mendu ĉe: Perantoj de EPC
aŭ: Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio
(GUOJI SHUDIAN), Esperanta Sekcio, P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio



En perplekseco

DE BAJ SANĈENG

ĈINAJ KSILOGRAFAĴOJ

de ŬANG ŜIUĈIN

La arto de ksilografajoj de Ĉinio havas historion de pli ol 1 000 jaroj. Jam en Tang-dinastio (618-907) Ĉinio havis delikatan ksilografie presitan budhoportreton. La ksilografia ilustraĵo sur la titolpaĝo de Vajro-sutro farita en la jaro 868, malkovrita en la jaro 1900 en Mogaŭŝtonkavernaro de Dunhŭang, Gansu-provinco, Ĉinio, impresas per lerta tekniko kaj fortaj strekoj. Ĝi estas la plej frua ksilografajo nun konservata en Ĉinio.

En Song-dinastio (960-1279) komerco kaj meti-industrio disvolviĝis pluapase. Nemalmultaj lokoj kaj privataj librovendejoj entreprenis ksilografian presadon, tiel ke ksilografia presarto pli kaj pli perfektigis kaj ksilografajoj prosperigis senprecedence. Krom bildoj pri religio, estis ankaŭ multaj ilustraĵoj por libroj.

La unuopa ornama ksilografajo "Kvar Belulinoj" de Ĝin-dinastio (1115-1234) reliefe figuras belulinojn Ŭang Ĝaŭĝjun, Ban Ĝji, Ĝaŭ Fejjan kaj Lju Ĝu de la antikva Ĉinio. Ĉiu figuro, en vestoj kun kompakta linioj,

karaktizigas per preciza proporcio de korpopartoj, versimila aspekto kaj eleganta vizaĝo. La nigra bildo estas presita sur flava papero, borderita per ĉarmaj randoj kun du *feng*-oj (birdo en ĉina mito) kaj floroj.


Estas nemultaj ksilografajoj de Ĵuan-dinastio (1206-1368) nun konservataj en Ĉinio. Tamen inter ili troviĝas ilustraĵoj super tekstoj por literaturaj verkoj. Ekz-e. la ksilografajo "Kvin Popularaj Rakontoj de Ju-familio" estas farita en tia formo. Ĝi distingiĝas per delikata kaj forta grifelado, kompakta strukturo, granda

bildo-kontinueco kaj tipa stilo de epoko.

En Ming-dinastio (1368-1644), heredinte la tradicion de ksilografio de la antaŭaj dinastioj, pentristoj kaj ksilografoj kunlabore aplikis polikromian ksilografion kaj altigis la arton. Ĉar tiam aperis teatraj romanoj, librokomercistoj aldonis al libroj ilustraĵojn por faciligi vendadon, kio multe prosperigis la arton de ksilografado. Ili serioze studis la ksilografian presarton por levi la kvaliton de ksilografajoj, tiel ke la ksilografiaj ilustraĵoj fariĝis la ĉefa formo de ksilografajoj. La tiamaj



"Kvar Belulinoj"
(Ĝin-dinastio)



El "Virinaj Rakontoj" (Ming-dinastio)



Nokta festeno (Ming-dinastio)

dramoj kaj romanoj preskaŭ ĉiuj havis belajn ilustraĵojn. Ekz-e, estas dekoj da ilustraĵoj en la dramo "La Okcidenta Ĉambro". La libro "Virinaj Rakontoj" k.a., kiuj prenas ilustraĵojn kiel la ĉefan parton, estas monumentoj de la dinastio. Laŭ statistiko, en diversaj dinastioj de Ĉinio estis pli ol 4 000 ilustritaj libroj, kies duono apartenas al Ming-dinastio.

Tiutempe polikromio rapide progresis. Oni eldonis grandan nombron da albumoj de modelaj, surleterpaperaj kaj inkaj desegnaĵoj kaj inventis presadon similan al tipografio. Kaj la uzata polikromia ksilografio estas arto presi per pluraj platoj por fari subtilan efekton de plataj koloroj. La famaj "Surleterpaperaj Desegnaĵoj de Siĝuĝaj" kaj "Modelaj Desegnaĵoj de Siĝuĝaj" estis faritaj per la presado. Ili, kiel artaj monumentoj de la dinastio, karakteriziĝas per fresaj koloroj, klaraj strekoj kaj delikata farbado. Post la jaro 1522 nemalmultaj eminentaj pentristoj faris ksilografiajn ilustraĵojn, inter kiuj la ilustraĵoj "Naŭ Odoj" kaj "Ĉe Akvorando" faritaj de Ĉen

Honghuan, pentristo de la lasta periodo de Ming-dinastio, estis rigardataj kiel raraj verkoj. Kun riĉa imago, perfekta figurado kaj kaŝa karaktero de personoj, ili ensorbis en sin la fortajn punktojn de pentraĵoj kaj lignogravuraĵoj de Tang- kaj Song-dinastioj, kio plifortigis la artan efekton de la ksilografiaĵoj kaj vigligis la spiriton de la herooj en la verkoj.


El la modelaj desegnaĵoj de diversaj dinastioj de Ĉinio la plej ĉefaj estas "Desegnaĵoj de Gu" kaj "Desegnaĵoj por Poemoj de Tang-dinastio".

Fine de Ming-dinastio kaj komence de Ĉing-dinastio (1644-1911) prosperiĝis ksilografiaj novjaraj bildoj. Aplikante la arton de ksilografado, popolaj artistoj prezentis bildojn simbolantajn bonaŭguron, longvivecon, harmonian vivon kaj feliĉon, kaj ankaŭ teatrajn figurojn kaj popolajn ĝenrojn, por ke oni algluu ilin al muroj por gajigi la novjaran feston. Tiaj bildoj, tre taŭgaj por ornamado, havas fortan vivetoson, lokan guston kaj varian stilon. La ĉefaj produktaĵoj de tiaj bildoj estas Jangliučing de


Tjanĝin, Taŭhŭa'u de Suĝoŭ kaj Ŭejfang de Ŝandong. La ksilografiaĵoj de Taŭhŭa'u estas nomataj ankaŭ ksilografiaj novjaraj bildoj. Ili havas bazajn kolorojn klarajn, densajn kaj modestajn. Ili estas lerte farbitaj ruĝe, flave, blue kaj purpure. Per forta kontrasto de koloroj la artistoj vidigas ilian harmonian stilon kaj sentigas klarecon kaj lakonecon, kio reliefigas la trajtojn de la presado. Por kopii tiajn bildojn, oni miksas kun akvo travideblajn farbojn aŭ inkon kaj farbojn por ĉinstila pentraĵo, ŝmiras per la miksaĵo penetreblan *ŝjŭan*-paperon (bonkvalita papero por ĉina pentrado kaj kaligrafado) kaj uzas la paperon, dum ĝi estas malseka. La kopiitaj bildoj estas kolore harmoniaj kaj bone aranĝitaj. Ekz-e, "Ŝtelo de Magiaj Herboj", "Eksplozigo de Petardo Anoncas Bonaŭguron" k.a. de Ĉing-dinastio estas tre raraj bildoj de tiu speco.

En la komenca tempo de Ĉing-dinastio furoris popolaj ksilografiaĵoj. Ekz-e, la albumo "Pentraĵoj de Ĝzejjŭan", presita per polikromia ksilografio, jam atingis sian kulminon en gravur-arto kaj

Antikvaj ksilografiaĵoj de Ĉinio



Ilustraĵo en Vajra-sutro
 (Tang-dinastio)



Ilustraĵo en "La Okcidenta Ĉambro"
 (Ming-dinastio)



Ilustraĵo por poemo de Tang-dinastio (Ming-dinastio)



Patrino amo (Ĉing-dinastio)

Liŭ Haj kaj Oraĵo (Ming-dinastio)


松之精東
華之英
我邦家
萬其慶



三松筆



隆慶壬申十月同州摹刻



Longevivulo
(Ming-dinastio)

polikromio. En la posta periodo de la dinastio la moderna presarto estis enkondukita en Ĉinion, tiel ke la arto eldoni librojn kun ksilografiaj ilustraĵoj malprosperiĝis jaron post jaro.

En la komenco de la 30-aj jaroj de la nuna jarcento, granda ĉina literaturisto Lusin iniciatis kampanjon por novaj ĉinaj ksilografiaĵoj kaj samtempe enkondukis en Ĉinion eŭropajn metodojn fari ksilografiaĵojn. Kaj la moderna arto iom post iom disvolviĝis en Ĉinio. En la komenco la arto estis influata de Japanio kaj Germanio kaj en formo kaj en tekniko, tamen la verkoj temas pri Ĉinio, en nacia gusto, kun animskua forto. Ekz-e, la ksilografiaĵo "Hurlu, Ĉinio!" de fama artisto Li Hŭa havas kompaktan strukturon

kaj krudajn strekojn, ne limiĝas je lumo, prezentas la belecon de forto propran al lignogravuraĵo kaj donas grandan edifon. En la 40-aj jaroj, en la liberigitaj regionoj de Ĉinio aperis nova stilo de ksilografiaĵoj karakterizitaj per klareco, populareco kaj nacia gusto.

En la komenca tempo de la 50-aj jaroj, surbaze de la revolucia realismo, la ĉinaj ksilografiaĵoj varme prikantis la novan socion. Kun pli da esprimmanieroj ili faris pli grandan impeton kiel en kvalito, tiel ankaŭ en kvanto de polikromiaj ksilografiaĵoj kaj nigra-blankaj lignogravuraĵoj. En la lastaj jaroj la ĉinaj ksilografiaĵoj, prenante diversajn temojn, stilojn, formojn, materialojn kaj teknikojn, pli maturigis la arton kaj pli

levis la esprim-povon. Ili penis malkovri kaj uzi novajn materialojn kaj instrumentojn por serĉi novajn esprimojn kaj metodojn, kio riĉigis la arton de ksilografado kaj malfermis novan estetikajn terenon de ksilografiaĵoj. La verkoj entenas pli da entuziasmo de artistoj, kiuj klopodas atingi miksiĝon de sento kaj pejzaĝo enkorpigita de bildo kaj per arta efeto de sento rompi monotonan esprimon en verkado de ksilografiaĵoj dum multaj jaroj. La verkoj montras ne nur la personecon de artistoj, sed ankaŭ la spiriton de la epoko. ■

Rimarko: la koloraj bildpaĝoj en du partoj, antikva kaj moderna, por tiu ĉi artikolo trovas lokojn respektive en tiu ĉi kaj la sekvanta numeroj.

Li Mjaŭhuj (Ming-dinastio)



VULPA FEINO ĴEN ŜI

de ŜEN ĜJĜJI

Ŭej Jin, la naŭa filo de filino de Li Huj, princo de Ŝin'an, estis senbride diboĉa kaj drinkema en la juna aĝo. Ĝeng, la edzo de lia kuzino, estis la sesa granda en sia familio. Li lernis luktarton junaĝe kaj ŝatis drinkadon kaj voluptuon. Li estis malriĉa kaj vivtenata de la edzina parenco. Ĝeng kaj Ŭej Jin fariĝis nedisigeblaj amikoj ĉu en ekskurso ĉu en la ĉiutaga vivo. En la sesa monato de la 9-a jaro (750 p.K.) de la erao Tjanbaŭ. Ŭej Jin, en akompano de Ĝeng, promenis en la ĉefurbo Ĉang'an kaj volis iri al la kvartalo Ŝinĉang por drinki. Veninte suden de la kvartalo Ŝjŭanping, Ĝeng petis portempan forlason, pretekstante privatan aferon, kaj ili interkonsentis renkontiĝi poste en la drinkejo. Ŭej rajdis sur blanka ĉevalo orienten. Ĝeng rajdis sur azeno suden al la norda pordo de la kvartalo Ŝengping.

Survoje Ĝeng vidis tri knabinojn irantaj, inter kiuj estis ĉarma knabino en blankaj vestoj. Li miris pri ŝia beleco, yipis sian azenon jen antaŭen, jen malantaŭen, kaj volis diri flirtemajn vortojn, sed iom skrupule. La blanke vestita knabino okulumis al li de tempo al tempo, kvazaŭ ŝi volus akcepti lian amon. Ĝeng diris ŝerce:

“Kial piediras tiel bela knabino?”

“Havante azenon, vi ne scias servigi ĝin al mi. Kion fari se ne piediri?” ridetis la knabino.

“Mia malbona rajdobesto ne taŭgas por servi al belulino. Nun mi donas ĝin al vi kaj volonte piediros malantaŭe,” diris Ĝeng.

Li kaj ŝi rigardis unu la alian kun rideto. Ankaŭ ŝiaj du servistinoj estis infektitaj. Baldaŭ ili fariĝis tre familiaraj. Ĝeng sekvis la knabinojn orienten. Kiam ili atingis la ĝardenon Lejoŭ, jam vesperiĝis. Tie staris alta domo kun granda pordo. “Atendu momenton!” diris al li la blankevestita knabino, antaŭ ol eniri la domon. Servistino gardanta ĉe la

pordo demandis pri lia nomo. Ĝeng diris sian nomon kaj faris al ŝi saman demandon. Ŝi diris, ke ŝi nomiĝas Ĵen Ŝi kaj estas la dudeka infano de sia familio.

Momenton poste oni invitis lin en la domon. Li ligis sian azenon ĉe la pordo kaj metis sian ĉapon sur la selon. Eliris por bonvenigo pli-ol-30-jara virino, pliaĝa fratino de Ĵen Ŝi. Oni bruligis kandelojn kaj surtabligis pladojn. La mastrino proponis al li vinon foje refoje. Baldaŭ Ĵen Ŝi eliris alivestite. La knabino kaj Ĝeng drinkis gaje ĝis profunda nokto. Ambaŭ dormis sur sama lito. Ĝeng trovis, ke ŝiaj beleco, kantado, rideto kaj konduto estas nekompareblaj en la homa mondo. Antaŭ la tagiĝo Ĵen diris: “Vi devas foriri. Miaj fratoj estas membroj de la reĝa konservatorio kaj servas en la suda reĝa gvardio. Ni eliros ĉe la tagiĝo. Vi ne devas resti longe.” Post interkonsento pri rendevuo Ĝeng foriris.

Elirinte, Ĝeng venis al la kvartala pordo, sed ĝi estis fermita. Apud la pordo troviĝis vendejo de bakitaj farunaĵoj, kun lanterno lumanta kaj forno brulanta. Ĝeng sidiĝis ĉe tablo por atendi malfermiĝon de la pordo kaj babilis kun la mastro. Montrante sian tranoktejon, Ĝeng demandis: “Al kiu apartenas la domo en oriento?”

“Ĝi estas ruino, ne loĝdomo,” diris la mastro.

“Mi ĵus preterpasis ĝin,” insistis Ĝeng. “Kial vi diris, ke ne estas domo?”

La mastro ekkomprenis, “Ha! Mi scias!” li eksplikis. “Tie vivas vulpa feino, kiu ofte logis virojn tranokti. Tion mi vidis trifoje. Ĉu ankaŭ vi renkontis?”

Hontante konfesi la veron, Ĝeng kapneis. Je la tagiĝo li refoje iris rigardi la loĝejon kaj vidis, ke la tera muro kaj impona pordo restas kiel antaŭe. Li rigardis internen kaj vidis sovaĝejon kun vepro.

Reveninte, Ĝeng renkontiĝis kun Ŭej, kiu riproĉis lin, ke li ne iris al la rendevuo. Li tenis la sekreton, pretekstante ion alian. Rememorante ŝian belecon, li deziris ŝin revidi kaj tenis tion en la koro. Post dek tagoj li promenis al la Okcidenta Bazaro kaj iris en vestovendejon. Li subite vidis Ĵen Ŝi, kiun akompanis la antaŭaj servistinoj. Li tuj vokis ŝin. Ŝi haste sin kaŝis en homamaso por lin eviti. Li vokis plu kaj postkuris ŝin. Ŝi turnis la dorson al li, ŝirmis la vizaĝon per ventumilo kaj diris: "Vi jam konas min, kial vi ankoraŭ sekvas min?"

"Kio gravas eĉ se mi scias?" demandis Ĝeng.

"Mi sentas honton antaŭ vi," ŝi respondis.

"Mi tiom amas vin, ĉu vi toleras forlasi min?"

"Mi ne kuraĝas forlasi vin, sed nur timas, ke vi abomenos min."

Li ĵuris al ŝi per sincera tono. Ŝi sin returnis kaj mallevis la ventumilon. Antaŭ li staris rava belulino kiel antaŭe.

"Estas multaj vulpaj feinoj kiel mi," ŝi diris. "Vi ja ne konas ilin. Tial vi miris pri tio."

Ĝeng petis ŝin kune ripeti la ĝuon kiel en tiu nokto. Ŝi diris: "Vulpaj feinoj havas malbonan famon pro tio, ke ili ofte damaĝas virojn. Sed mi ne tiel kondutas. Se vi ne abomenas min, mi volonte servos vin dum mia tuta vivo." Kiam Ĝeng konsentis serĉi loĝejon, ŝi sugestis: "Oriente vi trovos domon kun granda arbo. Ĝi estas kvieta kaj luebla. En tiu tago, kiam mi renkontis vin, alia sinjoro rajdis sur blanka ĉevalo orienten el la suda parto de la kvartalo Ŝĵuanping. Ĉu li ne estas kuzo de via edzino? Li havas diversajn meblojn, kiujn vi povas pruntepreni."

Onkloj de Ŭej Jin oficeis en diversaj lokoj. Iliaj mebloj estis konservataj en domoj en liaj tri kortoj. Laŭ la ordono de Ĵen, Ĝeng venis al la domo de Ŭej Jin por pruntepreni meblojn. Demandite pri la uzo, Ĝeng diris, ke li ĵus akiris belan fraŭlinon, jam luprenis loĝdomon kaj volas pruntepreni meblojn por ĉiutaga uzo.

"Belulinon, ĉu vere!" Ŭej ridetis. "Laŭ via aspekto, vi akiris certe monstran virinon!"

Ŭej pruntedonis al li kurtenojn, liton, maton kaj aliajn objektojn kaj samtempe sendis saĝan kaj ruzan serviston por subrigardi. Baldaŭ la servisto kuris returne, ŝvitante kaj anhelante. "Ĉu vi vidis?" Ŭej demandis. "Al kiu ŝi similas?"

"Mirinde! Mi neniam vidis tiel belan fraŭlinon!"

Ĉar Ŭej havis multajn boparencojn, ŝatis ekskurson kaj aktivadon en grupo, li konis multajn



belulinojn. Li eldiris la nomojn de pluraj belaj knabinoj por kompari ilin kun la belulino de Ĝeng.

"Nekompareble!" diris la servisto. La bofratino de Ŭej, la sesa filino de la princo de U, estis senkompare bela. "Ĉu estas komparebla kun ŝi la sesa filino de la princo de U?" Ŭej demandis.

La servisto respondis, ke ankaŭ ŝi estas multe malpli bela.

"Ĉu ekzistas tia belulino en la mondo?" Ŭej surpriziĝis, ordonis pretigi akvon, lavis la vizaĝon kaj kolon, portis kaptukon, ŝmiris la lipojn kaj iris al la domo de Ĝeng.

Apenaŭ Ŭej atingis la lokon, Ĝeng foriris. Enpaŝinte la domon, Ŭej vidis servisto-knabon balaanta, servistinon ĉe la pordo kaj neniun alian. Li demandis la servisto-knabon. Ĉi tiu kapneis ridetante. Ŭej ĉirkaŭrigardis la domon kaj vidis parton de ruĝaj vestoj sub la pordoklapo. Li aliris kaj esploris. Li trovis knabinon kaŝita post la pordoklapo, elkondukis ŝin kaj vidis ŝin multe pli bela ol la menciita. Kun pasio Ŭej ekamis ŝin, prenis ŝin en siajn brakojn kaj intencis atenci ŝian pudoron, sed ŝi rezistis. Li forte premis ŝin, tiam ŝi maltrankviliĝis: "Vi povos akiri la deziratan, sed lasu min trovi la spiron." Kiam Ŭej ne uzis la forton, ŝi rezistis denove. Tio ripetigis plurajn fojojn. Ŭej denove alpremis ŝin al si. Ŝi senfortiĝis, ŝvitis pluve, pensis, ke ŝi ne povas eviti la perforton, kaj forlasis la reziston. Ŝia vizaĝo paliĝis.

"Kial vi estas tiel malĝoja?" li demandis.

“Mi kompatas Ĝeng kun mia tuta koro,” ŝi ĝemis.

“Kion signifas via diro?” li demandis.

“Kun forta korpo Ĝeng ne povas protekti virinon. Kia viro! Vi vivas kavalire kaj lukse en la juna aĝo, posedas plurajn belulinojn kaj vidis multajn knabinojn kiel mi. Sed Ĝeng, malriĉa kaj humila, nur mi estas por li fierinda. Kun abundo vi volas prirabi aliulon en mizero? Ĝeng estas malriĉa, ne povas vivi memstare, liaj vestoj kaj manĝaĵoj dependas de vi, li estas ĉiam sub vi. Se li vivus ne tiel mizere, li ne falus en la nunan staton.”

Ŭej estis kavalira kaj justama. Aŭdinte la vortojn, li tuj lasis ŝin. Li ordigis sian baskon kaj respektoplene petis ŝian pardonon: “Mi ne plu kuraĝos.” Baldaŭ Ĝeng revenis. La du viroj babilis gaje. De tiam Ŭej liveris al Ĵen ĉiujn vivbezonaĵojn.

Ĵen ofte iris al Ŭej. Ili vizitis unu la alian jen per kaleŝo, jen per ĉevalo, jen per palankeno, jen simple piedire. Li pasigis preskaŭ ĉiun tagon kun ŝi. Ili fariĝis plej bonaj amikoj kaj ĝuis grandan ĝojon. Pro tio ŝi donis al li ĉion escepte de amoro. Kaj li amis kaj respektis ŝin, avaris al ŝi nenion kaj ne forgesis ŝin ĉu en drinkado ĉu en manĝado. Konante lian amon, ŝi diris al li: “Mi hontas akcepti vian tro multan favoron. Mi neniel povas rekompenci vian grandan komplezon. Kaj mi ne povas ankaŭ perfidi Ĝeng, tial mi ne povas plenumi ĉiujn viajn postulojn. Mi naskiĝis en Ŝenŝji kaj kreskis en la ĉefurbo. Miaj familianoj estas aktoroj, multaj el miaj kuzinoj estas kromedzinoj de altranguloj kaj riĉuloj. Pro tio mi bone konas la bordelojn kaj similajn domojn en la ĉefurbo. Se vi ŝatas, sed ne sukcesis akiri belulinon, mi helpos vin. Mi volonte per tio rekompencos vian favoron.” Ŭej akceptis ŝian proponon.

Vestovendistino Ĝang en la bazaro ravis Ŭej per sia ĉarma aspekto. Li demandis Ĵen, ĉu ŝi konis la vendistinon. Ŝi respondis: “Ŝi estas mia kuzino. Mi povos facile kontentigi vin.” Post dek tagoj ŝi kondukis la knabinon al Ŭej. Post kelkaj monatoj, Ŭej laciĝis. Ĵen diris: “Bazaraj knabinoj estas facile akireblaj. Mi ne povas elvolvi mian kapablon de servo. Bonvolu menci i aliajn ĉarmajn knabinojn malfacile akireblajn, mi volonte faros por vi plej grandan klopodon.”

“En la festo Hanŝi antaŭ kelkaj tagoj,” diris Ŭej, “mi ekskursis kun kelkaj amikoj al la templo Ĉjanfu kaj vidis orkestron aranĝitan de generalo Djaŭ en la halo. Tie troviĝis knabino en la aĝo de ĉ. 16 jaroj kun du bukloj ĉe la oreloj, ludanta ŝeng-on (blovinstrumento). Ŝi havas ravan aspekton. Ĉu vi konas ŝin?”

“Ŝi estas favoratino de la generalo.” Ĵen


respondis. “Ŝia patrino estas mia kuzino. Mi provu.”

Ŭej riverencis al ŝi. Ŝi promesis doni helpon. Ŝi do ofte vizitis la generalon. Pasis pli ol unu monato. Ŭej urĝe demandis ŝin pri la afero. Ŝi postulis de li du rulojn da silkaĵo por subaĉeto. Ŭej donis tiom. Post du tagoj, dum Ĵen kaj Ŭej estis en manĝado, la generalo sendis intendanton kun nigra ĉevalo inviti Ĵen al lia domo. Informiĝinte pri la alvoko, Ĵen diris al Ŭej ridetante: “Sukcesis la afero.” Ĵen unue malsanigis la knabinon, al kiu nenia kuracilo helpis. La patrino de la knabino kaj la generalo estis tre maltrankvilaj kaj intencis peti konsilon de sorĉkruacisto. Ĵen sekrete subaĉetis la sorĉkuraciston kaj postulis, ke ĉi tiu sugestu, ke ŝia loĝloko taŭgas por forigi la malfeliĉon.

Kiam la sorĉkuracisto estis alvokita por rigardi la malsanulinon, li diris al la generalo: “La knabino ne devas resti en la hejmo, sed loĝi en domo sudoriente por ŝanĝi la medion.” La generalo kaj la patrino de la knabino esploris la lokon kaj trovis, ke tie estas la loĝejo de Ĵen. La generalo do petis ŝian konsenton akcepti la knabinon en la hejmo. Ĵen afekte rifuzis, pretekstante malvastecon de sia loĝejo, kaj konsentis nur post lia insista peto. Tiam la generalo veturigis la knabinon per kaleŝo al la domo de Ĵen, akompanatan de sia patrino kun vivbezonaĵoj. Atinginte la loĝejon de Ĵen, la knabino resaniĝis. Post kelkaj tagoj Ĵen sekrete kondukis Ŭej al ŝi. Unu monaton poste ŝi gravediĝis. Tiam ŝia patrino ektimis kaj tuj revenigis la knabinon al la generalo. Tiel finiĝis la afero.

Lun tagon Ĵen diris al Ĝeng: “Ĉu vi povos pruntepreni kvin aŭ ses mil monerojn? Mi profitigos vin.”

Ĝeng eliris kaj prunteprenis ses mil monerojn. Ŝi diris al li: “Iru al la bazaro. Kiam oni vendos ĉevalon kun cikatro sur la postaĵo, aĉetu ĝin.”



Ĝeng iris al la bazaro, vere vidis iun kondukanta ĉevalon por vendi. Sur ĝia maldekstra gluteo troviĝis cikatro. Ĝeng aĉetis ĝin kaj kondukis ĝin hejmen. Liaj bofratoj mokis lin: “Ĝi estas forjetita bruto, por kio vi ĝin aĉetis?”

Poste Ĵen diris al Ĝeng: “Estas tempo por vendi la ĉevalon. Kontraŭ ĝi vi povos ricevi 30 mil monerojn.” Li do kondukis la ĉevalon al la bazaro por vendi. Iu proponis dudek mil monerojn, Ĝeng ne vendis.

Ĉiuj homoj en la bazaro miris: “Kial unu proponis tiel altan prezon kaj la alia rifuzis?”

Ĝeng rajdis sur la ĉevalo hejmen. Ankaŭ la kliento sekvis lin ĝis lia pordo kaj iom post iom levis la prezon al 25 mil moneroj. Ĝeng ne konsentis kaj insistis pri 30 mil moneroj. Liaj bofratoj venis kaj insultis lin. Li devigite vendis la ĉevalon kontraŭ apenaŭ 30 mil moneroj.

Poste li kaŝe sekvis la aĉetanton por informiĝi, kial li aĉetis altpreze. Li trovis, ke la viro estas ĉevalisto de Ĝaŭjing-gubernio kaj unu el liaj ĉevaloj kun nigra makulo sur la postaĵo mortis tri-jara. Li devis baldaŭ ekŝigi kaj pagi 60 mil monerojn por la mortinta ĉevalo. Se li aĉetis la ĉevalon kontraŭ 30 mil moneroj, li povis ŝpari multe. Krome, li gajnis la pagon pro la trijara furaĝo. Tial li insistis en la aĉeto.

Foje Ĵen petis de Ŭej vestojn pro eluziĝo de siaj vestoj. Ŭej intencis aĉeti por ŝi rulon da silkaĵo, sed ŝi diris, ke ŝi volas pretigitajn vestojn. Ŭej alvokis Ĝang Da, donis al li la taskon kaj ordonis, ke li intervidiĝu kun Ĵen kaj demandu ŝin, kiajn vestojn ŝi ŝatas. Vidinte Ĵen, Ĝang Da mire diris al Ŭej: “Ŝi

estas ĉarmega kaj akirita de via moŝto. En la homa mondo ne devas esti tia belulino. Tuj revenigu ŝin, ke ŝi ne estigu plagon.” Ŝia beleco atingis eĉ tian gradon.

Ili ne komprenis, kial ŝi insiste petis pretigitajn vestojn, sed ne volis mem kudri ilin.

Unu jaron poste, Ĝeng estis nomumita kapitano de Hŭajli-prefektujo en Ĝinĉeng. Tiam li havis edzinon, tage ekskursis kun sia amoro kaj nokte revenis hejmen. Li bedaŭris, ke ili ne povas ĉiam vivi kune. Antaŭ ol iri al la ofico, Ĝeng petis Ĵen akompani, sed ŝi rifuzis.

“Vi vojaĝos nur malpli ol unu monaton,” ŝi diris. “Tio ŝajnas apenaŭ valora. Estas pli bone, ke vi donu al mi vivbezonaĵon antaŭ via foriro, kaj lasu min atendi hejme ĝis via reveno.” Ĝeng insistis, sed Ĵen estis pli firmvola. Tiam Ĝeng devis peti pruntedonon de Ŭej, ankaŭ Ŭej alvenis por persvadi ŝin kaj demandis ŝin pri la kaŭzo. Post longa hezito ŝi respondis: “Sorĉisto diris al mi, ke se mi ĉi-jare iros okcidenten, mi renkontos malfeliĉon. Tial mi ne volas iri tien.”

Sed Ĝeng estis tre avida al ŝi kaj pensis pri nenio alia. Ambaŭ viroj ridegis, dirante: “Tiel saĝa knabino eĉ kredas la sorĉistan diron, strange!” Ili insiste petis ŝin kune vojaĝi.

“Se la sorĉista diro estos fidebla,” diris Ĵen, “mi mortos pro la vojaĝo, ĉu vi bedaŭros?”

“Sensencaĵo!” la du viroj persistis en sia opinio. Fine Ĵen obeis.

Ŭej pruntis al ŝi ĉevalon, donis al ili festenon ĉe Lingaŭ, kaj ili adiaŭis Ŭej per mansvingo. Post du



tagoj ili atingis Maŭej. Ĝen rajdis surĉevale antaŭe kaj Ĝeng rajdis surazene malantaŭe. Ilin sekvis rajdantaj servistinoj. Ĉevalbredistoj ekster la Okcidenta Pordego trejnigis ĉashundojn en Lŭoĉŭan jam dek tagojn. Ĝuste kiam Ĝen preterpasis la lokon, hundoj elsaltis el veprejo. Ĝeng vidis ŝin subite falinta surteren. Ŝi aperis tuj en sia propra formo de vulpo kaj rapidegis suden. Ŝin persekutis la hundoj. Ĝeng plenforte postkuris kaj kriegis al la hundoj, sed ne sukcesis haltigi ilin. Kurinte ĉ. 500 metrojn, ŝi estis mortigita de la hundoj. Kun larmoj en la okuloj Ĝeng elpoŝigis monon, aĉetis ŝian kadavron, enterigis ŝin kaj starigis lignan stangon ĉe ŝia tombo kiel signon. Li retrorigardis ŝian ĉevalon kaj vidis ĝin maĉanta herbojn apud la vojo. Ŝiaj vestoj kuŝis sur la selo, ŝiaj ŝuoj kaj ŝtrumpoj pendis en la piedingoj, kvazaŭ ili estus ŝelo de cikado. Nur la juveloj falis surteren, malaperis ĉiuj ŝiaj aliaj posedaĵoj, malaperis ankaŭ la servistinoj.

Post dekelkaj tagoj Ĝeng revenis al la ĉefurbo. Vidinte lin, Ŭej ĝoje demandis: “Ĉu Ĝen estas bonfarta?”

Ĝeng larmis: “Ŝi mortis.”

Aŭdinte tion, ankaŭ Ŭej falis en malĝojon. Ili ploregis, brakumante unu la alian en granda funebro. Poste Ŭej demandis, kia subita malsano forrabis ŝian vivon.

“Ŝi estis mortigita de hundoj,” respondis Ĝeng.

“Kvankam hundoj estas furiozaj, tamen kiel ili povis mortigi homon?”

“Ŝi ne estis homo.”

Ŭej surpriziĝis kaj demandis: “Se ne, kio do ŝi estis?” Ĝeng rakontis al li la tutan historion. Ŭej estis mirigita kaj senĉese suspiris.

En la sekvanta tago ili veturis kune per kaleŝo al Maŭej, malfermis la tombon, rigardis la kadavron kaj revenis kun malĝojo. Ili rememoris la

pasintaĵon: ĉiuj ŝiaj aktivadoj estis samaj kiel tiuj de homo, escepte de tio, ke ŝi ne faris vestojn per si mem.

Poste Ĝeng fariĝis inspektoro de ŝtataj salbasenoj, imperiestraj palacoj kaj paŝtado de brutoj kaj vivis riĉe kun dekelkaj ĉevaloj. Li mortis en la aĝo de 65 jaroj.

En la erao Dali (766-779), mi loĝis en Ĝongling kaj ofte ekskursis kun Ŭej Jin. Ni plurfoje interparolis pri la afero, tial mi bone konis ĝin. Poste Ŭej fariĝis ĉefurba inspektoro de la kortego kaj samtempe prefekto de Longĝoŭ. Fine, li mortis sur sia posteno.

La tragedio priskribas, kiel vulpo Ĝen Ŝi prenis homan formon kaj kondukis kiel homo, kaj kiel ŝi batalis kontraŭ perfortaĵo por gardi sian ĉastecon kaj eĉ oferis sian vivon por la amato. Eĉ inter la nunaj virinoj troviĝas tiuj, kiuj estas malpli bonkonduktaj ol ŝi. Bedaŭrinde, Ĝeng ne estis inteligenta. Li admiris nur ŝian belecon, sed ne esploris ŝian naturon. Se li estus prudenta, li certe konus la leĝon de ŝanĝiĝo, sondus la forton de la supernatura estaĵo kaj per lerta plumo prezentus la esencon de la mistero, anstataŭ scii nur amuziĝi kun ŝi. Tio ja estis granda bedaŭro!

En la dua jaro (781 p.K.) de la erao Ĝjangong oni ekzilis sudorienten al Suĝoŭ min, kiu oficis kiel maldekstra konsilanto, gvardian generalon Pej Ĝji, ĉefurban vicedron Sun Ĉeng, buroestron de la Ministerio de Financaj kaj Civilaj Aferoj Cuj Ŝju kaj dekstran konsilanton Lu Ĉun. De Ŝenŝji al Suĝoŭ ni veturis kune per ter- kaj akvo-vojoj. Al nia grupo aliĝis ankaŭ ekskonsilanto Ĝu Fang, kiu vojaĝis por turismo. Ni veturis per du ŝipoj laŭ la riveroj Jingŝuj kaj Hŭajŝuj, tage bankedis kaj nokte babilis pri diversaj strangaĵoj. Tiuj sinjoroj estis profunde kortuŝitaj kaj forte mirigitaj de mia rakonto pri Ĝen Ŝi. Ili petis min registri la strangaĵon. Tial mi verkis la rakonton. ■

HONGŜJAN

de JŬAN ĜJAŬ

Hongŝjan estis servistino de la Luĝoŭ-a armeestro Ŝjŭe Song, lerte ludis biron kaj bone konis historiajn kaj konfuceanismajn verkojn. Ŝjŭe komisiis al ŝi siajn korespondon kaj preparon de

raportoj al la imperiestro. Tiel ŝi fariĝis lia privata sekretario.

Tiam en la armeo okazis grandioza festeno. Hongŝjan diris al Ŝjŭe: “La tamburado estas

morna, la ludanto certe havas malĝojon en la koro.” Ankaŭ Ŝjue bone konis muzikon, dirante: “Vi diris prave!” Li do alvokis la tamburiston. “Mia edzino mortis hieraŭ nokte, mi ne kuraĝas peti forpermeson,” ĉi tiu diris. Ŝjue tuj lasis lin hejmen.

Post la erao Ĝide (756-757), la baseno de la Flava Rivero ne estis en paco. La kortego fondis Ĝaŭji-armeon por garnizonigi ĝin en Fujung kaj regi Ŝandong kun Ŝjue Song kiel ĝia komandanto. Post la milito li haste starigis sian komandejon.

La kortego ordonis, ke Ŝjue Song edzinigu sian filinon al filo de la Ŭejbo-a armeestro Tjan Ĉengsi kaj edzigu sian filon al filino de la Hŭaĝou-a armeestro Ling Huĝang, por ke la armeestroj de la tri prefektuoj boparenciĝu kaj personoj vizitu ofte unu alian.

Tjan Ĉengsi ofte suferis malsanon pro varmo, precipe en somero. Li ofte diris: “Se mi translokos mian komandejon al Ŝandong, mi povos ĝui ŝian malvarmeton kaj vivos pli da jaroj.” Li varbis 3 000 sentimajn bravulojn el sia armeo kaj provizis ilin favore. Ilin oni nomis “eksterdomaj viroj”. Tjan ofte ordonis, ke 300 viroj el ili gardu lian komandejon nokte. Kaj krome, li elektis bonaŭguran tagon por okupi Luĝou kaj transloki al ĝi sian komandejon.

Informiĝinte pri tio, Ŝjue maltrankviliĝis, senĉese ĝemis kaj trovis nenian rimedon kontraŭ tio. Fariĝis nokto. Fermiĝis la pordo de la kazino. Ŝjue promenis en la korto kun apogbastono. Lin akompanis nur Hongŝjan.

“Ekde la unua monato,” diris Hongŝjan, “via mastra moŝto ne trankvile dormas kaj manĝas. Ĉu vi zorgas pri la najbara loko?”

“La afero koncernas nian sekurecon kaj estas neimagebla por vi,” li diris.

“Kvankam mi estas servistino,” diris Hongŝjan, “tamen mi volas forigi la maltrankvilon por la mastro.”

“Mi heredis la honoran titolon de mia avo kaj ĝuas la grandan favoron de la ŝtato,” li malkaŝis sian koron. Se mi perdos la teritorion, mi perdos ankaŭ la honoran postenon.”

“La afero estas facile plenumbla,” diris Hongŝjan. “Ne estu maltrankvila. Lasu min iri al Ŭejbo por observi la situacion kaj subrigardi la sekreton. Nun mi ekiru kaj meznokte revenos por raportĉi al vi la rezulton. Bonvolu prepari rajdan senditon kaj komplezan leteron. Ĉion alian mi traktos laŭ la konkreta cirkonstanco.”

“Mi, stultulo, ne scias, ke vi estas eksterordinara knabino,” diris Ŝjue kun miro. “Se malsukcesos la afero, min trafos malfeliĉo. Kion



fari?”

“Mi neniam malsukcesos!” ŝi diris kaj iris en sian ĉambron por prepari la vojaĝon.

Ŝi havis hartuberon kun ora pinglo. Ŝi portis broditan purpuran jakon kaj malpezajn nigrajn ŝuojn. Ĉe ŝia brusto estis ponardo kun drakaj desegnoj kaj sur ŝia frunto skribiĝis la nomo de la norda dio. Ŝi riverencis al Ŝjue kaj tuj malaperis for de la okuloj.

Ŝjue revenis en sian ĉambron, fermis la pordon kaj sidiĝis kun la dorso al la brulanta kandelo. Li trinkis kutime nur kelkajn glasojn da vino, sed tiu nokte li ne ebriiĝis, trinkinte eĉ dekelkajn glasojn. Subite li aŭdis klarionadon en vento kaj foliojn falintaj. Li surpriziĝis kaj trovis Hongŝjan reveninta. Li ĝoje demandis: “Ĉu sukcesis la afero?”

“Mi ne kuraĝis ne plenumi la ordonon!”

“Ĉu vi mortigis homojn?”

“La afero ne estis tiel serioza,” diris Hongŝjan. “Mi forprenis nur lian oran skatolon ĉe lia litkapo

kiel ateston.”

Ŝi daŭrigis: “Antaŭ la meznokto mi jam atingis Ŭejbo, esploris plurajn pordojn kaj fine venis al lia dormoĉambro. ‘Eksterdomaj viroj’ ronkis en koridoro, gardantaj soldatoj paŝis en la korto, aŭdeblis iliaj paroloj. Mi malfermis la maldekstran pordklapon kaj iris al lia lito. Mi vidis Tjan dolĉe dormanta interne de la kulvualo. Sub lia kapo estis kapkuseno kun rinocera desegno. Lia hartubero estis envolvita per flava gazo. Ĉe la kapkuseno vidiĝis sepstela spado. Ĉe la spado troviĝis ora skatolo malfermita. Ene skribiĝis lia naskiĝdato kaj la nomo de Bejdoŭ-dio. La skribaĵon kovris fama aromaĵo kaj raraĵoj. Kiam mi troviĝis en lia dormoĉambro, mi deziris agi laŭplaĉe. Lia vivo jen dependis de mia mano. Mi tamen preferis lasi lin vivi por eviti bedaŭron en la estonteco. Tiam la kandela flamo prilumis la ĉambron kaj la aromaĵo iom post iom forbrulis en la forno. Ĉie troviĝis servistoj kaj armiloj. La servistoj dormis ronkante kun kapo klinita al ekrano aŭ kun tuko en mano. Mi eltiris harpinglojn de iuj el ili, kunligis iliajn jupojn, ili tamen ne reagis. Tiel mi revenis kun la ora skatolo. For de la Okcidenta Pordego de Ŭejbo mi iris cent kilometrojn kaj vidis la Kupran Terason alte staranta kaj Ĝangŝuj-riveron orienten fluanta. Matene la ventego balais kampojn kaj la luno pendis super arbaro. Mi foriris maltrankvile, sed revenis ĝoje, ke mi forgesis la lacon. Mi ĉiam gravuris vian favoron en mian koron, fine mi plenumis la plurjaran deziron. Tial nokte mi fulme iris 350 kilometrojn. Mi entrudiĝis en danĝeran lokon kaj preterpasis 5-6 urbojn por redukti vian maltrankvilon, mi ne kuraĝis plendi al vi pri mia malfacilo.”

Ŝjue ekspedis al Tjan Ĉengsi senditon kun jena letero: “Hieraŭ nokte gasto venis al mi de Ŭejbo, dirante, ke li akiris oran skatolon ĉe la kapo de via marŝala moŝto. Mi ne kuraĝas ĝin restigi ĉe mi kaj tuj redonas ĝin al vi bonorde.”

La sendito galopis sur ĉevalo tuj en nokto kaj atingis la celokon noktomeze. Gardisto suspektis lin pro la serĉata ora skatolo. Ĉi tiu frapis la pordon per vipo kaj petis tujan aŭdiencon.

Tjan haste eliris. La sendito donis al li la oran skatolon. Tjan svenis mirigite, kun la skatolo en la manoj. Vekiĝinte, li gastigis la senditon en sia domo, regalis lin per festeno kaj donis al li multajn donacojn.

En la sekvanta tago Tjan ekspedis al Ŝjue senditon kun tridek mil ruloj da silkaĵo, 200 bonrasaj ĉevaloj kaj aliaj donacoj, kaj kun letero, kiu tekstas jene:

“Dank’ al viaj indulgemo kaj favoro, mi ankoraŭ vivas. Mi konfesas mian kulpon, agos

diskrete kaj kuraĝos havi nenian pretendon. Mi tute obeos viajn komandon kaj ordonojn kaj ne kuraĝos arogi kiel via boparenco. Dum via veturo mi sekvos vian kaleŝon por servo kaj dum via rajdo mi antaŭiros por malfermi al vi la vojon. Mi preparis servistojn kiel ‘eksterdomajn virojn’ por gardi kontraŭ rabistoj, sed ne por kovi malbonajn intencojn. Nun mi malmobilizis ilin, ke ili kulturu teron en sia hejmloko.”

Post tio loĝantoj de Hebei kaj Henan vizitis unu alian en unu-du monatoj. Tiam Hongŝjan volis foriri.

“Vi kreskis en mia familio, kien nun vi volas iri?” Ŝjue demandis. “Mi volas ŝarĝi vin per io, kion mi povus diri pri via foriro?”

“En mia antaŭa vivo mi estis viro,” diris Hongŝjan. “Mi vojaĝis ĉien, studis medicinan verkon de Ŝennong kaj savis malsanulojn. Tiam estis gravedulino, kiu suferis askaridozon. Mi trinkiĝis al ŝi dafnan vinon por forpeli la askaridojn. Baldaŭ mortis la virino kaj ŝiaj du fetoj. Hadeso kulpigis min pri tio, transformis min en humilan virinon kun ŝtela naturo. Feliĉe mi naskiĝis en la domo de via moŝto, nun mi jam aĝas 19 jarojn. Mi portis ĉiajn silkajn vestojn, manĝis ĉiajn frandaĵojn kaj ĝuis vian favoron. Kaj nun la ŝtato estas en paco kaj la reĝimo daŭros senfine. Tiuj perfidis la naturan leĝon kaj mi devis plenforte kvietigi la tumulton. Antaŭ kelkaj tagoj mi iris al Ŭejbo por repagi por via favoro. Tio evitigis al la du urboj militon, protektis la vivon de sennombraj homoj, timigis la perfidan korteganon kaj trankviligis la militistojn. Kvankam mi estas virino, tamen mia merito ne estas malgranda. Tio povas kompensi mian antaŭan kulpon kaj ebligas al mi repreni la originan formon. Pro tio mi devas kaŝi min de la homa mondo, forigi laikan penson, mildigi la malpaciencon kaj kulturi senmortan spiriton.”

“Do, mi donos al vi oron por helpi vian vivon en fora monto,” Ŝjue diris.

“La afero koncernas la venontan transmondon, ne necesas antaŭaranĝo,” diris Hongŝjan. Ŝjue komprenis, ke li ne povas restigi ŝin, kaj invitis ĉiujn siajn gastojn al grandioza nokta festeno por ŝin adiaŭi. Kun bedaŭro pri la disiĝo Ŝjue verkis muzikan pecon kaj petis gaston Leng Ĉaŭjang fari tekston kiel jene:

Plendas pri boato kanto ‘Trapo-kolektado’,

Venas ĉe Bajĉiloŭ dolorega adiaŭo.

Ŝi kiel feino forveturas en nebulo,

Riverakvo fluas al lazura la ĉielo.

Post la kantado Ŝjue ege malĝojis. Hongŝjan riverencis, ploris kaj foriris afektante ebriiĝon. ■

Niŭĝje, huj-a kvartalo en Pekino

Niŭĝje situanta en la sudokcidenta parto de Pekino estas antikva strato. En la jaro 996 ĝi jam fariĝis loĝloko de huj-oj.

Nun la strato longas malpli ol unu kilometron. Sur la areo de ĉ. unu kvadrata kilometro kun Niŭĝje-strato kiel la centro loĝas 55 000 loĝantoj, el kiuj 13 000 estas huj-oj. Preskaŭ ĉiuj loĝantoj ambaŭflanke de la strato estas huj-oj. Tie sidas la Ĉina Islama Asocio, Ĉina Islama Instituto kaj la plej granda moskeo en Pekino.

En Pekino ĉie vidiĝas altaj domegoj, kaj Niŭĝje estas nur malgranda strato. Ambaŭflanke de ĝi ankoraŭ konserviĝas multaj malnovtipaj loĝejoj de Pekino — kvadrataj kortoj. Por faciligi la vivon de loĝantoj tie funkcias magazenoj, lunĉejoj, legomvendejoj, restoracioj kaj vendejoj de bovaĵo kaj ŝafaĵo. Huj-oj povas aĉeti al si bezonatajn varojn. Ĉiuj tiuj vendejoj kaj restoracioj havas tabulon kun surskribo "islamo" en la ĉina kaj araba lingvoj. Ankaŭ ambaŭflanke de stratoj proksime al Niŭĝje estas islamaj restoracioj kaj lunĉejoj funkciigataj por huj-oj, kio montras densan koloron de la huj-a kvartalo. Iuj individuaj huj-naciecaj vendistoj kolportas en stratoj tradiciajn bongustajn lunĉojn, kiaj vaporumita kuko, malgranda maizpano, pizkuko kaj glueca kuko kovrita per sojfaba




Antaŭ moskeo de Niŭĝje-strato

faruno, puŝante manĝaj-ĉaron kun surskribo "islamo".


Ĝjubaŭjŭan-vendejo de bovaĵo kaj ŝafaĵo ĉe la norda fino de la strato estas individua vendejo, fondita de du pli-ol-60-jaraj fratoj en oktobro 1987. Antaŭ la Liberiĝo ili funkciigis Daĉengjang-vendejon de bovaĵo kaj ŝafaĵo. Poste ili sin okupis pri alia laboro. Post emeritiĝo ili denove funkciigis tiun vendejon. Ĉiutage ili aĉetas el bovobredejo

freŝajn viandojn de bovoj kaj ŝafoj buĉitaj sub la prezido de imamo. Tial, multe da huj-oj en Niŭĝje-strato estas ĝiaj konstantaj klientoj. La vendejo prosperas en negoco.

Tongheŝjŭan-restoracio, fronte al Niŭĝje-moskeo, kun historio de ĉ. 100 jaroj, estas nove riparita kaj ekfunkciis lastatempe. Ĝia antikva kvadrata korto, ornamita per skulptitaj traboj kaj kolonoj, pontoj kaj riveretoj, estas sufiĉe



Ĉinaj kaj alilandaj islamanoj preĝas en la moskeo de Niŭĝje-strato.



Juna imamo en preĝado

bela. La korto kovrita per liano havas apartan guston. La vasta kaj pura salono povas enteni ĉ. 100 homojn. Tie troviĝas ankaŭ kelkaj altklasaj separejoj. Inter ĝiaj pli ol cent specoj da pladoj nemalmultaj estas propraj al huj-

oj, kiaj fritita ŝafvosto, surstange rostita viando kaj brogita ŝafaĵo. Precipe la fritita laktaĵo estas originala plado de Tongheŝĵuan-restoracio. La uzata lakto estas unuafoje prenita el ĵus naskinta bovino. Post vaporumo la lakto

transformiĝis en toufuo-similaĵon, kiun oni konservas en fridujo. Antaŭ manĝado oni fritas ĝin kun diversaj spicaĵoj. El ĝi oni povas prepari plurgustajn pladojn, kiaj drakokula sala laktaĵo, dolĉa perlolaktaĵo kaj lakta kazeo.

La Niŭĝje-a Kvartala Komitato estas ĝia administra gvidorgano. Ĝiaj ĉefaj respondeculoj estas huj-oj, en ĝiaj subaj organoj huj-naciecaj funkciuloj konsistigas grandan procentaĵon. Multe da laboroj iras glate sub la zorgado de reprezentantoj de la nacieco. Ni prenu la laboron pri laŭplana naskado kiel ekzemplon. Se han-naciecaj funkciuloj konsilas al huj-naciecaj geedzoj naski nur unu infanon, ili povas renkonti malfacilojn. Tamen la afero povas glate iri, se funkciuloj de huj-nacieco faras tion. Niŭĝje-kvartalo estas tiuflanke avangarda unuo en Pekino kaj ankaŭ en la tuta lando.

En la pasinteco pro malriĉeco tie multaj infanoj ĉ. 10-jaraj kolportis kun korbo sur brako por dividi vivŝarĝon kun siaj gepatroj, ne havante la ŝancon viziti lernejon. Nun la eduka afero en Niŭĝje-kvartalo rapide disvolviĝas. Tie funkcias unu huj-nacieca lernejo kun 320 instruistoj kaj oficistoj. Ĝi estas mezgrada lernejo kun klasoj elementaj, superaj, profesiaj kaj porinstruistaj. En ĝi lernas pli ol 1 500 lernantoj, i.a. huj-naciecaj konsistigas ĉ. duonon.

La Niŭĝje-a Elementa Lernejo estas unu el la ĉefaj lernejoj de Pekino. Ĝi havas trietaĝan instrudomon kun vastaj kaj helaj klasĉambroj kaj kompletigitaj instalaĵoj. Ĝia estro Min Ŝiŭĝjun estas huj-o. En la lernejo laboras 72 instruistoj kaj oficistoj, 1/3 el kiuj estas huj-oj, 70% de la 873 lernantoj el 22 klasoj estas de huj-nacieco. La han-naciecaj instruistoj de la lernejo tre respektas la morojn de huj-oj. Ili kune kun la huj-naciecaj instruistoj manĝas en islama manĝejo. Sub la premiso

garantii instruan kvaliton, la lernejo donas grandan atenton al la postlernohora aktivado kaj amatora vivo de la lernantoj. Tie viglas aktivadoj fizikkulturaj, aviadmodelaj, kajtoflugigaj k.a. Ŭang Ting, 12-jara huj-nacieca lernantino de la 5-a klaso, gajnis subĉampionecon en la tutlanda konkurso pri belskribado per plumo. Ĝia piedpilka teamo gajnis ĉampionecon en la distrikta konkurso. Ili mem faris kajtojn kaj partoprenis la kajtan konkurson de la urbo. Aprile ĉi-jare ili partoprenis internacian kajtan konkurson kaj gajnis bonan rezulton.

En Niŭĝje-kvartalo estas du infanĝardenoj speciale funkciigataj por huj-oj. Ankaŭ aliaj infanĝardenoj zorgas pri akceptado de huj-naciecaj infanoj. La nove konstruita Niŭĝje-a Nacieca Kultura Stacio jam fariĝis kultura kaj distra centro de la kvartalo. Tie funkcias diversaj kursoj, en ili infanoj lernas fremdajn lingvojn kaj ludas porinfanan elektronan harmonikon, maljunuloj povas sin amuzi kaj ripozi, teatroamantoj povas aniĝi al pekin-opera trupo. Krome, estas ankaŭ trupoj pri tradiciaj gimnastiko, luktarto, stilzarto kaj volana trupo de geknaboj. La huj-nacieca hospitalo sude de Niŭĝje estas en pligrandigado. Post finkonstruiĝo de sia 13-etaĝa ĉefdomo, ĝi fariĝos unu el la grandaj nacimalplimultaj hospitaloj en Ĉinio.

En la pasinteco la tieaj huj-oj plejparte estis komercistoj. "Ok ŝnuroj kaj du tranĉiloj" bone bildigis ilian vivon. Ok ŝnuroj aludas tiun kun korboj, ĉiu kun kvar ŝnuroj, kaj ili vektportis la korbojn dum vendado. La du tranĉiloj aludas vendiston prilueca kuko kaj tiun pri bovaĵo kaj ŝafaĵo, kiuj ĉiam kunportis tranĉilon. Nun en Niŭĝje jam funkcias 18 kompare grandaj naciecaj industriaj entreprenoj kaj pli ol 40 komercaj retoj. En la lastaj jaroj rapide disvolviĝis

jadaĵ-fabriko, bildpresejo, lanaj-fabriko, vestofarejo, ŝufarejo kaj metalajfabriko.

La jadaĵ-fabriko entreprenata de la kvartala komitato fondiĝis en januaro 1971. Komence tie laboris nur ĉ. 40 dommastrinoj kaj produktis simplajn jadajn fruktojn, kiaj vinbero kaj spektabilo (*Malus spektabilis*.) Nun tie laboras 120 laboristoj kaj oficistoj, direktate de engaĝitaj fakuloj kaj teknikistoj. Post zorgema skulptado el jadpecoj fariĝis delikataj figuroj de homoj, birdoj kaj bestoj, floroj, pejzaĝaj miniaturoj kaj aliaj ornamaj artaĵoj. Estro de la fabriko Ma Jutjan estas talenta huj-nacieca entreprenistino. Dank' al la penado de veteranaj metiartistoj kaj ĉiuj laboristoj kaj oficistoj la fabriko pligrandiĝis, kaj multe altiĝis la kvanto kaj kvalito de produktaĵoj. La vendkvoto de 1987 atingis 2 600 000 jŭanojn. La jadaĵ metiartaĵoj produktitaj de ili ne nur gajnis premion en tutlanda ekspozicio de metiartaĵoj kaj belartaĵoj, sed ankaŭ eksportiĝis al multaj landoj.

La ŝtato kaj loka registaro tre respektas la morojn, kutimojn kaj religian kredon de huj-oj. En Niŭĝje plej okulfrapas Niŭĝje-moskeo kun historio de mil jaroj. Ĝi estas grandioza post riparado kaj pligrandigo faritaj en diversaj dinastioj de Ĉinio. En 1979 la ŝtato denove asignis monsumon por ripari ĝin. La orita kaj kolorigita moskeo fariĝis des pli impona. Ekde 1980 ne nur tieaj huj-oj venas tien por preni banon kaj fari preĝon, sed ankaŭ islamanoj el diversaj lokoj de Ĉinio kaj dekoj da aliaj landoj vizitas ĝin kaj faras preĝon.

Proksime de Niŭĝje-moskeo staras alta islama konstruaĵo. Ĝi estas la Ĉina Islama Instituto, la plej supera lernejo por la ĉinaj islamanoj. Post diplomitiĝo la islamanoj, kiuj lernis en ĝi, profesie sin okupas pri la islama laboro en diversaj lokoj de Ĉinio. ■

* 35-j. paciga juĝisto dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj kaj kolektas ĉiulandajn vojmapojn. S-ro Brulard Philippe, rue de la Chapelle 72, 7370 Elouges, Belgio.

* Fondiĝis nova servo por geedziĝo. Geesperantistoj, se vi volas havi esperantistan familion internacian, turnu vin al ni. Vian foton, informon pri vi kaj deziremaĵojn sendu al Foto-Klubo, Kesto 175, P.O. Minsk, 220050, USSR.

* Esperanto-Kursanoj el Litovio dez. kor. kun geesp-istoj de la mondo. Kontakto kun ili pere de la instruistino Lukoŝevičiene Palmira, Radastu 22-2, Panevežys 235306, Litovio, USSR.

* E-rondeto de la 4a mezlernejo de JELGAVA (LATVA SSR) organizas internacian ekspozicion de infanaj desegnaĵoj, dediĉitan al la 100-jara jubileo de Esperanto. Ni respondos al ĉiu sendinto: La desegnaĵojn bonvolu sendi al: Arija Vulfa, P.Stŭckas 11-13, Jelgava, SU-229600, Sovetunio.

* Esperanto-kooperativo "Sporto kaj Kulturo" instruas krom Esperanto diversajn luktartojn: uŝu-o, ĉigong-o, aikido, oomoto-Budo, sambo. Akceptas dezirantojn el ĉiuj landoj. Turnu: USSR, 220050, Minsk, Postamt. Box 27, SK.

* Grupo de sovetiaj ŝatantoj de ludo renĵu-o deziras kontakti kun samfakuloj tutmonde kaj kun ŝatantoj de goo (vejĉjo). Skribu en Esperanto, angle, ruse: Korhov E, USSR, 220030, Minsk, ul. Oktjabrskaja 6-19.

* Erich Ehmig, 80-j., dez., kor. kun veteranaj esperantistoj. Adr.: Strasse der Jugend 17/58/19, 6110 Hildburghausen, Bezirk Sukl, DDR.

Internacia simpozio pri “Ĉinio kaj la mondo en la 90-aj jaroj”

Antaŭ nelonge en Pekino okazis la nomita simpozio, kiun ĉeestis famaj personoj el la branĉoj de politiko, ekonomio, sciencoj kaj teknikoj, entreprenoj de Britio, Usono, Japanio, Sovetunio, Svisio, FR Germanio, Nederlando, Peruo, Hindio kaj Niĝerio, respondeculoj de pli ol 20 departementoj de Ĉinio, kaj faris profundan diskutadon kaj sinceran interŝanĝon de opinioj pri la politikaj kaj ekonomiaj rilatoj de la mondo en la 90-aj jaroj, la influo de tiama teknika novigo al la monda ekonomio, la disvolviĝo de Ĉinio en la 90-aj jaroj ktp. Malofte vidiĝis tio, ke oni organizis en Pekino reprezentantojn el landoj kun diferencaj socisistemoj kaj personojn kun diferencaj vidpunktoj, por fari diskutadon en alta tavolo kaj aŭskulti iliajn malsamajn opiniojn pri la disvolviĝo de Ĉinio en la venontaj jaroj.

LA MONDA PERSPEKTIVO EN LA 90-AJ JAROJ

Laŭ la vidpunktoj de ĉeestantoj, la monda ekonomio en la 90-aj jaroj karakteriziĝos en kvar flankoj: Unue, senĉese multiĝos la faktoroj pri la integriĝo de la monda ekonomio; due, kreskos la konscio pri la ekonomia naciigo, kio estos la natura reflektado de diversaj landoj pri la ekonomia integriĝo kaj certe estiĝos plurforma protektismo; trie, multiĝos la partoprenantoj de internacia eko-

nomio, interalie, la posedantoj de scioj kaj informoj gajnos la superecon en la konkurado, kio estos favora faktoro por la postaj alvenontoj; kvare, refoje altiĝos la prezoj de energiaj fontoj.

Multaj ĉeestantoj emfazis, ke estos afflikta la internacia konkurado, sed nur partopreno al la internacia konkurado povos stimuli la disvolviĝon de enlanda produktiveco. En iuj ŝlosilaj branĉoj, ekz. en tiuj de komputiloj kaj informoj, protektado de enlandaj industrioj malhelpos la disvolviĝon de la tuta industrio.

Iuj reprezentantoj opiniis, ke la graveco de la usona ekonomio malfortiĝos relative en la monda ekonomio, sed en la 90-aj jaroj Usono ankoraŭ estos la plej granda merkato de la mondo kaj la plej grava fonto de teknika ekspluatado. Iuj reprezentantoj montris, ke post 1992 aperos la unuigo de la eŭropa merkato, kio unuflanke estos utila por solidariĝi la pozicion de Eŭropo kaj aliflanke eblos aperigi la protektismon en Eŭropo, kiu malhelpos la ekonomian disvolviĝon de Eŭropo kaj la tuta mondo.

Pri la tuta situacio de la 90-aj jaroj, vicĝenerala sekretario de la Ĉina Esplora Centro pri la Internaciaj Problemoj profesoro Ĝeng Biĝjan opiniis, ke la 90-aj jaroj kaj la komenco de la venonta jarcento, kiel interliga punkto de la du jarcentoj, estos determinaj

jaroj, jaroj de denova konado, reformo kaj reguligo. Li diris, ke la ŝtatoj en diferencaj socisistemoj, kaj la ekonomiaj grupoj kun diferencaj interesoj senescepte prezentis la problemon denove koni siajn ŝtatan forton, superecon kaj malsuperecon, denove koni siajn ekonomion, politikon, sociajn sistemon kaj strukturon kaj la strategion de la ŝtata disvolviĝo, denove koni la mondan disvolvan perspektivon, denove koni siajn pozicion en la mondo kaj rilatojn kun aliaj landoj. Ĉiu ajn ŝtato, precipe granda ŝtato, se ĝi forgesus, ke ĝia forto estas limigita, ĝia sistemo ankoraŭ havas mankojn, ĝiaj rilatoj kun aliaj landoj estas egalrajtaj, ĝi devas vivi kaj lasi ankaŭ la aliajn landojn vivi, neeviteble estus mokata de la historio.

Gohn Mroz, estro de la Usona Esploro pri la Sekureco inter la Orientaj kaj Okcidentaj Landoj, opiniis, ke la okcidenta socio kaj la socialisma socio denove cerbumas pri sia karaktero de la internacia sistemo mem kaj pri la determinita tendenco en sia sistemo. En la venontaj dek jaroj, unu el la plej signifaj fenomenoj estos, ke la superpotencaj landoj pli kaj pli neforte praktikos sian neefikan potencon en la tuta mondo kaj faros la influon, kiun ili antaŭe faris. Malfacile ekzistos la tendenco, ke nur unu flanko aŭ du flankoj solvos tutmondajn problemojn.



Deng Ŝjaŭping (dekstre) intervidiĝas kun partoprenantoj de la simpozio.

La ĉinaj kaj alilandaj ĉeestantoj aprobis konsideron pri la monda perspektivo en tia vidpunkto: "En la mondo la prosperiĝo de la orientaj landoj ne signifas certan malprosperiĝon de la okcidentaj landoj." La konkura rezulto inter la orientaj kaj okcidentaj landoj ne devas esti, ke unu flanko akiras la intereson dum la alia flanko en relativa grado suferas de perdo. La disvolviĝo de la triamondaj landoj kaj la landoj en Azio kaj la regiono de Pacifiko montris ankaŭ vastan merkaton kaj gigantan ŝancon por Usono kaj Eŭropo.

Pri la mondskala reforma kaj reguliga tajdo, Ĝeng Biĝjan opiniis, ke multformaj kaj diferencaj certe estas la reformoj pro la granda diferenco de la socisistemoj, prospera grado, kaj geologiaj pozicioj, historio kaj naciecoj. Sed ankoraŭ ekzistas neignoreblaj komunaj temoj en fundamentaj flankoj pri la enlandaj movfortoj,

sistemoj, merkataj mekanismoj kaj internaciaj kunlaboroj. Granda kvanto da faktoj pruvis, ke ankoraŭ ekzistas komunaj trajtoj en reformo kaj reguligo de diversaj landoj: La radikala celo pri fortigo de la sinteza landforto por havi favoran situon en la mondo en la 21-a jarcento; la fundamenta enhavo pri reguligo de ekonomia strukturo kaj disvolva strategio por fortigi la superecon de socia ekonomia sistemo; la ĉefa afero pri disvolvo kaj plena utiligo de sciencoj kaj teknikoj, aŭ meti la altklasajn teknikojn sur la unuan lokon; dum la enlanda reformo kaj reguligo, samtempe reguligi la politikon al la aliaj landoj.

SINCERAJ VALORAJ PROPONOJ

La ĉeestantoj de la simpozio montris tre grandan zorgon kaj intereson al la reformo pri ekonomio kaj aliaj sistemoj

okazinta en Ĉinio.

Amosa Gordan, ĝenerala direktoro de la Usona Esploro pri la Internacia Strategio, kaj Martin Lees, antaŭa asista ĉefsekretario de UN, opiniis, ke la reformo de Ĉinio havos gigantan influon al Sovetunio kaj diversaj landoj de la mondo kaj ebligos al la nemilita konkurado inter Usono, Sovetunio, Japanio, Eŭropo kaj Ĉinio en la regiono de Pacifiko fariĝi grava trajto de la 90-aj jaroj.

Multaj ĉeestantoj elmetis siajn opiniojn kaj proponojn pri la disvolviĝo de la scienc-teknika afero de Ĉinio, ĝiaj partopreno en la internaciaj ekonomio kaj konkurado, altiro de fremdlandaj kapitaloj kaj utiligo de fremdlandaj pruntedonoj, kaj la reformo de la prezoj kaj salajroj de Ĉinio en la venontaj jaroj.

Dum la diskutado nemalmultaj reprezentantoj emfazis la grave-

con de sciencoj kaj teknikoj en disvolviĝo de socio kaj ekonomio. Ili opiniis, ke la internacia graveco de sciencoj kaj teknikoj turniĝos de ekonomio al politiko, kaj la tutmonda tendenco de novaj sciencoj kaj teknikoj kaŭzos al la mondo kvalitan ŝanĝiĝon de socio, ekonomio kaj politiko. Tial, ili proponis, ke Ĉinio fondu plenamplaksan sistemon de sciencoj kaj teknikoj, kunfandiĝantan kun la socio kaj ekonomio, por ke sciencoj kaj teknikoj penetriĝu en ĉiujn disvolviĝajn procedojn.

Pri disvolvo de la ĉina ekonomio fronte al la ekstera mondo kaj la lastatempe elmetita strategio de ekonomia disvolviĝo de la marborda regiono iuj reprezentantoj opiniis, ke por partopreni en la internaciaj ekonomio kaj konkurado kaj por gajni fremdlandajn valutojn, Ĉinio devos unue internaciigi parton de sia ekonomio aŭ kunfandi ĝin kun la monda ekonomio por levi ĝin al internacia nivelo kaj krei kelkajn prosperajn regionojn en Ĉinio, similajn al Hongkongo kaj Singapuro. Aliaj reprezentantoj opiniis, ke ĝusta estas la fundamenta strategio de Ĉinio por disvolvi eksportan ekonomion, sed plena eksporta ekonomio estos malfavora por Ĉinio kun miliardo da loĝantoj. Ĉinio ne povos iri la vojon de Singapuro kaj la suda Koreio, kaj devos ĉefe disvolvi sian enlandan merkatan ekonomion kaj disvolvi la eksterlandan kaj enlandan merkaton en kombino. La eksporta ekonomio sukcesos, nur se ĝi baziĝos sur la enlanda merkato kaj ekonomia disvolvo, kaj nekonvene estos tro emfazi la enlandan aŭ eksterlandan merkaton.

SOJLO DE LA BONA KUNLABORO

Sukcese finiĝis la simpozio. Ma Hong, ĝenerala sekretario de la Ĉina Esplora Centro pri Disvolviĝo de Ekonomio, Tekniko kaj Socio, laŭdis la simpozion kiel

“speciale abundan bankedon”, ĉiu reprezentanto kontribuis al ĝi per speciala plado — valora propono, amikeco kaj kunlaboro.

Ma Hong diris, ke gravan referencan valoron havas ĉiuj politikaj proponoj elmetitaj de la ĉeestantoj, pri praktikado de “La Sepa Kvinjara Plano” (1986-1990) de Ĉinio, la ellaboro de la disvolviĝa kaj reforma plano en la 90-aj jaroj, la celo kaj aranĝo de la disvolviĝa strategio de Ĉinio en la venonta jarcento. En la resumado, al la proponoj en kvar flankoj elmetitaj de la reprezentantoj, li faris altgradan takson: Unue, fondi plenamplaksan sistemon de sciencoj kaj teknikoj, kunfandiĝantan kun la socio kaj ekonomio; due, fondi ekonomian strukturon, flekseblan, elastecan kaj taŭgan al

la ŝanĝiĝo de la ekstera ekonomio: trie, alpreni rimedojn por preventi la malbonan influon al la enlanda ekonomio, eble kaŭzotan de la ŝanĝiĝoj de internaciaj moninterŝanĝaj proporcioj kaj internaciaj interezaj procentoj; kvare, ŝpari energion kaj protekti medion.

En la simpozio, la reprezentantoj proponis, ke Ĉinio konstruisian Hajnan-insulon kiel la mediprotektan eksperimentan regionon, tiu nova propono estis altgrade taksata de ŝtataj gvidantoj de Ĉinio. Ma Hong diris, ke, se la praktikado de tiu ĉi propono ricevos la internacian helpon, ĝi eble rapide akiros bonan rezulton, kies sperto estos benefika ne nur por Ĉinio, sed ankaŭ por la mondo.

ŬANG GUJ KAJ LI ŜJ ANGŜJANG

La eposo temas pri am-historio de paro da mizeraj kamparanoj okazinta ĉirkaŭ la jaro 1930. Ĝi sukcese modlis la du vekigintajn kamparanojn, realisme spegulas la tiaman kamparanan vivon, ilian deziron, batalon kontraŭ la subpremantoj, kaj puran amon. La verko estas verkita en formo de ĉina popolkanto. La lingvo aromas per ĉarmo de simpleco kaj multaj trafaj komparoj artisme reliefigis la enhavon. La originalo unue publikiĝis en 1946, kaj estis plurfoje reeldonita. Ĝi markis la komenciĝon de nova stadio de la ĉina moderna poezio, kies ĉefa reprezentanto fariĝis ĝia aŭtoro.

Li Ĝji (1922-1980) estis vicprezidanto de la Ĉina

Verkista Asocio, kaj ĉefredaktoro de la literaturaj gazetoj *Poezio* kaj *Popola Literaturo*.

Verkis: Li Ĝji
Tradukis: Laŭlum

Numero: 10-Es-71S
Formato: 18.4 × 21 cm.
Prezo: £1,55 US\$2,85



Mendu ĉe: Libroservo de UEA
Perantoj de EPĈ

aŭ Internacia Libro-Komerca Kompanio de
Ĉinio (GUOJI SHUDIAN), Esperanta Sekcio,
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

La fekunda kaj bela Nanŝa-insularo

de SUN GŬOLJANG


Sur la Suda Ĉina Maro (117°50'-109°30' E, ĉ. 4°-11°29' N) punktiĝas grupo da insuloj kun vasta areo kaj ekvatora pejzaĝo. Ĝi kaj la insularoj Ŝjiŝa, Dongŝa kaj Ĝongŝa havas la komunan nomon Insuloj sur la Suda Ĉina Maro.


Kiel la aliaj tri insularoj, Nanŝa-insularo konsistas el belaj koraloj. Tie dense lokiĝas koralaj rifoj. Multaj el ili estas danĝeraj por mara navigacio. Estas konstatite nun, ke la insularo konsistas el pli ol 100 insuloj, sablaĵoj kaj subakvaj rifoj, inter kiuj ĉ. 20 vidiĝas sur la akvosurfaco.

Tajping-insulo estas la plej granda koralaj insulo el Nanŝa-insularo. Ĝi troviĝas en la nordokcidenta parto de Ĝengherifaro kaj distancas norde je pli ol 900 kilometroj for de Julin-haveno de Hajnan-provinco. La insulo en formo de naveto havas la alian nomon Longa Insulo kun areo de 0.43 kvadrata kilometro. Ĝia plej alta loko estas nur 4.18 metrojn super la marnivelo. El la insulo sude de 10° N Nanŭej-insulo estas la plej granda kaj ampleksa areo de 0.14 kvadrata kilometro. Nordoriente de ĝi troviĝas navigacia vojo profunda ĉ. 14 metrojn. Ĉe ĝia bordo povas ankriĝi granda ŝipo. La buŝo de la vojo estas kontraŭa al la nordo kaj tajfuno tie estigas ne tre grandajn ondojn. Tial, la loko estas bona ŝirmejo por ŝipoj. Okcidente de la insulo preterpasas la marvojoj de Kantono al Ĝakarto kaj de Singapuro al Hongkong kaj Manila.

Nanŝa-insularo situas ĉe la ekvatora zono. Tie regas alta temperaturo kaj ofte pluvas, sed oni neniam sentas sufokan varmon. La temperatura diferenco inter vintro kaj somero estas

La memoriga steleo starigita de ĉina esplorista grupo sur la rifo Hŭajang de Nanŝa-insularo





Oceanologia observejo sur la rifo Jongŝu de Nanŝa-insularo en konstruado

malgranda. La meznombra temperaturo de la plej malvarma februaro estas 25.6°C kaj tiu de la plej varma aŭgusto 28°-30°C. Ĉie sur la insuloj, ĉu grandaj ĉu malgrandaj, kreskas pompe arboj, arbedoj kaj herboj, inter kiuj estas kokosarboj, papajoj, bananarboj kaj aliaj tropikaj plantoj. La altaj kokosarboj povas rezisti kontraŭ ventego kaj tajdo.

En la insularo vivas sennombraj suloj. Tage ili grupe flugas super maro, kaptas fiŝojn kaj salikokojn, vespere ili revenas sur insulojn. Multaloke sur la insuloj estas dika tavolo da birda fekaĵo. Precipe sur Tajping-insulo estas granda kvanto da birda fekaĵo. La birda fekaĵo estas speciala produktajo de la insuloj sur la Suda Ĉina Maro kaj bonega sterko. La birda fekaĵo entenas 11-27% da fosforo kaj havas altan efikon por kreskigi grenajn kaj industriajn plantojn. La sterko povas altigi produktokvanton je dekono ĝis du dekonoj. Ĝi estas pli efika por laterito de suda Ĉinio.

La marakva temperaturo ĉe la insularo estas preskaŭ konstanta en vintro kaj somero. La jara meznombra temperaturo estas ĉ. 28°C. Tial en la maro abundas marproduktaĵoj. Krom tinusoj, ŝtonkapaj fiŝoj, epinefeloj kaj rubandfiŝoj, tie vivas ankaŭ omaroj, peneoj, palinuroj, kraboj, sepioj, loligoj, oktopodoj, ostroj,

pektenoj k.a. Multe kreskas tie holoturioj, gelidioj, digeneoj kaj spongoj. En malprofundaĵoj de la insularo vidiĝas de tempo al tempo helonioj, la grandaj estas pli ol unu metrojn longaj kaj pli ol 200 kg pezaj. La testuda ŝelo ĉarmas kiel jado, estas pli facile gravurebla ol la lasta. Pro tio ĝi servas kiel bonkvalita materialo por metiartaĵo.

Nanŝa- kaj Ŝjiŝa-insularoj estas plej frue malkovritaj kaj ekspluatataj de la ĉina popolo. Frue en la 2-a jarcento a. K. ĉinaj popolanoj komencis ekspluati la insularojn per sia diligenta laboro. Post Tang- kaj Song-dinastioj (618-1279) ĉinaj popolanoj tie okupiĝis pri fiŝkaptado k. a. Kaj en Song- kaj Jŭan-dinastioj (960-1368) la ĉina registaro donis al la insularoj la nomojn Ĉjanli-Ĉangŝa kaj Ŭanli-Ŝitang. En Ming- kaj Ĉing-dinastioj (1368-1911) pli kaj pli da ĉinaj fiŝistoj faris fiŝkaptadon ĉe Ŝjiŝa- kaj Nanŝa-insularoj. En ĉiu vintro, kiam blovis nordorienta musono, ili veturis suden kaj kaptis ĉe la insularoj heloniojn, holoturiojn, ostrojn k.a., plantis kokosarbojn, bananarbojn, papajojn kaj bataton kaj konstruis domojn kaj templojn. En aprilo kaj majo, antaŭ la alveno de tajfuno, plejparto de la fiŝistoj revenis al la ĉeftero kun la kaptaĵoj. Iuj fiŝistoj eĉ oferis sian vivon por ekspluati

la insularojn. Nun staras du tomboŝtonoj por ĉinaj fiŝistoj de Ĉing-dinastio sur la insulo Bejzi de Nanŝa-insularo.

De Song-dinastio ĝis la nuntempo, ĉiuj registaroj de diversaj dinastioj de Ĉinio plenumis sian administran rajton sur Nanŝa-insularo. En la antikveco ĉinaj registaroj sendis sian armeon inspekti la insularojn Ŝjiŝa, Nanŝa kaj aliajn kaj anoncis sian suverenecon super tiuj insularoj. En la moderna tempo la ĉinaj registaroj sendis al ili oficirojn kaj oficistojn, ili starigis tie suverenecajn ŝtontabulojn, hisis flagojn kaj faris salvojn por refoje deklari sian suverenecon super ili. Krome, ili sendis ankaŭ sian armeon por rezisti kontraŭ alilanda invado, starigis lumturojn, funkciigis meteostaciojn, sankciis al komercistoj ekspluati lokajn riĉ-fontojn kaj fondis administrajn establojn por gvidi la loĝantojn en ilia produktado. Kaj en Ming- kaj Ĉing-dinastioj (1368-1911) la ĉina registaro definitive difinis, ke la insularoj Ŝjiŝa kaj Nanŝa estas sub la administrado de Ĉjongĝou-prefektujo de Gŭangdong-provinco, Ĉinio. Nun ili apartenas al la nove starigita Hajnan-provinco. Dank' al la diligenta ekspluatado de la ĉina popolo, Nanŝa-insularo, kiel perlo sur la Suda Ĉina Maro, radios pli brile. ■

LAŬDA KANTO

de ŬANG ŜIUĈIN



Ĝentilaj estas dung-oj, kiuj koncentre loĝas en Gŭangŝji en suda Ĉinio. Ili havas moron viziti najbarajn vilaĝojn. Kiam en iu vilaĝo oni inaŭguras novan domon aŭ ponton, loĝantoj de najbaraj vilaĝoj venas gratuli kaj gastoj kolektive.

Mastroj kaj gastoj ambaŭ estas ceremoniemaj ĉe renkontiĝo kaj adiaŭo. Ĉe renkontiĝo la mastroj okazigas gast-akceptan ceremonion originalan por dung-oj, t.e. bonvenigi gastojn per vojbarado. En la festa tago la vilaĝo estas vivoplena, la gajaj vilaĝanoj arope iras al la vilaĝ-enirejo kaj starigas ŝajnan barilon el arbobranĉoj por malhelpi al la gastoj eniri.

La gastoj laŭte kantas pri la bonoj de la vilaĝo. Post la kantado la mastroj invitas la gastojn en la vilaĝon kaj regalias ilin per festeno. Antaŭ ĉetabliĝo la gastoj donas al la mastroj donacojn kaj gratulas ilin per varma kantado. La kanto estas nomata *gabu*, signifanta laŭdan kanton.

Gabu laŭdas tamburan turon, novan domon, grenejon, laĝeton, rizkampon, maljunulojn, infanojn, novedzinon, bovan reĝon ktp. Tiaj kantoj estas kun ĉarma melodio, en variaj formoj. Kantantoj povas improvizi kantotekston surloke.

Kiam iu lĥkonstruis novan domon, liaj parencoj en najbaraj vilaĝoj venas por lin gratuli, eksplodigas petardojn antaŭ la nova domo kaj ekkantas:

*Brue piĝoj fluge venas,
ĝojnovajojn ni ekaŭdas.
Niaj manoj ja malplenas,
pri la domo ni kantlaŭdas.*

*Kie vi dungis la majstrajn homojn?
Bone l'ĉarpentarton ili konas.
Vere rara estas tia domo —
pli ol urbodomo ĝi imponas.*

*El cedrelo estas la ĉevronoj,
el abio estas la kolonoj,
sur solidaj fostoj sidas via domo,
frontas suden — en direkt' de bono.*

*De hodiaŭ via nova domo brilos,
viaj homoj jam ne plu suferos,
kaj rikoltojn riĉajn vi akiros,
kaj dombestoj viaj tre prosperos...
Ho,
ni gratulas vin en sincero.* ■

Gastobonvenigo survoje



BONA DISVOLVIĜO DE LA NACIA EKONOMIO DE ĈINIO

La nacia ekonomio de Ĉinio en la unua duono de la kuranta jaro bone disvolviĝis: industrio kreskis rapide, agrikulturo releviĝis paŝoposte, la interna kaj ekstera komerco estis en prospero kaj la financa enspezo pliiĝis. Laŭ unuapaŝa statistiko, la totala produktovalorado de la nacia produktado atingis 557.5 miliardojn da jŭanoj, je ĉ. 11% pli multe ol tiu en la sama periodo de la pasinta jaro, kaj la financa enspezo de la ŝtato kreskis je 10.2% kompare kun tiu en la sama periodo de 1987. Tiaj kreskoj estis malofte vidataj en la pasintaj dek jaroj.

SUBDISTRIKTOJ KAJ URBETOJ DE ĜJANGSU EN BONA DISVOLVIĜO.

En 1987, estis 236 subdistriktoj kaj urbetoj de Ĝjangsu-provinco,

kies totalaj produktovaloroj de industrio kaj agrikulturo superis cent milionojn da jŭanoj respektive. La nombro estas je 76 pli granda ol tiu en 1987. La provinco havas po unu tian subdistrikton por deko da subdistriktoj kaj urbetoj. La totala produktovaloro de industrio kaj agrikulturo de la urbetoj Ĉjanĝoŭ de la gubernio Uŝji en 1987 atingis 546 milionojn da jŭanoj kaj okupis la unuan lokon en ĉiuj subdistriktoj kaj urbetoj de la provinco.

ĈINAJ SPORTISTOJ MARŜOS AL LA OLIMPIAJ LUDOJ

Pli ol 300 ĉinaj sportistoj partoprenos en la konkursoj de 21 sportbranĉoj de la 24-aj Olimpiaj Ludoj. Tiuj branĉoj estas atletiko, naĝado (inkluzive de plonĝo, artonaĝo kaj akvopilko), gimnastiko (inkluzive de artogimnastiko), vira kaj virina korbopilkoj, virina

flugpilko, piedpilko, tablotenis, virina manpilko, halterlevo, pafado, arkpafado, skermado, biciklado, ĵudo, luktarto, kajakludo, kanuludo, velŝipado, bokso kaj aliaj. Ĉinaj sportistoj ankaŭ partoprenos en prezentaj sportbranĉoj de virina ĵudo kaj volanludo. La delegacio de ĉinaj sportistoj estos unu el la delegacioj, kiuj havos grandan anaron kaj partoprenos preskaŭ en ĉiuj konkursoj de la sportbranĉoj.

PLIGRANDIĜAS LA NOMBRO DE LABORISTINOJ KAJ OFICISTINOJ EN ĈINIO

La politiko de reformo kaj pordomalfermo alportas al la ĉinaj virinoj grandan favoron. En la lastaj dek jaroj la nombro de laboristinoj kaj oficistinoj kreskis je 15 milionoj. Kaj krome, aperis ankaŭ granda nombro da sciencistinoj kaj administristinoj tra la lando.

En la Brodaĵa Fabriko de Ĉjanĝoŭ en Uŝji-gubernio



ABSOLUTA GRAVITOMETRO FARITA EN ĈINIO

La Ĉina Akademio de Mezuro elfaris moveblan absolutan gravitometron, kies precizeco atingis $15 \times 10^{-9} \text{ cm}^2 \text{ s}$. Ĝi estas unu el la kelkaj altprecizaj absolutaj gravitometroj en la mondo.


Regata de komputilo, la aparato konsistas el optika, elektronika, mekanisma kaj vakua sistemoj. Ĝi estas uzata por kosmonaŭtikaj teknikoj, mezurado de tertrema aŭspicio, serĉado de mino k.a.

GRANDTIPA ASTRONOMIA TELESKOPO FARITA

La grandtipa astronomia teleskopo, kiu estas milionoble pli malproksimvida ol la homa okulo kaj per kiu oni povas observi astrojn dek miliardojn da lumjaroj for de la terglobo, jam estas provfarita de la Nankina



Laboristinoj de felta fabriko



La aŭtomata kardiometro

Astronomi-aparata Fabriko sub la Ĉina Akademio de Sciencoj. Ĝi nun funkcias en Ŝinglong-observejo de la Pekina Observatorio. La teleskopo altas 10.6 m., pezas 100 tunojn kaj havas lenson kun diametro de 2.16 m.

ĈINIO, INVENTA LANDO

Pli ol duono de la inventoj de la moderna mondo originas el Ĉinio. Tion malkaŝis la libro "Ĉinio — Inventinto kaj Inventa Lando" verkita de brita klerulo.

La antaŭparolo diras, ke krom kompasoj, presarto, papero kaj pulvo, ankaŭ la moderna agrikulturo, navigacio, petrol-industrio, meteorologio, muziko, decimala notumo, monbileto, multŝtupa raketo, torpedo, venena gaso, pafilo, kanono, paraŝuto, brando, viskio, kerna parto de vapormaŝino k.a. originas el Ĉinio.

NOVA AŬTOMATA KARDIOMETRO FARITA EN PEKINO

Antaŭ nelonge, nova aŭtomata kardiometro provfarita de la Pekina Aer- kaj Astro-naŭtika Universitato sukcese trapasis la

ekspertizon. La aparato povas mezuri aŭtomate 30 parametrojn pri la koraj funkcioj kaj precize indiki la mekanismajn funkciojn kaj laboradon de la koro de ekzamenita paciento en du minutoj. La kvalito de la aparato estas multe pli alta ol tiu de la samspecaj aparatoj en- kaj eksterlandaj. Oni povas uzi ĝin ankaŭ en la esplorado de kuracefiko de medikamento. Ĝi estas malgranda kaj facile manipolata.

ĈINAJ LEGOM-KULTIVISTOJ AL SOVETUNIO

Antaŭ nelonge 44 ĉinaj legom-kultivistoj flugis al Sovetunio por kultivi legomojn en ĝia ŝtata kultivejo. Laŭ kontrakto, ili kultivos pli ol dekon da legomoj, kiaj kukumo, brasiko, tomato kaj terpomo, sur 40 hektaroj da tero en kvin monatoj. Tio estas unu el la kunlaboroj inter Ĉinio kaj Sovetunio.

MAGIA METEOŜTONO

Oni trovis meteoŝtonon en Ŝiĝu-gubernio, Siĉŭan-provinco.

La ŝtono povas prognozi

veteron. Se akveroj koncentriĝas en iu direkto de la ŝtona surfaco, tio indikas, ke pluvos en la regiono montrita de la direkto. Se akveroj koncentriĝas meze de la ŝtono, tio montras, ke baldaŭ pluvos ĉeloke. Kaj se la ŝtonsurfaco sekiĝas kaj fariĝas blanka, tio aŭguras baldaŭan serenigon post longa pluvado. Se vaporo leviĝas de la ŝtonsurfaco, tio aŭguras nubozan kaj nebulan veteron kun malaltiĝo de atmosfera temperaturo.

ANOMALIA FETO EL LA ABDOMENO DE VIRO


Kirurgoj de la Popola Hospitalo de Janŝoŭ-gubernio, Hejlongĝjang-provinco, elprenis 3-kilograman anomalian feton el la abdomeno de viro. Ĝi havas kapon, dentojn, koron kaj langon.

Ĝis nun la kaŭzo pri tio ankoraŭ ne estas konata.

"LANDO DE MARBIRDOJ" EN GŬANGDONG, ĈINIO

Lastatempe la Gŭangdong-a Entomologia Instituto faris enketadon kaj konstatis, ke en la meza parto de Bomen-insularo de Nan'aŭ-gubernio, Gŭangdong-provinco, vivas pli ol 130 specoj da marbirdoj. La loko havas areon de 0.42 km² kaj estas vera "lando de marbirdoj". Tie vivas fregatoj, unuaklasaj protektataj birdoj de la ŝtato, flavbekaj ardeoj, duaklasaj protektataj birdoj de la ŝtato, kaj ankaŭ merguloj, nigra-flavaj oriojoj, helruĝaj mevoj kaj aliaj raraj birdoj.

Lia amo kaj lia aspiro



Seimin en laboro

Li havas puran koron similan al tiu de infano. Li sindoneme kaj fervore penadas sur la zigzaga vojeto al la aspirata celo.

Li estas Seimin, de mi vizitita lastatempe. Li estas Esperanta parolisto de Radio Beijing. Mia unua vizito okazis en posttagmezo iudimanĉe. Li estis iom singardema pri raportisto. Li insistis, ke mi ne raportu pri li. "Mi estas ordinara redaktisto kaj tradukisto sen mirinda merito. Mi ne indas vian inkon," li diris. La materialoj en ĉi tiu artikolo estas iom post iom kolektitaj post kiam ni fariĝis intimaj amikoj.

Fakte li estas esperantisto kun atingo kaj alta aspiro, tion pruvis bone, ke li estis elektita kiel membro de la Akademio de Esperanto en aprilo, 1986. La akademio estas plej aŭtoritata institucio de Esperanto, kaj ĝenerale la titolo akademiano estas donita al tiuj esperantistoj kiuj profunde posedas Esperanton, havas vastan esploron pri Esperanto kaj kontribuas multe en disvastigo de la lingvo. Nun ĝi

havas 42 membrojn, inkluzive de 2 ĉinoj, el ili Seimin estas unu el la plej junaj.

Kiam Seimin fariĝis amanto de Esperanto? En la mondo multaj aferoj decidiĝas hazarde. Li amis naturan sciencan infanaĝon, kaj volis sin oferi al natura scienco, posedinte fremdan lingvon. En 1960 li fariĝis studento de la ruslingva fakultato de la Pekina Universitato. En la lasta jaro de la studo li elektis Esperanton kiel la studobjekton de dua fremda lingvo. Ekster ĉies atendo, li enamiĝis al ĝi kaj dum la lastaj pli ol dudek jaroj li akompanis ĝin kiel ombro figuron.

Parolante pri sia lernado de Esperanto, Seimin ĉiam estis en ioma emocio. "Komence mi nur sentis la lingvon originala. Leginte librojn pri Zamenhof, la iniciatinto de Esperanto, kaj artikolojn pri li fare de liaj filinoj kaj amikoj, mi ekhavis novan konon pri Esperanto. La penso kaj virto de Zamenhof havas grandan influon por formiĝo de mia koncepto pri la vivo. Mi admiras lin respekto-

plene. Zamenhof kreis Esperanton per sia tuta vivo. Mi volas plenenergie posedi ĝin, por ke aliaj popoloj konu Ĉinion kaj la ĉina popolo konu la eksteran mondon."

Aŭtoritataj esperantistoj de Ĉinio laŭdas lin pri lia profunda kono de la lingvo. Tian nivelon li atingis post penega kaj diligenta lernado. Li diris foje: "Farante aliajn aferojn mi neniam forgesas Esperanton; lernante Esperanton, mi povas forgesi aliajn aferojn." Ja tiel agis li dum la pasintaj pli ol 20 jaroj. Li ĉiam parkerigas Esperantajn vortojn aŭ aŭdas sonbendojn, ĉu biciklante, ĉu vicstarante por aĉeti legomojn, ĉu lavante vestojn hejme. Kelkiam, aŭskultante ies raporton, li esperantigas la paroladon. En 1970 li estis sendita en vilaĝon. Laborante nuddorse li kunportis kun si vort-slipojn sub sia zono. Neniam li forgesis parkerigi Esperantajn vortojn. Lia "*Esperanta Klasifika Vortaro*" estis finkompilita tiam en la vilaĝo. En la lastaj jaroj li legis 600 Esperantajn literaturaĵojn kun mirinda rapideco, dume li atente studis ties esprimojn, retorikon, kaj priskribojn de figuroj. Li faris notojn de milionoj da vortoj, kiuj estis skribitaj en kajerojn, klasifike laŭ enhavo.

Lia diligenteco rikoltis rekompencan. La pena studo fine donis frukton: Li fariĝis brila stelo el la ĉinaj esperantistoj. Tio donis al li en la laboro lertan kaj majstran oportunon. Kiel prezidanto de literatura programero de Radio Beijing en Esperanta elsendo, li sola plenumas la verkadon, redaktadon kaj elsendon. Pere de tiu programero, li prezentis al la esperantistoj tra la

mondo la evoluon de la ĉina literaturo, laŭ ordo de dinastioj, ekde antikvaj mitoj, kaj literaturaj antaŭ Ĉin-dinastio (221-206 a.K.)

Krom sia profesia laboro Seimin ankaŭ sin dediĉas al verkado kaj tradukado en Esperanto. Por faciligi sian laboron kaj studon li verkis jenajn librojn (ne eldonitajn): *“Esperanta Klasifika Vortaro”* en 5 kajeroj kun 12 000 vortogrupoj, *“Esperanta Sinonimaro kaj Antonimaro”* kun 3 700 vortogrupoj kaj *“Rimaro”* por versfarado. Li estas unu el la ĉefaj kompilintoj de la ampleksa *“Ĉina-Esperanta Vortaro”*, eldonita de La Ĉina Esperanto-Eldonejo.

Ĉu eblas esperantigi kaj prezenti al la mondo la faman klasikan romanon *“Songô de la Ruĝa Domo”*, gemo de la ĉina literaturo? Plena je kreemo li komencis provan tradukon je la fino de 1984. *“Mia unua penso ne estis ĝia eldoniĝo,”* diris li. *“Sed ia devkonscio stimulis min entrepreni tiun grandiozan projekton kaj preni ĝin kiel mian dumvivan aferon.”*

Parolante li prenis el ŝranko kelkajn kajerojn de broŝuritaĵmanuskriptoj. Tio estas de li kompilita *“Ĉina-Esperanta Vortaro el la ‘Songô de la Ruĝa Domo’”*. Por ĉiu ĉapitro de la romano li kompilis unu kajeron. Nun li jam tradukis 40 ĉapitrojn, kaj la vortaro havas 40 kajerojn. La vortaro estas klasifikita laŭ persona, pejzaĝa k.a. priskriboj. Ĉaŭ Ŝjueĉin plenumis la verkadon de *“Songô de la Ruĝa Domo”* en dek jaroj. Li planas plenumi ĝian tradukon en 15 ĝis 25 jaroj. Kiam eldonanto petis, ke li publikigu la tradukitajn ĉapitrojn, li diris, ke li devos ripete poluri ĝin, por ke ĝi estu spirite fidela al la originalo.

Seimin estas pensema. Li intence faras valoran eksperimenton de fru-infanaĝa eduko per Esperanto. La eksperimenta objekto estas lia filino Revon.



Seimin, liaj edzino kaj filino

De la unua tago, kiam Revon eklernis paroli, Seimin instruas al ŝi Esperanton. Pri la kresko de Revon li diris entuziasme: *“Mia celo estas kulturi ŝin en eminentan esperantistinon. De kiam ŝi lernis paroli, mi instruas al ŝi paroli Esperanton.”* Unujara, Revon jam povis klare en Esperanto voki paĉjon kaj panjon, kaj diri *“ĝis revido”*, *“dankon”* k.a. Ŝi estas lingve sentiva, havas akran aŭdpovon kaj neniam forgesas lernitajn frazojn. Kiam ŝi estis dujara, ŝi povis ripeti rakontojn kiujn la patro rakontis al ŝi, imitante la voĉojn kaj mienojn. Esperanto fariĝis ŝia *“patra lingvo”*, dum ŝia patrino instruas al ŝi la duan lingvon, la ĉinan. En sia kvara jaraĝo, ŝi povis plekti interesajn fabelojn laŭ sia imago. Seimin surbendigis ŝiajn voĉojn. Li elprenis skatolon entenantan dek kasetojn kaj aŭdigis ilin al mi. Jen aŭdiĝis interparolo de mezaĝa viro kaj infano, jen aŭdiĝis voĉlegado kaj kantado en Esperanto. La sonbendo registris rakonton *“Lupo kaj ŝafido”* fare de Seimin al la kvarjara Revon, kaj kiam la lupo estis manĝonta la ŝafidon, la atmosfero fariĝis streĉa kaj aŭdiĝis nedetenebla kriadon de Revon.


La sekva paŝo en lia trejna programo por lia filino estas, ke ŝi faru rakonton ĉiutage, voĉlegu kaj faru taglibron en Esperanto. Post plia jaro li instruos al ŝi verki en Esperanto, kaj korespondi kun

alilandaj esperantistoj. Post ŝia aĝo de 12 jaroj, li kompilos por ŝi lernolibron, por ke ŝi studu gramatikon normale, kaj parkerigu vortojn maloftajn en ĉiutaga vivo. En ŝia aĝo de 14 jaroj li legigos al ŝi Esperantajn romanojn kaj novelojn.

Parolanta pri sia edzino, li nature montris elkoran amon. Lia edzino nomiĝas Ĝin Ĵuj, diplomito de la historia fakultato de la Nankina Universitato. Ankaŭ ŝi laboras kiel redaktisto en Radio Beijing. Ŝi estas lia subtenanto kaj helpanto en la laboroj. Li diris sincere: *“Mi multe ŝuldas al ŝi pro ŝia zorgo. Du trionoj de miaj atingoj devas esti atribuitaj al mia edzino.”*

“Nobla edzino kaj patrino” estas konvena laŭdo al Ĝin Ĵuj. Kiam la edzo estis tradukonta la *“Songon de la Ruĝa Domo”*, ŝi pretigis por li konsultajn librojn. Ŝi sola surprenas la taskon helpi sian filinon en lernado. Kiam la edzo laboris ĝis tagiĝo, ŝi senbrue ellitiĝis por prepari matenmanĝon.

46-jara Seimin, deveninta el kamparana familio en montaro de la suda Fuĝjan-provinco, fine trovis sian feliĉon ĉu en la familio ĉu en la afero. Antaŭe li verkis aŭtobiografian poemon *“Kial kaj kiel mi amas Esperanton”* por esprimi sian amon al Esperanto, nun li kovas romanon por esprimi sian aspiron. ■



Prof. Paul Neergaard

LU ĜINŜENG:

Memore al prof. Paul Neergaard

Forpasis prof. Paul Neergaard, fame konata esperantisto kaj internacia fakulo pri sempatologio. Lia forpaso estas granda perdo por la rondoj de scienco kaj Esperanto.

En la lernado de Esperanto, mi frue legis la libron "Atakoj kontraŭ Ĝardenplantoj" verkitan de Paul Neergaard. La libron mi prunteprenis de la redakcio de EPCĈ. Tio okazis antaŭ dekoj da jaroj. Mi povas diri, ke la nomo de la unua esperantisto, kiu plej profunde impresis min, estas Paul Neergaard.

En 1981, prof. Paul Neergaard skribis al prof. Io Chou de la Nordokcidenta Agronomia Universitato de Ĉinio, ke li veturos al Ĉinio kaj vizitos Ugonggubernion de Ŝenŝji-provinco. Kompreneble, tre ĝojis la tieaj instruistoj de sempatologio kaj preparis sin por inviti lin referi. Mi, entomologo kaj esperantisto, ĝojis same kiel ili.

Ĝenerale, por fari internacian viziton oni devas unue plenumi serion da proceduroj, kio bezonas multe da tempo. Sed tamen prof. Paul Neergaard venis kelkajn

tagojn post kiam ni ricevis lian leteron. Li havis arĝentkoloran hararon kaj ruĝajn vangojn kaj iris per facilaj paŝoj. La agronomia universitato petis min interpreti lian referaĵon kaj akompani lin en lia vizitado al proksimaj koncernaj instancoj.

Ni, esperantistoj de la loko, kunsidis kun li. Li diris al ni, kiel li lernis Esperanton kaj kian opinion li havas pri lernado de fremda lingvo. Li montris, ke oni devas unue lerni Esperanton por pli efike lerni nacian lingvon, kaj prezentis al ni ankaŭ la eŭropan Esp-movadon. Li vizitis pli ol 50 landojn. Li diris, ke li delonge deziris viziti Ĉinion. La registaro de Danlando proponis, ke li partoprenu en delegacio por fari la viziton. Tamen, li atendis longtempe. Kaj tiaj delegacioj organiziĝis kaj ekvojaĝis unu post alia, sed li ankoraŭ ne sukcesis realigisian deziron. Li humure diris: "Finfine mi decidis organizi delegacion el unu persono, tial mi sukcesis."

Li faris referaĵon pri sempatologio kaj vizitis la Botanikan Instituton de la Ŝenŝji-a Agronomia Akademio. Li esploris pri

fitopatologio, tial li tre atentis pri la rolo de semo kaj rilataj informoj. Dum la vizitado ĉina fitopatologo tuŝis la fakton, ke la plantaĵoj de iu loko ĉiuj mortis pro siaj malsanaj semoj. Tion aŭdinte, li tuj tion notis sur sia kajero kaj diris, ke, kiam lia libro "Sempatologio" reeldoniĝos, li certe enskribos en ĝin la fakton. "Sempatologio" kun 1 200 paĝoj estas lia grava monumento. Kiam li vizitis Ĉinion, li kunportis nur unu ekzempleron kaj ĝin donacis al la Pekina Agronomia Universitato.

Plej profunde impresis nin, krom lia vasta scio, ankaŭ liaj entuziasmo kaj zorgemo al Esperanto kaj Esp-movado. Li detale demandis pri la Ŝenŝji-a Esp-movado. Li konservis sufiĉe multe da Esperantaj libroj. "El Popola Ĉinio" kaj aliaj revuoj estis konservataj en jarkolekto. La totala longeco de librobretoj, sur kiuj metiĝas la libroj kaj revuoj konservataj de li, atingis pli ol 60 metrojn.

Ni ĉinaj esperantistoj devas lerni lian sindonemon al la scienca afero kaj Esp-movado. ■

Ŝtala urbo en la meza baseno de Jangzi-rivero

Teksto de MEJ ĜI
Fotoj de LIŬ SIGONG

La Uhan-a Ferŝtala Kompanio, kiu situas en la distrikto Ĉingŝan de Uhan, estas unu el la plej grandaj entreprenoj en la meza baseno de Jangzi-rivero. Ĝi estas la unua grandtipa ŝtala uzino konstruita post la fondiĝo de la nova Ĉinio kaj havas branĉojn de ercoekspluatado, metalurgio kaj laminatado kaj helpan sistemon. Ĝi viciĝas nur post la plej granda Anŝan-a Ferŝtala Kompanio en la Nordoriento de Ĉinio.

30 jaroj pasis de kiam la altforno n-ro 1 de la kompanio eligis unuafoje feron en la 13-a de septembro 1958.

VIVOPLENA LOĜKVARTALO DE LABORISTOJ

Veninte al la ferŝtala kompanio, mi unue rigardis la loĝkvartalon de laboristoj. La lokanoj nomas

ĝin Ruĝa Ŝtala Urbo. Larĝa platana aleo trairas la urbon. Tie loĝas 120 mil laboristoj kaj iliaj familianoj. En la movoplena urbo estas butikoj, kinejoj, lernejoj, hospitaloj, restoracio, foiroj kaj aliaj publik-utilaj servoj.

La Ruĝa Ŝtala Urbo distancas de la kompanio 7 kilometrojn. De malproksime oni povas vidi altajn fumtubojn kaj alttensiajn lineojn.

MODERNA 1 700-MILIMETRA LAMINATILO


La plej atentata en la uzino estas la 1 700-milimetra laminatilo.


La konstruado de la laminatilo komenciĝis en 1974. Ĝi havas 143 konstruaĵojn. La ĉefaj el ili estas varma lamena laminatejo, malvarma lamena laminatejo, silicia-

lamena laminatejo kaj kontinua muldejo. La ekipaĵoj de la 1 700-milimetra laminata sistemo estas aĉetitaj el la Federacia Respubliko de Germanio kaj Japanio.

Unue mi venis en la Fabrikon de Varma Lamena Laminatado. La fabrikdomo longas pli ol 1 000 metrojn. Ene viciĝas unu vertikala laminatilo, kvar krude-prilaboraj laminatiloj, sep fajne-prilaboraj laminatiloj, tondilegoj kaj rulpa-kiloj. Mi suriris la altan pasejon flanke de la fabrikdomo kaj vidis, ke varmigaj fornoj eligas ruĝan lumon, kaj ardaĵ ŝtalaj blokoj ruliĝas sur la ruluma vojo de la laminatilo. La ardaĵ blokoj fluge kuris antaŭen kun tondra bruo. En palpebruma daŭro ili trapasis la malvarmigan pordon similan al akvokurteno kaj malaperis ĉe la fino de la laminatilo. La blokoj pasis preter mi, levis varmegan aerondon, kiu kvazaŭ envolvis min en la ondon.

Kiam mi descendis la pasejon, mi tuj sentis agrablan malvarmeton. En stokejo mi vidis multajn lamajn rulojn. S-roj Ŭang kaj Ma de la fabriko diris al mi, ke unu el la superecoj de la 1 700-milimetra laminatilo estas granda rapideco. La varma kontinua laminatilo povas laminati 23.3 metrojn da ŝtalaĵo ĉiusekunde, kaj la kvalito estas bona. Nun la fabriko povas laminati diversajn ŝtalajn lamenojn kun dikecoj de 1.2 ĝis 12.7 milimetroj. Antaŭe multaj el tiuj specoj estis importitaj.





La Uhan-a Ferŝtala Kompanio en malproksimo

Antaŭ la pordo de la Fabriko de Varma Laminatado staras monumento. Ŝtona soklo subportas rulon da ŝtalaj lamenoj. Tio estas memorigaĵo por la sukcesa provo de la 1 700-milimetra laminatilo. La monumento rememorigas la laboristojn de la uzino pri multaj pasintaĵoj. 46-jara inĝeniero Ju Mingjan diris al mi, ke nelonge post la prova funkciigo de la laminata maŝino en 1979, la japanaj specialistoj por muntado revenis hejmen. La maŝino estis projektita por laminatado de importitaj ŝtalaj blokoj, tial la maŝino taŭgis nur por importitaj materialoj, sed ne por enlande produktitaj. Iu japana specialisto asertis, ke post nelonge la maŝino fariĝos senutila: En la fino de 1979 Ju Mingjan fondis specialan grupon por solvi la problemon. Li ordigis kaj kalkulis milionon da primitivaj donitaĵoj kaj fine solvis la problemon. Aprile de 1980 sukcesis la unuafoja provo de laminatado de enlande produktitaj ŝtalblokoj. La sukceso elhakis glatan vojon por la normala funkciado de la 1 700-milimetra laminatilo.

La laborejo de kontinua muldado de la Dua Ŝtala Fabriko estas materiala fonto de la 1 700-milimetra laminatilo. Mi intervjuis la fabrikestroon Deng Ĉjilin en lia kabineto. Li, 38-jara, estas kompare juna gvidanto sur fabrika nivelo. Li parolis lakone kaj kategorie. Li konigis al mi, ke la 1 700-milimetra laminatilo estas alte modernigita kaj regata komplete per komputilo. Kontinua muldado estas la plej avangarda tekniko en la mondo. En la komenco de 1979 la proporcio de kontinua muldado estis nur 27.79%. Poste, dank' al multaj teknikaj renovigoj muldiloj estis forigitaj en 1985, kaj la proporcio de kontinua muldado atingis 100% kaj superis la antaŭan projektnormon.

La grandaj fabrikoj de la uzino senescepte superis la antaŭan projektnormon en produktado. Unu el la kialoj estis senĉese fari teknikan reformadon. Mi estis informita, ke en 1987 la uzino plenumis sciencan esploradon de 60 temoj kaj faris 1 333 teknikajn renovigojn, kio multe vigligis la uzinon.

Junaj laboristoj de Martin-forno n-ro 6 profunde impresis min. Ĝis nun iliaj gajaj vizaĝoj ankoraŭ aperadis en mia memoro: Estro de la forno Guj Hongli, 30-jara, altastatura, ridetanta dum parolado; manipulanto de oksigenbeko Jan Tingming, 27-jara, maldika, simila al studento; la unua helpanto Zeng Ĉinghuj, 33-jara, ŝercema, ŝatata de siaj kamaradoj, kiuj diris, ke li similas al komediisto; Hu Jaŭnjan, 29-jara, en figuro de tipa ŝtaligisto, bele skribanta...

La Unua Ŝtala Fabriko de la uzino estas unu el la ĉefaj fabrikoj plej frue konstruitaj. Nun en la fabriko estas 7 Martin-fornoj, ĉiu kun kapacito de 500 tunoj. Guj Hongli estas la estro de C-skipo de la forno n-ro 6. Kiam mi venis en la fabrikon, mi vidis lin krei antaŭ la forno, gestante al la regadejo. Pureco kaj bonordeco regis ĉe la forno. Mi iris en klimatizitan regadejon kaj tuj sentis agrablan malvarmeton. Post nelonge Guj Hongli kaj aliaj kuris en ŝvitego. Viŝante al si ŝviton, li petis de Jan kelkajn donitaĵojn kaj diris al mi, ke baldaŭ pretiĝos la ŝtalo en la forno. Li elkuris dirante kaj revenis kun vizaĝo denove kovrita de ŝvito.

Subite mi vidis ardan ruĝon. Mi sciis, ke oni baldaŭ elverŝos ŝtallikvon. Mi tuj iris malantaŭ la fornon kaj vidis, ke arda ŝtallikvo fluas en ladlon, levante de tempo al tempo blindigajn sparkojn. La ŝtala likvo ruĝe lumigis la laborejon kaj ankaŭ ĉies vizaĝojn.


En paŭzo mi babilis kun ili. Guj Hongli diris al mi, ke lia grupo konsistas el 10 homoj. Ĉiu plenumas klare difinitan laboron en kunago kun aliaj. Lia tasko estas garantii kvaliton de ĉiu forno da ŝtalo. Tio ne estas facila laboro. Ili ĝojas pro ĉiu forno da bonkvalita ŝtalo. Manipulanto de oksigenbeko Jan, laborante super la panelo, diris al mi, ke la nova




Speciala haveno de
la Uhan-a Ferŝtala
Kompanio



Senkovra fosejo de la
ferminejo de Daje






En la laborejo de kontinua mul-
dado



Antău Martin-forno

En la Fabriko de Varme Prilaborita Štala Lameno



tekniko de supre enblovi puran oksigenon estis aplikata al la forno n-ro 6, kaj lia tasko estas regi enblovatan oksigenkvanton kaj mezuri donitaĵojn de miksado de diversaj materialoj, kunage kun la estro.

Ili denove komencis la intensan laboron. Mi jam ekŝatis tiujn sangvinajn junulojn.

LA FERA MINEJO DAJE

La Uhan-a Ferŝtala Kompanio havas vastegan minejon. La fera minejo Daje estas unu el ĝiaj ĉefaj ercbazoj.

Antaŭ pli ol 3 000 jaroj oni jam komencis ekspluati ferajn ercojn kaj fandi ilin en Daje. En la postaj jaroj de Ĉing-dinastio (1644-1911) la registaro establis tie la Minejan Administracion de Daje, kaj komenciĝis grandskala ekspluatado en moderna tekniko. Poste, tie fondiĝis la unua ŝtala uzino de Ĉinio — Hanjeping - kompanio. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio la kompanio fariĝis parto de la nuna Uhan-a Ferŝtala Kompanio. La minejo liveras al ĝi ĉiujare ĉ. 4 milionojn da tunoj da erco.

78 kilometrojn sudoriente de la uzino estas Daje. Veninte al la loko, mi miris de ia bruego kaj informiĝis, ke oni eksplodigas minon. Unu el la minfosejoj de Daje estas la orienta Subĉiela Fosejo, nemalproksime de la loĝkvartalo. La fossejo el la mineralaj stratumoj Ŝjangbiŝan, Ŝiziŝan kaj Ĝjanŝan estas granda baseno kun longo de 2 200 metroj kaj larĝo de 550 metroj. Spiralo kun niveldiferenco de 12 metroj kondukas al la fundo. En kontrasto kun la vastega fossejo, la elektraj elkavigatoj kaj baskulkaminoj ŝajnis tiel malgrandaj kiel infanaj ludiloj. Mi estis informita, ke la fosado estis komencita en 1958. La projektita jara produkto-povo estis 2.9 milionoj da tunoj da erco, sed en 1971 la minejo donis 3.76 milionojn da tunoj da erco, en

rekorda kvanto en la historio.

Mi intervjuis ŝoforon de elkavigato. Li diris al mi, ke la erco baldaŭ estos elĉerpita. Rimarkinte mian dubon, li aldonis, ke en Daje estas la Okcidenta Fosejo, sed tie oni jam ne fosas plu pro la elĉerpiĝo. Nun subtera fosado estis komencita. Poste, gvidanto de la minejo konfirmis la diron de la ŝoforo.

Krom Daje, la ferŝtala kompanio havas ankaŭ aliajn ercbazojn, kiaj Lingŝjang, Ĉengĉaŭ kaj Ĝinŝan. Sed la kvar minejoj ne povas liveri al la uzino sufiĉan ercon, kaj ĝi importas 35-39% de la bezonata kvanto. Speciala havejo servas al la transportado de la importita erco.


La speciala haveno sur la suda bordo de Jangzi-rivero distancas de la kompanio je 3 kilometroj. Tie la riverujo estas profunda. 5 000-tonelaj ŝipoj povas ankriĝi en la tuta jaro, kaj en la akvoabunda periodo la haveno povas akcepti 10 000-tonelajn ŝipojn. La haveno

havas bordon kun longo de 1 370 metroj, 4 ĝetkajojn kaj 2 staplejojn. Gigantaj duoblaj flosaj arganoj etendis siajn brakojn jen al la rivero, jen al la staplejo.

La intensa laborado en la haveno pensigis min pri la arda sceno sur la konstruejo de la nova altforno n-ro 3. Ĝi estas unu el la gravaj konstruaĵoj de la kompanio por la celo produkti po 7 milionojn da tunoj da fero kaj ŝtalo en la jaro. La unua vicedirektoro de la kompanio Liŭ Ĉji diris al mi, ke la kompanio grandigos la skalon de produktado, nome, la produktokvantoj de fero kaj ŝtalo kreskos po 4 milionoj al po 7 milionoj da tunoj en la jaro. Tio estas impona celo. Ĉinio bezonas grandan kvanton da ŝtalo por sia modernigado kaj cent milionoj da tunoj da ŝtalo ne estos sufiĉaj por ĝi. La ora epoko de la ĉina ferŝtala industrio estos la sekvanta jarcento.

Kiel statos la kompanio en la jarcento?

En la Fabriko de Malvarme Laminatita Lameno




Engluti tutan jujubon

Iu diris: “Piro utilas al la dentoj, sed malutilas al la lieno; jujubo utilas al la lieno, sed malutilas al la dentoj.” Aŭdinte tion, stulta junulo subite diris post longa pensado: “Se mi manĝos piron, mi nur maĉos kaj ne englutos ĝin, do ĝi ne detruos mian lienon; se mi manĝos jujubon, mi nur englutos kaj ne maĉos ĝin, do ĝi ne detruos miajn dentojn.” Iu konato ŝerce diris al li: “Eble vi iam englutis tutan jujubon, ĉu ne?” Aŭdinte tion ĉiuj ĉeestantoj ekridegis.

Vinfarado

Iu konsultis vinfariston pri vinfarado. La lasta diris al li: “Por fari vinon oni devas miksi



Reciproka helpo



dekalitron da rizo, du dekalitrojn da akvo kaj unu uncon da gisto kaj fermentigi ilin sep tagojn.” Hejmenreveninte la forgesema konsultinto miksis nur unu uncon da gisto kaj du dekalitrojn da akvo kaj ilin fermentigis. Post sep tagoj li gustumis iom el la likvaĵo kaj trovis, ke ĝi ankoraŭ estas akvo. Tial li iris riproĉi la vinfariston. La lasta diris al li: “Vi misuzis mian metodon.” Li kontraŭdiris: “Laŭ via metodo mi miksis kaj fermentigis du dekalitrojn da akvo kaj unu uncon da gisto.” La vinfaristo demandis: “Ĉu vi uzis rizon?” Li mallevis la kapon kaj

respondis post medito: “Mi forgesis uzi rizon.”

**“Pluvas
ankaŭ
antaŭe”**

Iu malrapide iris en pluvo, alia diris al li: “Vi iras tro malrapide.” Li pravigis sin: “Pluvas ankaŭ antaŭe.”

La Internacia Konkurso de Drakboatoj en Pekino

Fotoj de U ĜIJI

Somere okazis en Longtan-parko de Pekino la Internacia Konkurso de Drakboatoj. La konkurso estis grandioza aktivado sporta, amuza kaj turisma. Konkursis la teamoj el la Federacia Germanio, Aŭstralio kaj Singapuro kaj tiuj de la provincoj Gŭangdong, Siĉŭan kaj Hunan kaj Pekino. La

konkurso montris bravan superemon kaj amikecon inter la sportistoj.

En la konkurso artistoj prezentis sur flosa scenejo kaj dekoritaj kanotoj muzikaĵojn, dancojn kaj tradiciajn ĉinajn teatraĵojn.

Ĉinaj sportistoj en strebado





Scenoj el tradiciaj ĉinaj teatraĵoj



La inaŭguro de la konkurso

La teamo el fremdlandaj studentoj de la Pekina Lingva Instituto atingis la cellokon.



ĈINAJ POŝTMARKOJ

Krizantemo

de LU DONG



Krizantemo estas unu el la famaj floroj de Ĉinio. Ĝi floras en aŭtuno. Dank' al la zorgema kultivado de hortikulturistoj dum centoj da jaroj, ĝi ricevis multajn speciojn. Pro belaj formoj kaj variaj

koloroj, ĝi estas multe ŝatata kaj admirata.

La poŝtmarko-serio "Krizantemo" el 18 pecoj estis emisiita la 10-an de decembro 1960.